

Frederi MISTRAL

**LA POEMO
DE
RODANO**

SAT-BROSURSERVO
1988 * 30 FF

Frederi MISTRAL

LA POEMO DE RODANO

el la provenca originalo
esperantigis R. Laval

kun antaŭparolo de Michel Duc Goninaz

Traduko lingve korektita
de k-doj Michel Duc Goninaz
kaj Jullien en Aikso-la-Provenca

SAT-Broŝurservo, 1988
Cercle espérantiste de l'Agenais
F 47340 Laroque Timbaut




Frederi MISTRAL

Frederi MISTRAL pri esperanto :

"Se tiu lingvo povos diskonigi nian belan Provencon tra la mondo, pro tio mi tre ĝojos."

(en konversacio kun nia karmemora samideano Honoré Bourdelon en Arlezo)



Alpes

LIONO

Rodano

Givorso

Vieno

S. Stefano

Kundrio

FOREZO

Serjero

Andanco

S. Valjero

Izero

Grenoblo

Turnono

Romanso

Valenco

Rodano

Dromo

La Vulto

Dijo

VIVAREZO

Ardezo

Ročmauro

Montelimaro

Vivjero

Bonzero

Uvezo

Pejrolato

Nionso

Burg S. Andeolo

S. Spiritponto

Mondragono
Orango

CEVENOJ

Aleso

Rokmauro

Gardo

Rodano

Avinjono

Duranco

Nimo

Taraskono

Beukajro

Arlezo

KRAUO

KAMARGO

VAKAREZO

BERROLAGO

● Aikso-la-Provenca

Sanktaj Marioj

Martigo

MARSEJLO

MEDITERANEO

MISTRAL kaj la POEMO DE RODANO

En la komenco de la 19-a jarcento manifestiĝas la unuaj signoj de renaskiĝo de la okcitana nacia sento. La konsekvencoj de tiu movado estis, malgraŭ gravaj sociaj bataloj, pli literaturaj ol politikaj. La fondo de la Felibrisma skolo en 1854, kiu devis simili al la fondo de la Renesanca Plejado, estis fakte agnosko, ke la okcitanaj dialektoj malvenkis en la urboj kaj povas pluvivi nur en la kamparo. La tuta Felibrisma spirito estas aliĝo al la tradiciaj vivmanieroj kaj moroj de Provenco, idealigitaj laŭ la romantikaj modeloj.

La plej talenta el la tiamaj verkistoj, la mondkonata Frederi Mistral, prikantas la tradician vivon de la kamparanoj kaj paŝtistoj en **Mirèio**. En la **Poemo de Rodano**, la lasta granda poemo de Mistral, estas elvokita la vivo de la Rodanaj ŝipistoj. Komencita probable ĉirkaŭ 1889, tiu poemo estis publikigita unuafoje en 1896.

La detala kaj realisma priskribo de la ŝipistoj estas la plej evidenta karakterizaĵo de tiu eposo. Kiel sciante, la haŭla ŝipado daŭris ĝis proksimume 1840, kiam ĝin anstataŭis la vaporŝipoj, kies regado ne daŭris longe : en 1855 ilin forpelis la fervojo. Mistral tre skrupule kolektis dokumentojn pri tiu malaperinta fenomeno kaj zorge enketis ĉe homoj, kiuj ĝin konis proprasperte.

Tiel ni akiras dum la legado vastan scion pri la laboro, karaktero, vivmaniero de tiuj ŝipistoj, pri la trapasataj urboj kaj pejzaĝoj en epoko, kiam la surrivera vojaĝo de Arlezo ĝis Liono daŭris unu monaton.

Sed al tiu ĉefa temo aldoniĝas dua, la rakonto pri la kvazaŭ magia amliĝo inter Guihén (Vilhelmo), princo de Oranĝo, kaj la orserĉantino Angloro (= Lacerto). Kun tiu amidilio plektiĝas la legendo pri la Rodana drako - fakte speco de vira sireno aŭ tritono.

Tria karakterizaĵo povus esti la simbola aŭ filozofia signifo de la poemo. Malgraŭ la aserto de Mistral en 1903 : "*Ai fa ma proufessioun de fe dins lou Pouèmo dóu Róse*" (Mi faris mian kredkonfeson en la Poemo de Rodano), tiu filozofia signifo, kiun oni suspektas ĉe la ripet-

ado de simbolaj elementoj, ne estas eksplicita. Unu afero estas certa : la **Poemo de Rodano**, kun ties fina katastrofo, simbolas la finon de historia epoko, kiun Mistral idealigas, pentras eksterhistoria : ĝi estas omaĝo al afero venkita.

Du strofoj estas aparte klarigaj : la fino de la strofo LXXI de la kanto VIII, kiu profetas tempon de abundeco, kiu igos la homojn malkapablaj ĝui la vivon kaj nostalgiaj pri la antikvaj revoj kaj superstiĉoj; kaj la strofo LXII de la kanto VII, kiu estas la klarigo de la tuta poemo : la junulo kun ruĝa ĉapo - la Progreso - mortigas la virbovon - la "antikvan Rodanan ŝipistaron" (rouan signifas samtempe virbovo kaj ondego), ĉar la drako-protektanto - t.e. la antikva mito - forlasis la riveron (sub la formo de Vilhelmo).

Por tiu eksterordinara verko Mistral elektis la dekonusilaban version kun (inkluzive) fina silabo senakcenta - simila al la dekonusilabo de Dante -, sen rimoj kaj asonancoj : la rimon - kiu, laŭ la diro de Mistral, trudas ripetigantajn ideojn kaj bildojn - la aŭtoro anstataŭigis per la ritmo.

Mistral konigis siajn verkojn al la neprovencaj legantoj per franclingvaj tradukoj, kiujn li mem faris. Raymond Laval, tradukinte tiun elstaran verkon, faris grandegan servon al la provenca literaturo kaj al la literaturo de esperanto : lia ĝisekstreme fidela, zorge polurita traduko peros al la leganto la riĉaĵojn de la **Poemo de Rodano**. Ĝi donos al esperanto iun provencan aromon, kiu mankas al ĝi, ĉar traduko el la provenca lingvo estas ja raraĵo en Esperantujo.

En Aikso la Provenca, aprilon 1988

Michel DUC GONINAZ

ENKONDUKO

En la tempo de la trobadoroj regis en Okcitanio (la tuta suda Francio) la lingvo de "oc" (pr. ok = jes), ĉie parolata en siaj diversaj dialektoj, de Limoĝio kaj Aŭvernio ĝis Mediteraneo, de Bearno ĝis Alpoj kaj Nico. Esprimilo de rafinita kulturo, ĝi floris en brila literaturo, kies influo transis la landlimojn.

En la 13a jarcento, la krudaj nordaj Frankoj (tamen estrataj de la klera Simon de Montfort), krucmilitantoj kontraŭ la herezon de la Albigenoj (kataroj) invadis Okcitanion. De tiam la "oc"lingvo regresis fronte al la franca. En la 16a jarcento, per edikto de reĝo Francisko la Unua, la franca lingvo estis oficialigita kiel deviga en la administraj aktoj sur la tuta regna teritorio. Ĝia hegemonio pli kaj pli fortiĝis kaj ankriĝis per la persista agado de la centraliza potenco : Richelieu, Ludoviko la 14a, la Jakobenoj, Napoleono, fine la 3a Respubliko kun la kreo de la publikaj devigaj lernejoj, en kiuj la uzado de dialektoj estis severe malpermesita. Tamen en la kutimo la okcitana popolo daŭre uzadis siajn tradiciajn dialektojn, almenaŭ ĝis la komenco de la 20-a jarcento (aŭ la fino de la 19-a, se oni konsideras, ke tiu ĉi fakte finiĝis nur en 1914).

En tiu longa periodo aperis de tempo al tempo kelkaj provoj por renaskiĝo de la okcitana literaturo. Laste antaŭ nun, en la 19-a jarcento, grupo de sep junaj verkistoj ("li set primadié") iniciatis en Provenco la movadon, kiun ili nomis "Felibrige". En la sekvo de tiuj pioniroj levigis en tuta Sudfrancio legio da entuziasmaj "felibroj", kiuj verkis en siaj respektivaj dialektoj, kaj fondis regionajn skolojn kunligitajn en unu federacia unio. Inter ili elstaris la granda figuro de Frederi Mistral (1830-1914), unua "Capoulié" (ĉefo) de l'Felibrigó.

Mistral verkis en la rodanprovenca dialekto, la plej belsona, parolata en Arlezo, en Avinjono, en Aikso-la-Provenca. Li famiĝis jam en sia 29-a jaro per publikigo de **Miréio** (Mirejo), poemo en 12 kantoj, tuj salutita de

Lamartine kiel aŭtenta majstroverko. Sekvis aliaj epopeaj poemoj, pluraj poemkolektoj, kaj la monumenta **"Trezoro de l'Felibrigo"**, provenclingva vortaro. La famo de Mistral kaj de la provenca literaturo etendiĝis en tuta Eŭropo, kaj en 1904 Mistral ricevis en Stokholmo Nobelpremion pri literaturo.

En 1896, post longa kovado, aperis **"lou Pouèmo dou Róse"**. Laŭ la formo ĝi estas escepta en la verkaro de Mistral, ĉar ĝi konsistas el senrimaj versoj, kio plifaciligas fidelan tradukon. Ĉiuj versoj estas de egala longo; de tio tamen ne rezultas monotoneco, ĉar li lerte variigis la internan strukturon de la versoj. En mia traduko mi provis kiel eble plej reprodukti tiun ritman diversecon. Ĉu sukcese? Juĝos la legantoj.

Almenaŭ la esperanta teksto estas sendube lingve sen-erara, ĉar ĝi estis zorge kontrolita kaj korektita, en komparo kun la originalo, de du tre kompetentaj personoj, nome Michel Duc Goninaz kaj nia karmemora kamarado Marcel Jullien, kiu estis bonega provenclingvano. Al ili mi ŝuldas grandan dankon, ĉar iliaj rimarkoj kaj sugestoj multe helpis min por poluri mian tekston.

Dankon mi ŝuldas ankaŭ al la kara memoro de kamaradino Renée Volpelière, kiu tre zorge kaj bone tajpis la lastan version de mia manuskripto, kaj al nia ĉiam sindonema eldonisto, amiko Kribo.

La tradukinto

LA POEMO DE RODANO

Kanto Unua
Mastro Apjan'

I

*Ekiras de Lion' je matenblanko
La veturistoj, reĝoj sur Rodano.
Estas de viroj raso nodmuskola,
La Kundriana, gaja, brava, ĉiam *
Stare sur flosoj kaj abiaj ŝipoj;
Brun' de sunhelo kaj rebril' de l'akvo
Orumas la vizaĝojn kiel bronzon.
Sed tiutempe pli ol nun, mi diras,
Tie vidiĝas viregoj densbarbaj;
Korpulentoj, grandaj, kverke dikmembraj,
Movantaj foston kiel pajlereton,
De pob' al pru' krientaj, blasfemantaj,
Kaj, por kuraĝon al si doni, large
El la poteg' trinkantaj ruĝan fluon
Aŭ el kaldron' ĉerpantaj karnotranĉojn.
Laŭlonge de l'river' kriado sonas
De vent' al vent' aŭdata senripoze :
1 - Pruon al val' ! Reĝlanden ! Imperien ! **
Supren la pruo ! Daŭ ! Tiru la kablon ! ****

* Anoj de Kundrio (Condrieu), haveno sude de Liono.

** Reĝlando, Imperio : dekstra (okcidenta), resp. maldekstra
(orienta) bordoj de Rodano.

*** Daŭ ! okcitana interjekcio : Alten ! ek !

II

Ili nest' Kundri', el kie venas
 De nia tera vent' l'unuaj blovoj. *
 Sankt'-Nikola', patrono de l' maristoj,
 Havas en ĝi kapelon kun altaro.
 La beatulo kun ora mantelo
 Kaj mitro forkoforma, apud kuvo,
 El kiu jen elmergiĝas la kapoj
 De la tri buboj el peklo savitaj,
 Etendas manon al ĉio naviga.
 Oni lin festas tie ĉiujare,
 Kaj la bargistoj, digne, sur la ŝultroj
 En procesio portas al li barkon
 Kaj se dronanto en Rodan' baraktas :
 - Al Sankta Nikolao, ĉiuj krias,
 Vi rekomendu vin, sed firme naĝu !
 Vane famiĝis Vernezon', Ĝivorso :
 De lok' al loko, ĉie renomita,
 Kundrio tiam estis la patrino
 De l'mastroj de Rodan'. La malsprituloj
 De la Vien' kaj Mulatjer'-havenoj **
 Kaj la kanutoj palaj de Rufkrucio ***
 Al ili vane kriis : "Ledpugaĉoj !" ****
 Kvankam portante ledajn pantalonojn,
 Edzinon kaj filinojn ili vestis
 Riĉe kaj brave ja kiel burĝinojn.
 Veraj mastrinoj, la kundriaj belaj
 Kiam burĝonas la morusaj arboj,
 Metis por kov' la grajnon de silkraŭpoj *****
 En bona varm' de sia forta brusto.
 Per fajna punto kaj floreta brodo
 Ili, por distri sin, ornamis tulon,
 Sciis per densaj steberetoj stebi
 Gantojn el led', kaj, bonaj nutristinoj,
 En ĉiu jar' superban knabon naskis.

* Mistralo (norda vento, kiu blovas de tero al maro) .

** La Mulatière : havena kvartalo en Liono.

*** Kanuto : liona silkteksisto.

**** Netradukebla vortludo, laŭvorte "haŭtopogoj". En provenca lingvo
 "haŭto" signifas ankaŭ "ledo", kaj slange "putino".

***** Grajno de silkraŭpoj : ovoj de bombikso.

KOREKTENDOJ al LA POEMO DE RODANO

- Pg. linio
- 9 14. Korpulentoj → Korpulentaj
- 12 9. La fumaj staj ŝirkoj → la fumaj itaj ŝirkoj
- 34 -6. Per stromovo puŝis al barkvicon → la barkvicon
- 43 8. Similajn al trio → al turoj
- 45 11. La sunon jetas → la ŝirto
- 45 13. unu en la alian → unu en alian
- 51 9. De ŝafopel' → De ŝafofel'
- 55 -7. kun kapo facimova → facilmova
- 69 -2. iam de flako al flako → de flako al flako
- 83 8. kaj eĉ tri amatojn → tri amantojn
- 91 -12. Kiuŝi oni elŝiros → oni elŝiros
- 96 -2. Kun pip' en la dentoj → Kun pip' inter la dentoj
- 100 4. Al kiel edzino → Al li kiel edzino
- 102 16. Ek! la tuta vico → la tuta vico
- 115 -3. La Avinjonanaj portistoj → La Avinjonaj portistoj
- 120 19. Por ĝin mortigi → Por ĝin mordi
- 133 10. Sankta Maria → Sankta Marta
- 134 15. Sankta Maria → Sankta Marta

III

Ho avotemp' de antikva simpleco,
Kiam la domoj ne havis seruron,
Kaj en Kundri' kiel cîe, la homoj
Piketis sin pro ŝerco sub la lampo !
Tiam cîe ni regis la farandolo,
Nacia danc' de tuta Rodanio
Kaj de l'antikva reĝland' Bozonida; *
De Kundri' ĝis Arlez' en festotagoj,
Imite al turniĝoj de l'rivero,
Ĝi ondas kaj serpentas cîe la bordoj.
Kaj tie floris la nobla turniro,
En kiu dum somero, sur Rodano,
Ĉiudimanĉe, en trupoj rivalaj,
Luktis la riveranoj kun la ŝildo
Ĉe brusto, lanco en pugno, piedoj
Sur l'alta ŝtupetaro, kaj la knaboj
Sin montris nudaj, fortaj kaj kuraĝaj,
Al la okuloj de l'belaj knabinoj;
Tiam bravuloj el Sankta-Maŭrico
Sin alfrontadis kontraŭ Ĝivorsanoj...
Ho avotemp', gaja temp' de simpleco,
Kiam Rodano portis vivokirlon !
Ni knaboj sur l'akvo longa rigardis
La Kundrianojn, kun man' sur stirilo,
Pasi fieraj; Rodan', dank'al ili,
Estis abelej' zuma kaj labora.
Nun cîo estas morta, vasta, muta,
Kaj ve ! de tiu movado nur restas
La sulko sola kaj la ronĝospuro
Fosita de la kabloj en la ŝtonoj :
Frotaĵo ja, jen cîo atestanta
Pri navigad' kun motkri' : Imperien !
Sed la romiaj vojoj ankaŭ lasis
Ne pli profundajn spurojn kaj kavaĵojn.

* Reĝlando de Provenco fondita de Bozono (j. 879).

IV

Ha ! en Nikola-tago, ĉe l'pordego
 De la preĝej', kiam aklam' elektis
 La ŝipist-reĝon, ĉu ne flam' triumfa
 Por kiu estis nomumita reĝo ?
 Kaj kredu, ke jen estis festenego
 Celebre al la gloro de reĝeco.
 Brusto de bov' kun sia graso pufa,
 Anseroj, meleagroj ronde dikaj
 La fumajŝtaj ŝinkoj, la "kajeto" *
 El herb' hakita, bakita, ŝmirita,
 La bonaj "punjoj" kronforme kneditaj **
 Kun ovoj kaj butero, la "rigotoj" ***
 Bele volvitaj en vito-folioj,
 Kaj regiona blanka vin' ŝaŭmeta,
 De ĉio, tiam, ili havis sate.
 Ĉu ne ja meze de tiuj ĉi klifoj
 Sovaĝaj, Rok' de Glun' aŭ Roko-Maŭro,
 3 Gargantu' reĝis, kaj, laŭ onidiro,
 Krurforke super Rodano, por trinki
 Per sia mano anstataŭ pokalo,
 Glutis la barkojn kune kun la homoj !
 En Pejrolat' oni montras gruzeron
 De la gigant' el sia ŝu' tiritan :
 Rokon plantitan sur la ebenaĵo.

V

Nu, tiujare en la festotago
 Mastro Apjan', venkinte en la veto,
 Sur sian kapon metis la reĝikronon.
 La junularo de Kundrio ĝoja
 Gaje tostadis dum la tuta nokto
 Al la nova reĝ', kaj, laŭ la kutimo,
 Post ĉiu trink' forĵetis sian glason.
 Ĉar Mastr' Apjan' posedis l'ekipaĵon
 Plej faman sur la tuta riverego.

* kajeto : regiona manĝaĵo.

** punjo : speco de kuko, specialaĵo de Valenco.

*** rigoto : malgranda kaprinlakta fromaĝo.

Zorge kalfatritaj per stupoflokoj,
 Kiuj tenas la kapojn de la krampoj,
 Per nigra peĉo ekstere gudritaj,
 Liaj estis sep, kun aŭ sen ferdeko,
 Sep barkoj el kruda ligno, bonegaj.
 Unue Kaburlo, kun la kajuto *
 Stara ĉe l'pobo, sur kiu dumnokte
 Ĉiu ŝipano dormis en hamako,
 Kun sia tranĉa pru' orgojlaspekta
 Pro la spron' de sia forta steveno;
 Poste "pinelo" aŭ barko avena **
 Portanta la nutraĵon de l'ĉevaloj;
 Tiun sekvis la "ŝipo de l'karato" ***
 Same formita el kverko-varangoj;
 Jen poste "siselando" tute plata ****
 Antaŭe kurba, kun kvadrata pobo;
 Paro da grandaj "savoĵaj" por porti
 Ĝivorsan karbon, kaj unu "sapino" *****
 Por kargo el kaŝtanoj vivarezaj; *****
 Krome du kurŝipetoj aŭ ŝalupoj
 Ligitaj al la barkar' ambaŭflanke
 Por veturigi la dikajn ĉevalojn,
 Kiuj sur bord', revene de Provenco,
 Forte al supra tiros la bargaron.
 Mastro Apjan', por tiu suprentiro,
 Havis okdek ĉevalojn stumpavostajn,
 Ja sen egalaj sur tuta Rodano,
 Kiuj, per kablo tirante l'barkvicon,
 Ĉe vipobat' de l' "bajlo" de la trupo *****
 Kaj blasfemkri' de l'krudaj kondukistoj,
 Tremigis tutan la riveran bordon.

* Kaburlo : propra nomo de barĝo siatempe fama.

** pinelo : plata barko kun kvadrataj pruo kaj pobo.

*** karato : ŝnuro inter barko kaj tirĉevaloj.

**** siselando : granda senferdeka barko.

***** La karbo el San-Stefanaj minejoj est s kargata en la
 Ĝivorsa haveno.

***** sapino (= abia) : plata senferdeka barko el ruĝa (norvega)
 abia ligno.

***** Vivarezo : montara regiono norde de Cevenoj (Ardeŝo).

***** Bajlo : ĉefo, vokto aŭ intendanto.

VI

Sur la Kaburla pruo, gravmiena
 Estis de Nikola', krude skulptita,
 La kapo kun la mitro. Ĉe la pobo,
 Plantita sur la grandbarba stirilo,
 Staris la kruco tie de l'kapelo,
 La kruco de l'maristoj, ruĝfarbita,
 Kiu, en jaro kiam malvarmego
 Frostigis la riveron tutan vintron,
 Mastr' Apjan' mem ĉarpentis per hakilo.
 Ĉirkaŭ la kruc' estis videblaj ĉiuj
 De l' Pasion' instrumentoj : la lanco
 Kune kun spongo, hostio, kaliko,
 La robo skarлата kaj la lanterno,
 La najloj, la martelo, la tenajloj,
 La kor', la sankta vizaĝo, kolombo,
 Kolon', la galo, la vipo, la kano, *
 La nuda glav', la mortint' revivanta,
 Johan', la Bona Patrin', ŝtupareto, **
 Pokal', fergantoj, ĵetkuboj, monujo,
 La serpenteg', la sankta sun', la luno,
 Kaj kok' kantanta supre sur la kruco.

VII

Nun kantu, kok'! Apenaŭ ektagiĝis.
 Por forvetur', ek ! Tuj moviĝas ĉiuj
 Barkveturistoj por descend-navigo.
 Kun kargo por la Beŭkajra foiro *
 Samtempe iros hodiaŭ cent ŝipoj.
 Al vi ! Al mi ! Vete, por ĉiu temas
 Gajni la ŝafon : ĉe l'foir-herbejo
 L'unua ŝip', ĉu barko, ĉu tartano,
 Kristan-droniga galer' Berberia
 Aŭ olda ŝelaĉ' kun legitimaĵo,
 L'unua en la havenon veninta

* La galo : la spongo trempita en galo.

** Johano : la apostolo. La Bona Patrino : Virgino Maria.

*** En Beŭkajro-ĉe-Rodano (Beaucaire), jam en la Mezepoko kaj longe plu, okazis ĉiujare fama internacia foiro.

Post kanonpafado, de la Beŭkajranoj
 Ricevos por bonveno belan ŝafon.
 Haste kaj emocie, en konfuzo
 La ŝarĝportistoj, la barkanoj portas,
 Aranĝas, amasigas, vice kargas.
 Pontonoj knaras; kaj la navigantoj
 Al parencaj, edzinoj adiaŭas.
 - Ĉu pretaj ? - Pretaj ! En l'amas' la mastroj
 Iras deligi de la feraj ringoj
 Siajn barkojn, kaj, solene levante
 La larĝan ĉapelon, kun krucosigno
 Kaj brakojn supren, mastr' Apjan' unua :
 - En nom' de Dio kaj Sankta Virgino,
 Al Rodan' : kriis li per tondra voĉo
 Aŭdita tra nebulo ĝis la bordoj
 Lontanaj de l'Liona rivero.
 La viroj, demetinte la kapveston,
 Sin krucosignas per fingro trempita
 En la granda sanktakvuĵ', ĉiujare *
 Ĉe l'procesi' benita laŭkutime **
 Sub la ponto de la Sankta-Spirito.
 Nun ili krudaforte per remiloj
 Kontraŭ la kajo kune forpuŝegas.
 Mastro Apjan' mem, stare sur la pobo,
 Stirilon tenas kaj direkton donas.
 Liaj longaj haroj en plektaĵetoj
 Grizetaj sub ambaŭ tempioj falas,
 Kaj du grandaj ringoj el oro pendas
 De la oreloj. Kruroforke alta,
 Per siaj brilaj okuloj li vidas
 Sur ĉiu bark' ĉu ĉio glate iras.
 Dume, ligitaj unu al alia
 Per la longa kuniganta tirkablo,
 Drivante en la gargarbru' de l'akvo
 Intertreniĝas vice ĉiuj barĝoj.

* Rodano, rigardata kiel pelvo por benita akvo.

** En Pont-Saint-Esprit.

VIII

Sub la ŝirmo-tukegoj el dreliko
 Trianguloj, en azendorsa formo,
 La veturantoj, pakajoj kaj varoj
 El ĉiu speco kaj ĉiu deveno,
 La belegaj Lionaj silktekstaĵoj,
 La led-rulaĵoj, garboj el kanabo,
 Ĉio kalkulita kaj registrita
 De la skribist' en vetur-dokumentoj,
 Kaj ĉiuj industriaj produktaĵoj
 De la nordo tie kuŝas abunde.
 Sed Rodanon kovras densa nebulo :
 Vi tranĉus ĝin per tranĉilo. Ĝi kaŝas
 La tutajn bordojn ĝis nevidebleco.
 Ne plu vidiĝas la montet' Fuvjera *
 Kun la preĝej' dupinta sur la supro.
 Kaj la melankolio de l'foriro
 Estas pli peza; tie for, sudlande,
 Ĉe l'Ajgomorta, Beŭkajra kanaloj, **
 Por kargi per fajna tritik' Tuluza,
 Vinoj de Langvedoko, sal' de maro,
 Kiel longe ili restados fore
 De l'idoj kaj edzin' ? Tri, kvar monatojn...
 Kaj tamen ja feliĉe, se, revene,
 Altiĝ' subita de Ardeŝ', Duranco, ***
 Al iu sovaĝega Gardon-ŝvelo ***
 Ne eksplodege dikigos Rodanon,
 Kaj se, kun la ekipaĵaj ĉevaloj,
 Ne necesos, en l'akvomolaj teroj
 Padelo, enŝlimiĝi ĝis la brusto !
 Kaj kiam mistral' monatojn muĝadas,
 Obstine haltigante niajn barkojn !
 Kaj ŝanĝiĝema gruz', kiu sin kaŝas
 Kaj ne antaŭvidite vin grundigas; ****
 Aŭ la sekeco kun malaltaj akvoj,
 Kiu, tutan someron, sur la sablo
 Retenas la disajn ŝipojn senmovaj !

* La monteto de Fourvières en Liono, sur kiu staras fama baziliko kun du sonorilturoj.

** Ajgomorto : Aigues-Mortes (Mortaj-Akvoj)

*** Ardeŝo, Duranco, Gardono : alflusaj riveroj al Rodano.

**** vin : france kaj provence, "vi" ofte anstataŭas "oni".

IX

Atentaj, la pruisto, la piloto *
 Blindpalpas, esplorante la paslokojn,
 Por ke la barkoj sur iu gruzejo
 Ne grundigu. En la obskura akvo
 Pruiŝt' Johan' Roĉo ĵetas sondilon,
 Longan salikstangon senseligitan
 Krom kelkaj ringoj intence lasitaj
 Por mezuri de l'akvo la profundon.
 - Futo ĝuste ! Minus du koloroj ! - Felpu,
 Benita Ŝton', se ne la barko tuŝos ! **
 - Fut' large ! - Nu, jen ni sur bona vojo.
 - Pli ol futo ! fut' kaj duon' ! La viroj
 Malstreĉas la tenadon de l'stirŝtango.
 - La suverena ! - Bone ! en sekuro... ***
 En longa vico tra la riverbrakoj,
 Sub la konduk' de l'granda barko niastra
 Iranta kape, prudente, majeste,
 La trenajar' kun siaj blankaj tendoj,
 Sekvante la fluon, kiu ĝin portas,
 Iras bonvoje. Apud la kapelo,
 Starante sur la ferdeko, nudkape,
 Mastro Apjan', kun larĝa krucosigno,
 Laŭtavoĉe, por ke ĉiu lin aŭdu,
 Kun la ĉapelo en mano, ekdiras
 La preĝon matenan : - Ho patro nia,
 En la ĉiel' sanktigu ĉia nomo !
 Li diras. Ĉiuj viroj eksilentis
 Genuante aŭ klinante la kapon.
 Ilin blindigas la blanka nebulo
 Kaŝanta la montojn kaj salikejojn,
 Kiuj la riverlongon akompanas;
 Kaj certe duonblinde ili iros
 Ĝis Ĝivorso, eble eĉ ĝis Vieno.
 Li daŭrigis : - Venu ĉia regado,
 Kaj ĉia volo fariĝu alvale
 Kiel almonte. Ĉiutagan panon

* pruisto : barka vicmastro, kiu sin tenas sur la pruo.

** Benita Ŝtono : roko ĉe Rodanbordo sude de Liono.

*** La suverena : La tuta profundo ĝis kaj super la lasta ringo de la sondostango.

Donu al ni hodiaŭ. Niajn ŝuldojn
 De ni demetu, kiel ni mem ankaŭ,
 Kiu ajn al ni ŝaldas, ni kvitigas...
 Interrompiĝas li : - Ho ! bovĝardisto,
 Tondro de Dio ! vi dormas, pigrulo !
 Tiujn ĉevalojn supre, vi ne vidas,
 Strangoliĝantajn inter siaj ŝnuroj ?...
 Preĝante plu : - De tentado nin gardu,
 Kaj el malbon' tiru nin. Tiel estu !

X

- Ho miaj filoj, sur l'akv' onde svarma,
 Nun diris plu la mastro de Kaburlo,
 Kio ni estas ? Vidu : nur ludilo
 De la nebulo, de l'rifoj ĉi sube
 Kaj de la gruz' en kiu ni grundiĝas...
 He ! kiu scias pri la mishazardoj ?
 Navigu, kiu volas lerni preĝi !
 Bela ekzemplo, tiu sensenculo,
 Kiu en mil okcent tridek, descende,
 Kompatindulo ! pafis per fusilo
 Al granda sankta Krist' en la kapelo
 De l'Ampuis-kastelo ĉe la bordo.
 Li rompis brakon, jes. Sed la pinelo *
 De la malbona ul', post kelkaj ŝanĝoj, **
 Ĉe Ponto San-Spirita frakasiĝis...
 Kaj li en l'akvo gluta faris truon !
 Dume Kaburlo, post la preĝa diro,
 Ĵuse impetis en l'arkipelagon
 De l'Granda Kapro, verda de salikoj.

* pinelo : plata barko (vd pĝ 13).

** ŝanĝoj je piloto : ĉe malfacilaj pasejoj loka piloto venis sur la
 ĉefbarkon por helpi la manovron.

Kanto Dua
La Princo de Oranĝo

*

XI

- Al Reĝolando, ho ! nun krias voĉo.
- Jen ! Jen ! sur la stirilo ili premas,
Kaj la pruist' al tero ĵetas kablono.
- Vermezono ! Ligu ! Je l'albordiĝo
Subite blonda junulo aperas,
Kaj lerte sur la grandan barkon saltas.
Kiu li estas ? Princo de Oranĝo,
Plejaga filo de la reĝ' Holanda,
Kaj plej diverse konjektas la langoj.
Laŭ unuj, li estas nur ventcerbulo,
Ili asertas, Arleken' fendkapa,
Kiu konfliktiĝinte kun la patro,
Migris por kuri for al aventuroj,
Al diboĉado kaj al fiaj amoj
Tra multaj landoj. Sed, laŭ la aliaj,
Li tiom laboregis super libroj
Kaj tiel obstinegis en studado,
Ke, povrulet' ! li falis en malsanon
Kiel infano, kiu cindron manĝus;
Lin kuracistoj sendis al Rodano
Por trinki la sunlumon refortigan
Kaj viglan blovon de la kot-manĝanto.

**

* Tiu princo Vilhelm estas mita persono elpensita de Mistral, kaj respondas al neniuj historiaj personoj.

** kot-manĝanto : la mistralo, norda vento, kiu sekigas la koton.

XII

De sia reĝoland' ombra kaj marĉa,
 Kie en la nebulo dronas Rejno,
 Iam, se nur li sanon rericevos,
 Surmetos li la kronon kun iridoj.
 Sed mankas multe, nun, ke li aspirus
 Preni en ŝarĝon tuj la hom-reĝadon,
 Ĉar jam antaŭe li estas naŭzita
 De la intrigoj, kortegaj manovroj,
 De l'etiketo, pomp', ceremonioj
 Kaj de l'enu', kiu l'animon ronĝas.
 Li enkapigis al ŝi amfrenezon,
 Fantaziaĵon de princo revema.
 Antaŭimagis li trovi survoje
 La elvolviĝon de l'Najaĉ' antikva
 Kaj l'akvofloron apertan sur l'ondo,
 Sub kiu kaŝas sin la nimfo nuda,
 La nimfo bela, pura, klara, svaga,
 Kiun la mens' konceptas kaj deziras,
 Kiun penik' repentras, kaj eterne
 Poet' en siaj vizioj elvokas,
 La nimfo alloga kaj voluptema,
 Kiu, ĉirkaŭ naĝant' en akvofluo,
 Lasas flosanta la belan hararon,
 Kaj sur la ond' fandiĝas en konfuzo.
 Kaj de kanal' al kanal', tra Saono
 Descendis li de sia flandra lando,
 Kiel de l'nordo nebula la cignoj
 Riagas aŭtune al lag' Vakareso.

XIII

Ĵus saltis li paleta sur Kaburlon,
 Manpremis al la mastro senfiere,
 Ĉiun aliras senceremonie,
 Al Kundrianoj donacas cigarojn
 El sia lando, balzame odorajn,
 Kaj senafekte ilin ĉiujn vice
 Trinkigas el sia flasketo brandon,
 Per kiu fordisiĝas la nebulo.

* Lago Vakareso : étang de Vaccarès, en la deltinsulo Kamargo.

- Tiu, ili diras, estas el niaj !
 - El viaj ? li respondis, ja sendube,
 Kaj, kamaradoj, se necesas helpo,
 En nia lando ni ne timas akvon,
 Kaj scias tiri remilon sufiĉe.
 Ravitaj, la barkanoj lin ĉirkaŭas
 Kiel kortego reĝa, rigardante
 La rufe blondan barbon, fajnajn manojn
 Kaj la ĉizitan floron, kiu pendas
 De la ringo de la poŝhorloĝo.

XIV

Sed Mastr' Apjan' ekkriis : - Imperien !
 La barko ĉefa kaj ĉiuj sekvantaj
 Je la unua rudromov' maldekstren
 Ekiris drive. Sur la akvo longa,
 Dum la barkar' vojiras propramove,
 La blonda princ' konversas kun barĝanoj.
 Bele rakontas li, ke de Holando
 Filo de l'reĝ', li iras en Provencon
 Serĉi la floron de sia insigno :
 - Flor' de mister', li diras, nekonata
 De l'terloĝantoj, ĉar nur en la akvo
 Estas ĝia sid- kaj elvolviĝ-loko;
 Nomata de la Flandroj flor' de cigno. *
 En ĉiu lando, kie ĝi troviĝas,
 Gajas la viro, belas la virino.
 - Tio ? kun miro diris la ŝipistoj,
 Princo, ĝi estas la flor' de Rodano
 Sub l'akvo naskiĝanta, la butomo,
 Kiun Angloro tiom amas pluki.
 - Angloro ? - Nu, venu ĉi, Johan' Roĉo,
 Kaj klarigu al li, kiu ŝi estas.
 - Vi kiel mi povas pri ŝi paroli,
 Grumble-abrupte respondis junulo
 Splisanta kunligafon de ŝnurego.
 - Ho ! ili kriis, malbona krudulo !
 Eble ĉi-nokte vi en songo vidis
 Ŝin en flirtado kun iu fiŝisto.

* flor' de cigno (Zwanenbloen) = butomus umbellatus.

- Vane vi diras kaj klaĉas, ja vere,
 Rebatis la knabeg', sed en densejoj
 De Malatra', kie Ardeŝo fosas, *
 Kiam stirante vi pasas apude,
 Kaj sur la sablo fajna, nudpiede,
 Vi vidas ŝin ridi kun mordaj dentoj,
 Ha ! Certe multaj el vi, se ŝi signus
 Per sia fingro, plongus en la akvon
 Por iri kison meti sur la blankon
 De ŝia piedet'...

XV

- Ho ! certe tiu
 Knabino, diris maestr' Apjan', diable !
 Iam havigos al vi kapoturnon !
 Nur pri ŝi temas; ŝi ja ne malbelas,
 Sed por tiel pri ŝi laŭtege krii,
 Ne estas akvo ĉi tie ĝis kolo ! **
 Kaj en kompar' kun nia knabinaro
 Fortika, pufa kaj kazee blanka !...
 Reĝlandan ! Cele al Ĝivors'. La barkoj
 Al kajo tuŝas. Kun kusen' surdorse
 La barbohavaĵoj portistoj enŝovas
 En la "savoĵajn" plensakojn da karbo;
 Jen amasiĝas multe la feraĵoj,
 La ladoj, la falĉiloj, tondilegoj
 Kaj la famaj fusiloj san-stefanaj.
 Kaj denove antaŭen ! Ĉiuj kune !
 La blonda princo jam nun eklaboras,
 Ĉar li jam diris, ke li volas kompane
 Kun la riveraj mastroj kaj ŝipanoj
 Kunvivi, remi, manovri, labori
 Kiel iam Peĉjo, la rusa caro ***
 En Zandam, kiam juna li dungigis ****
 Kiel kompan-ĉarpentisto, por lerni.

* Malatrao konsistas el du insuloj ĉe la enfluejo de Ardeŝo en Rodanon.

** Ne konvenas krii kiel dronanto vokanta por helpo.

*** Caro Petro I-a la Granda (1672-1725).

**** Zaandam, en norda Nederlando.

Sed vero estas ja, ke pro impulso
 Sanga, Vilhelmo (ĝi estas la nomo
 De l'bela kronprinc' de l'flandra nacio)
 Volas travadi Rodanon, ekkoni
 La neston, la kovejon, teron faman,
 Kiu transdonis nomon brile gloran :
 Oranĝo kun la fama Glorieto,
 Palaco kaj fortreso de l'praavoj
 En la sovaĝa temp' de l'Saracenoj.
 Li volas vidi ĉiun pasolokon,
 En kiu spuron lasis tiuj princoj,
 4 Kies korneto sonis en la strofoj
 De l'kavaliraj kantoj. Kaj li volas
 Iniciĝi al la lingvo, en kiu
 Beatrico, Romans'anino, flustris
 Sian lesbecan poemon, la lingvo
 Gaja, en kiu grafino de Dijo *
 Verkis amkanton al Rimbald' Oranĝa. **
 Li legis. En la interno li sentas
 Je momentoj la noblan ambicion,
 Rekreskon de l'sopiregoj frenezaj,
 Kiuj al glor' ekzaltis liajn patrojn,
 Kaj de l'perditaj konkeroj bedaŭron.
 Sed pro kio bedaŭro, se de l'avoĝ
 Li povas la sunan teron repreni
 Per la akiro de rigard' avida ?
 Ĉu ni bezonas glavon sparke brilan
 Por rabi ĉion, kion l'okul' montras ?
 Kaj ĉu ja estus tro bele kaj simple
 L'Oranĝan kronofloron rekonkeri,
 La feŭdon, kiun tenis la Baŭksanoj,
 5 Kaj fine l'imperion Bozonidan
 6 Daŭrantan plu en la kri' : Imperien !
 Nun fratumante kun la popolanoj,
 Kiuj ĝin gardis, la krion memoran ?

* Dijo : Die, urbeto ĉe rivero Dromo. Tiu grafino de Dijo estas trobadorino de la XII-a jarcento.

** Raimbaud d'Orange, trobadoro (1144-1173).

Pri populara homo oni diras :
 - Jen estas reĝo, nia reĝo ! Tondro !
 Kion vi volas pli ? Tiom li havu !
 Ĉar siavice mortas la kasteloj,
 Kiel ni vidas sur ĉiu monteto;
 Ĉio disfalas, ĉio renoviĝas...
 Sur viaj suproj, sensanĝa Naturo,
 Tamen rekreskas daŭre timiano,
 Ĉiam paŝtistoj kun paŝtistinetoj
 Tie reĝuos siajn amoludojn.

XVII

Iom post iom la nebul' disiĝas,
 Malkovras al taglum' la fuman valon
 Kun la deklivoj verdaj de l'montetoj,
 Inter kiuj vage fluas Rodano.
 Mastro Apjan' kontemplas la vizaĝon
 De l'nova suno nin fortiganta,
 Krias : - Unu plia ! Ĉiuj barkanoj
 Ĉapelon levis sammove; vigliĝas
 La pasaĝeroj al ĝio gapantaj,
 Kiam subite, ĉe turno, belega
 Aperas plene l'antikva Vieno
 Kiel altar' sidanta sur monteto
 De l'nobla Daŭfenlando. Jen, famega,
 7 La tombo de Pilato pinte stara.
 Aŭdiĝas la feltistoj, kiuj frapas
 Por en fabriko pretigi la drapojn.
 "Poplit-rompulo", la altaĵo kruta,
 Etendas ventumile la dometojn,
 Kaj la sonorilturoj kaj la temploj
 En la sunlumo inunda, belega,
 Skribas la noble gloran historion
 De l'pasintec' de l'urbo imperia.

XVIII

Kun sia mapo en mano, la princo
 Tiam ekkriis kun entuziasmo :
 - Saluton, sun-imperi', kiun bordas
 Kiel arĝenta rand' Rodano brila !

* Unu plia (mateno, aŭ tago).

Imperi' de sateco, de gajeco,
 Fantasta imperio de Provenco,
 Kies nura nom' ĝojigas la mondon !
 Esti naskita en temp' de bataloj,
 De baraktad', konfuzeg', aventuroj,
 Kiam, kun spad' en man', valora viro
 De sia nura mem konsilita
 Povis, en la fermento de l'tumulto,
 Tajli por si libere reĝolandon,
 Jen tio ja, ĝi estas vera ŝanco !
 Kiel Bozono, grafo de Vieno,
 Kiu, mil jarojn jam en la preĝejo
 De San-Maŭric', portas sur sia tomo
 La skribateston de sia aŭdaco,
 De sia grandanimeco kaj gloro !
 Princoj de komedio, palaj reĝoj,
 Ni, senpersonigitaj, nun en ombro,
 Kun niaj magraj legaj atributoj
 Pasas tra l'historio ternivele,
 Ŝŝ, Ŝŝ, kaŝante la kronon kaj sceptron,
 Kvazaŭ timante esti en videblo !
 Sed vi, grafo Bozon', antaŭ la barbo
 De l'potenculoj franca kaj germana,
 Ĉe Rodan-flank' per salto elrajdante :
 - Mia ĉevalo, ek ! ek ! sur la montoj
 Kriante : - Vivu Provenco ! levigas...
 - Jen, diris ĉiuj en la miksbatalo,
 Jen estas viro ! Kaj la episkopoj
 Kaj la baronoj vin aklamis reĝo !

XIX

Dum en fervor' la princo ekzaltiĝis,
 La riveristoj, ilin ruluŝante,
 Enbarkigis barelojn da biero
 Kun fundo bele blanke gipsumita,
 Biero blonda kaj bruna, ŝaŭmanta,
 Kiun, dum tuta la foira tempo,
 En la bazar' kaj tavernoj Beŭkajraj,
 Frandos la gorgoj de la soifantoj.
 Nun senprokraste, ĉar la tempo urĝas,
 Ili turnis la rudron, kaj Kaburlo,
 Tirante poste sian blankan floton,
 Gaje reiras laŭ la riverfluo.

Sed sur la koksoj, jen, de la montetoj,
 Ili ekvidis, bone palisitajn,
 La orajn vitojn de Kosto-Rustido,
 Kaj tie for kaj alte, dekstraflanke,
 De Pilat-mont' la tri dentojn bluetajn.
 Kaj jen Kundrio. Ili ĵetas l'ankron.
 Tie naskiĝis ili preskaŭ ĉiuj.
 Sur la sablej', por atendi la patrojn,
 Kvar horojn jam, formikar' da infanoj
 Nudaj aŭ duonnudaj tie ludas;
 Unuj platajn ŝtonetojn resaltigas,
 Aliaj bataladas per ŝtonĵetoj.
 Antaŭ la domoj, laŭlonge de l'akvo,
 Ĉe l'pordosojoj la povraj edzinoj
 Jam de l'mateno estas en atendo
 Por vidi ĉe l'kaj' siajn virojn pasi.

XX

- Blandino, kuru, via patr' alvenas !
 - Bontagon, Mastr' Apjan' ! - Di' al vi donu !
 - Ĵetu la ŝnuron, ke mi vin alligu !
 - Diru al Marinjo, ke ŝi per vino
 El Ampuis' plenigu tiun flaskon !
 Ĉu ne Damjano ? Jen liaj ĉemizoj !
 - Greta, Mieta, kion mi reportos
 De la foir' por vi ? - Portu, Ribori,
 Kelkajn ringojn el kreno kaj el vitro,
 Tiujn, kiuj surhavas ruĝan muson.
 - Jes. - Al mi portu por la knabineto
 Pupon, el tiuj, kiujn oni fleksas.
 - Jes. - Kaj por mi alportu "ĝimbeletojn"
 Bonspecajn, trakreditajn per fadeno.
 - Jes. - Al mi portu... Ĉiuj vete pepas;
 Mendoj kaj rekomendoj plej diversaj
 Kruciĝas inter barkoj kaj fenestroj :
 - Diru al via av', ke li aĉetu
 Por vi en roza kofret' fratineton,
 He Klaŭdĉjo ! - Avo, kun vi al Beŭkajro
 Mi kunveturu ! - Venontfoje, knabo !...

* Fama vitejo Côte-Rôtie : Montflanko rostita (de la suno).

** ĝimbeletoj : ringformaj kukoj.

- Nu, fartu bone ! Bonan aventuron !
 - Fortika tenu vin, onklino Ĉajsa !
 - Kaj vin, ho Joĉjo, gardu de l'koboldoj,
 De l'fajro Sankta-Elma, de l'Ulurgoj *
 Vagantaj nokte sur la Aliskampoj ! **

XXI

Poste, adiaŭ ! la sudo allogas;
 Endas, cetere, ne misuzi tempon
 Por veni unuaj en ter' Arĝenca ***
 Kaj ŝafon gajni. En la flu' de l'akvo
 Ankoraŭ tute blua de l'turkisoj
 En la Ĝeneva Lago kolektitaj, ****
 Dum la bele blankaj tendoj iradas
 Longvice, kiel cigna flugantaro,
 La princ' holanda volas ĉion scii :
 - Ĉu longe daŭros la descendo, mastro ?
 Mastro Apjan' gorgon skrapas, feliĉa
 Havi okazon iom ĉiĉeroni :
 - Du tagojn, princo, aŭ tri maksimume,
 Se sur la voj' okaze estos bremsa :
 Nebulo, por ekzemplo, kia tiu
 Kiun ni havis ĉi-matene, densa
 Tiel, ke ne videbliĝas la vojo...
 Ĉar oni ne bufonu kun la rokoj,
 La rifoj, ŝeroj, kaloj kaj verukoj,
 Aŭ tiuj danĝeregaj gruzobenkoj
 Dise kuŝantaj sub l'akvo-sulketoj.
 Sen antaŭzorg' la barko tie skrapas,
 Krevas kaj trinkas, floŭ, floŭ, sur gruzejo;
 Se ne paroli pri bat' kontraŭ ponton
 Kaj pri la pramoj barantaj la vojon...
 Sankt-Nikola', patrono de l'rivero,
 Nin gardu longe plu !

* fajro Sankta-Elma : vaglumo. Ulurgoj : vd Kanto Sepa, LX.

** Aliskampoj : nomo de romia kaj prakristana tombejo en Arlezo.

*** Arĝenco : regiono ĉirkaŭ Beŭkajro.

**** Ĝeneva Lago, aŭ Lemanlago.

XXII

- Reĝlandan ! Fulmo !

Kriis Apjan' rompante sian diron :
Vi do ne vidas la San-Petr-insulojn,
Fripono Dio ! kiuj vin trabaras !
Li plue diris : - Kara princo, sciu,
Ke se ja, kiel asertas proverbo,
Ĉiuj sanktuloj helpas por descendo,
Ankaŭ en la descendo renkontiĝas
Malhelpoj, incidentoj, mishazardoj.
Tamen, se ĉio belas, ordinare,
Kaj eblas eĉ en la klar' de la luno,
Ekkoni per okul' la ĝustan vojon,
De l'kajoj de Lion' al basaj bordoj,
De Provenca Rodano, en du tagoj
Fariĝas en somero la kurado :
Facila, tio ! Sed ĉe la ascendo,
Sinjor', kiel penige ! Ambaŭborde
De la platbarkoj, kiujn ni remorkas,
Vidu, kiel anĉovoj premegitajn,
Tie ni havas niajn tirĉevalojn :
Dudek fortegaj kuploj elektitaj, *
La floro de la ĉarolaj bredejoj, **
Kiujn vi vidos poste, kontraŭflue
Strebi, superbaj, longe de l'rivero.
Ne dirus mi, ke estas sur Reĝlando
Aŭ Imperi' nenio komparinda
Al mia ĉevalar', sed mi asertas,
Ne venkus ilin dudek mil kvintaloj.

XXIII

- Kaj kiel longe por la reascendo ?
- Dependas : en somer' sur l'akvo glata
Povas sufiĉi dek ok, dudek tagoj.
En la mallongaj tagoj, dum la vintro,
Ĝis tridek kvin, eĉ kvardek ja necesas.

* Ĉe Rodano la "kuploj" estis kvarĉevalaj.

** Charolles, urbeto norde de Liono, meze de bov- kaj ĉeval-
bredejoj.

Sed estas terure, kiam Rodano
 Pufŝveligita de pluvoj aŭtunaj,
 Aŭ pro la fortaj orientaj ŝtormoj,
 Kiuj per tajdo ĝin kontraŭe puŝas,
 Kun akvegoj malklaraj elbordiĝas
 Super la heĝoj kaj fortikaj digoj,
 Inundante la ŝtonkovritajn vojojn.
 Ha ! Fulmotondro ! Jen estas mizero,
 Kiam, ĉe la kablo de ĉiu barko,
 Niaj ĉevaloj, kvarope tirantaj,
 Ne vidas plu la vojon, enŝlimiĝas
 Ĝispuge en tritik- kaj horde-kampoj,
 Tiel ke necesas ilin ellevi
 Per stango subŝovita sub la ventron !
 Kaj, sinjor', se endas ŝanĝi je bordo
 Por eviti iam ŝvelan riveron,
 Kiu trafluas inter la piedoj,
 Aŭ kiam endas travadi Uvezon,
 Travadi Rubionon aŭ eĉ Dromon !
 Grava laboro ja ! kontraŭ la rokoj
 En frotiĝad' la ŝnuroj eluziĝas;
 Necesas fari nodon, fari splison,
 Necesas per hakil' faligi arbojn,
 Kiuj ĝenas, kaj necesas, mil dioj !
 Per bat' de pugno, de stango, de fosto,
 Batali sur la voj' kun la kruduloj,
 Kiuj, por antaŭigi siajn kuplojn
 Aŭ "trakonfuzi", kiel oni diras,
 Perfide vipas niajn subpoplite...
 Ha ! estas taskoj por ĉiuj !

XXIV

Kaj restas

Da ili, diris la Princo ridante.
 Ĉe l'horizont', de neĝo blankigitaj,
 La suproj de Verkors' pikas la spacon.
 Nun la migrantaj gregoj de la Kraŭo
 Sin paŝtas tie sur la herboj densaj,
 La Sankta-johanet', la pimpinelo :

* Sankta-johaneto : citizo.

Pimpinelo : sangisorbo.

Ĉar al Arlezaj paŝtistoj l'uzado
 De tiuj Alpaj kaj lontanaj suproj
 Jam du jarmilojn estas konsentita;
 Kaj ĝis la Nivuleto de Savojo *
 Kaj supre ĝis la kruta pint' de Vizo,
 Kaj tie ĝis la monto Junipera, **
 Akvodislim' franca-italia,
 Al ili ĉio apartenas. Kial
 Gloriĝas la konkerintoj avidaj
 Vice imperiintaj sur Rodano,
 Ĉiuj Karlomagnoj kaj Bonapartoj, ***
 Ĉiuj Hanibaloj, Romaj Cezaroj,
 Pro la trapaso de tiuj altaĵoj ?
 Dum en ĉiu printempo, karavane,
 Dum en ĉiu somero kaj aŭtuno,
 Kun gvidaj bokoĵ la vojon markantaj
 En la tavolo blanka de l'neĝejoj,
 Kun sia tuta ŝafaro sennombra
 Kaj kun baston' en man' ludante fifron,
 La montojn ili grimpas kaj transpasas !

* Nivuleto : Neĝa Supro.

** Monto Junipera : fr. Mont-Genève.

*** Karlomagno : Carolus Magnus, Karlo la Granda.

Kanto Tria
La Descendo de Rodano

XXV

Ĉe l'havenetoj Andanc', Andanceto,
Jen alvenis la ŝiparet', kaj tie
Oni surkargis tabulojn kaj trabojn
Kaj daŭbofaskojn kaj barel-ringegojn.
Kaj inter la malakceptemaj bordoj
De Vivarez' ĉiam pli kaj pli krutaj, *
Ĉiam pli kaj pli malglataj, sovaĝaj,
Ili kruciĝas, preskaŭ tuŝe-tuŝe
Kun la ĉevaloj kaj la lanta kablo
De alia longa barkara vivo
Reascendente pene al Liono.
- Saluton ! Ambaŭflanke brakoj gestas
Kaj en la spaco moviĝas ĉapeloj.
- He ! kiel la vojaĝo ? - Laŭkutime !
- Ĉu en San-Spirit' la dika piloto ?
- Al suno li rigardis pri la horo.
- Hej ! el flasko trinkante ? - Kompreneble !
- Ĉu estas gruzo ĉe l'pont' Bagalanca ? **
- Tion la dika Toni ne aludis.
- Ardeŝo do sturmis al la insuloj ?
- Eble. - Kaj tie for, ĉe l' Granda Valo,
Ĉu multan akvon vi havis ? - Ĝisventre.
- Ĉu ne jam proklamiĝis la foiro ?
- Ne estas ŝanc' ke vi gajnos la ŝafon,
Kolegoj ! - Kial do ? - De Ajgomorto
Ni, foririnte antaŭ du semajnoj,
Vidis, apud la Sanktulinoj, ŝipon ***

* La montoj de Vivarezo plilongigas norde la propre nomitajn Cevenojn kaj konsistigas la departementon Ardeŝo.

** Bagalanco : nomo de unu el la pilieroj de Sankta-Spirita-Ponto.

*** La Sanktulinoj : Sanktaj-Marioj de la Maro, en Kamargo.

El Tunizo, dancanta super l'ankroj,
 Kaj kiu, paneinte sub la bizo,
 Atendis sudan venton por ekveli
 L'unuan tagon al haven' Beŭkajra,
 Ĝia karg' estas daktiloj, judinoj
 Kun ruĝaj jakoj orname garnitaj
 Per or-cekinoj kaj brilaj piaŝtroj.

*

XXVI

- Mi mokas, tiam diris Johan' Roĉo,
 La judinojn, figojn enkorbigitajn,
 Odorajn je langras', enfermitaĵo,
 Sur la tartanoj palpe lupreneblajn !
 Ni, al Beŭkajro ni kondukos unu,
 Kaj se, la belan dimanĉon foiran,
 Ŝi ne ricevos la belec-premion,
 Sankt-Nikola' ! mi volas, ke surkape
 Al mi la Krusol-kornoj ombron ĵetu !
 Kiu ŝi estas ? - Divenu. - Ĉu eble
 Tiu filin' de l' Malatra'-piloto,
 Kiu kribradas orpolvon el sablo ?
 - Jes. - Tiu ciganin' ? Johan-fluto !
 Knabino kiel ŝi estas "astrita",
 Portas feliĉon, kien al ŝi plaĉas.
 Kaj ho ! vin gardu, ke ŝi ne, renkonte,
 Flanke al vi rigardu ! Juna luno,
 Laŭ dir', estas kornhava kaj perfida.
 Vi estas ensorcĉita, Johan' Roĉo !
 Kriis la aliŝipar-veturistoj,
 Aĉetu poton, kudrilojn boligu !
 - Tiru, Marius' ! Puŝu la stirilon !
 Kun manoj funelforme rondigitaj,
 Dum momento plu, de barko al barko,
 Ili de for ĵetas pikajn parolojn.
 Sed la bargar' de maestr' Apjan' rapide
 Fornaĝis jam sur la akvo fiera.

**

* Cekino, itale zecchino, de araba deveno : ormonero.

** Krusol-kornoj : nomo de la ruino de Crussol-kastelo.

*** Akvo fiera : akvo alta, ĝisborde aŭ elborde fluanta.

XXVII

De la vidaĵoj, kiuj lin ĉirkaŭas,
 De la mirinda valo, de l'rubajoj
 De krutaj rokoj kun siaj ravinoj,
 De glormantelaj malnovaj kasteloj
 Kaj de la varmo de l'aer' lumanta,
 Princo Vilhelmo estas kor-ebria,
 Kaj baldaŭ la puls' de amo naskiĝos.
 - Mi vidos ŝin, li pensas, la diecan,
 Kies beleco aŭ ĉarmo sovaĝa
 Ŝajnas fatamorgani sur Rodano.
 Angloro, la knabino nekonata,
 Pri kiu ĉiuj parolas kaj songas,
 La sabloborda perlo, kiu lumas
 Al la spirito kiel al okuloj,
 Kaj - kial ? ĉar mi ŝin neniam vidis -
 Same al mi dancadas en la kapo !
 L'akvo brilas kaj ridas. Galinoloj,
 Hirundoj, per flugiloj kvazaŭ tuŝas
 L'ondon fuĝantan sub la sun-turniĝo;
 Kaj de muelil' sur barko naĝanta
 Foje la muelisto, aŭ fiŝistoj
 Supren tirantaj la baskulo-reton,
 De for al for brakomove salutas.
 Sed en la sangon de l'oldaj kaj junaj
 La varmo posttagmeza metos pigron.
 Jen Sankta-Valjer' kun siaj terasoj :
 Supre speguliĝas l'ombro famega
 De Diana, bela ensorcistino *
 De reĝ' Francisko, la moŝta dukino
 De Valencujo, kie fluas Dromo,
 Grafino de Estelo la klarega,
 Kiu amlogis la kortegon francan.
 Sed Diana mortis kaj retrofuĝas
 En la mov-bildo de ĉio forpasa,
 Kun ŝipoj kiel anseroj naĝantaj;
 Kaj nun estas Anglor', la etulino,
 La nudpieda sur la sablo mola,
 Anglor' noveta, ŝi ja estas vivo,
 Rigard' al estonteco, fantazio
 De ĉiuj veturantaj laŭ la fluo !

* Diane de Poitiers.

XXVIII

Vilhelmo, ne plu rezistante, iras
 Al Johano Roĉ' : - Aŭskultu, mi aŭdis,
 Ke Anglor' estas bela, al vi plaĉas ?
 - Sinjor', ŝi estas ja tiel agrabla,
 Ke ĉiu mastro, kiu ŝin renkontas,
 Timas, ke ŝi konfuzos per rigardo
 Magie forta, lian ŝipanaron...
 Laŭfame havas ŝi malic-okulon !
 - Kaj vin, inter aliaj, la Sireno
 Tenas kaptita en siaj retmaŝoj ?
 - Mi ? Ja verdire, se temus pariĝi
 Kun tiu silvieto de salikoj,
 Eble mi ne rifuzus. Sed en kapo
 Ŝia estas muŝ' ! Neeble alie !
 Sciu : povas veni amindumantoj
 Multaj ĉirkaŭ ŝi kanti galantaĵojn...
 Ŝi ne aŭskultas, kvazaŭ ili fajfus.
 Nur unu amon : vagi sur la bordo
 Soleta, sin speguli en la akvo,
 Foje pluki el ĝi la Rodan-floron;
 Kaj nur unu taskon. Divenu kiun ?
 Kribradi sablon de river' Ardeŝo
 Por serĉi el ĝi (formika metio !)
 Eretojn de oro en ĝi brilantajn.
 - Bone ! la sinjoreto gaje kriis,
 Ĉu ni ne estas ja la Argonaŭtoj
 De Kaburlo ? Nu, sur voj' ni konkeros
 Medean kun la Orfelo... Antaŭen !

XXIX

Johano Roĉ' tiam, streĉante gambon
 Je la komando de l'mastr' : Imperien !
 Sin apogante kun ĉiuj kunuloj,
 Per stiromovo puŝis al barkvicon
 Al la fama monteto Ermitejo *
 Por kargi barelon da fajna vino.
 Al Reĝa Tablo ili proksimiĝas,
 Kaj mastr' Apjan', reĝo de l'riveranoj,
 Laŭ la promes' farita je l'föriro,

* Côteaux de l'Ermitage : fama vitejo.

Devas oferi vinon de reĝeco.
 Ĝi estas, tiu Reĝa tablo, disko
 Plata el viva rokaj' cirkloforma
 Antaŭ Turnon', meze de la rivero;
 Laŭdire, tie pasante, tagmanĝis
 Reĝo Sankt-Luiz' voje al milito
 Diablofore kontraŭ Saracenoj;
 Kaj tie manĝas nun la kronportantoj
 El Kundrio. Ĉiuj barkoj en rondo
 Ĉirkaŭ la granda tablo el rokaĵo
 Sin ankris pru-antaŭe. El kareno
 Elŝprucas tuj kaldronoj kaj marmitoj,
 Tritika pan', ligaĵoj de kolbasoj,
 Kaprin-fromaĝ'. Jen manao falanta !
 La tranĉilpintoj pikĉerpas el potoj.
 Ili stare manĝas. Tiel kastoroj
 Voras - kaj, Dio-dank' ! se mankas tuko,
 Ne mankas apetito ! La ĉefmastro
 Rajde sursidas la plenan barelon,
 Kaj sur la tablomezo li prezidas;
 Per unu mano tenante la kranon,
 Por ĉiu li ŝprucigas en la tason
 La ĝojan moston brilan en sunlumo. *
 - Vivu la reĝ' ! Ili finas per supo,
 En la brogaĵon versas festan vinon
 Bonan por la stomako, kaj, laŭmode,
 Ĉiu gluttrinkas el sia telero.

XXX

Poste, la rondodanco de l'Ejreto, **
 Ek ! Saltu ni dum barko ŝanceliĝas !
 Jen kanto : "La knabinoj de Valenco
 Ne scias amori, sed de Provenco,
 Tage kaj nokte !" - Toston al Angloro !
 Krias Vilhelmo - Mi sen plion scii,
 Kun tiu mosto de l'krutaj vitejoj
 Trinkas unue al la Rodan-floro;
 Kaj duan toston al Rodano mema,
 Kiu spegulas la floron misteran !

* "Mosto", poezie uzata anstataŭ "vino".

** Provenca popoldanco.

Kaj tria estu al la bela suno,
 Kiu invitas nin al vivo ĝoja !
 - Infanoj, diris maestr' Apjan', la vivo
 Estas trair' kiel tiu de barko :
 Ĝi havas tagojn belajn kaj malbelajn.
 En la ridantaj saĝe vi konduku,
 En la rompantaj mildume. La homo
 Naskiĝas por laboro : li navigu...
 Al mi ne diru pri tiuj pigruloj
 Neniam kontentaj ! Kiu baraktas,
 Ĉe monatfino ricevos salajron,
 Sed kiu timas la haŭtovezikojn,
 Plonĝos en l'akvokirlon de mizero.
 Jam kvindek jarojn almenaŭ, sur barĝoj
 Vidinte ĉiajn aferojn, mi pensas,
 Ke inter Imperio kaj Reĝlando
 Kiel inter rezigno kaj trofido,
 Necesas teni mezon. Ni festenis :
 Nu, knaboj al bona Dio ni danku;
 Poste, neniu manku ĉe l'posteno.

XXXI

- Vivu Anglor' ! ekkriis plu la princo
 De bona Rodan-vino gajigita.
 Kaj dum la suno nun malsupreniras
 Post l'ebenaĵo de Glun' kaj la montoj
 Ombrantaj okcidente la riveron,
 La barkovic' kun siaj tendoj blankaj
 Trankvile, ĝoje kaj pace defilas
 Por iri al la halto ĉe Valenco,
 De kies preĝejtur' en klara spaco
 Sonas la nom' de Sankt-Apolinaro.

*

* Sankta-Apolinaro : iama episkopo de Valenco, al kiu la katedralo estas dediĉita.

Kanto Kvara
La Venecianinoj

XXXII

9 Dorm' estas bona. Sed, je la tagiĝo,
Dum vaporigás nebul', aŭ, ni diras,
La flor' de l'akvo, sur la Rodan-fluo,
En la haven' revivas la movado
Kaj la blutado de l'ŝip-mueliloj.
En la ruino de sia kastelo,
Krusol' en for memoras la koleron
De baron' de Atretoj. Se verdira
Estas la rakont', en cisterno plena
De sang' de katolikoj masakritaj,
Li igis siajn filetojn sin bani
Por ankri en ilia kor' malamon.
Iam nest' de baronoj, nun de nizoj !
Sur la dua bark' en Valenc' alvenas
Bela svarmet' de gajaj sinjorinoj
Kun alta harar' bruna aŭ blondeta
Sub granda kombilo kun perlorando.
Du kavaliroj ilin akompanas
Kun, sub la brako, muzikinstrumentoj,
Vaska tambur', mandolo, violono.
Ĉiuj ĵargonas, ridas kaj kluketas,
Piedojn implikante sur la barko
En la amaso de ĉiaj pakaĵoj
De l'portistar' sur la ferked' metitaj.
Pezaj vendistoj paŝadas kun ventro,
Ĉe kiu tintas poŝhorloĝ-ornamoj
Sur la monuj' premita en la zono,
Kaj priatentas la kargo-stivadon.

Sed la barkar' ekmoviĝas. - Descende !
 Kriis la mastro, kaj, per la man' dekstra
 Levita super Rodan' - kiel pastro
 Vokanta la protekton de l' Plejalta,
 Li krucoŝignas; unu post alia
 La barkoj enviciĝas sur la fluon
 Lupe voreman, iras en la mezon
 De l'riverego, kiu portas ilin
 Facile kiel malpezajn foliojn.
 Vigligite per la ĉarmo de l'damoj
 En sia lingvo ĝoje babilantaj,
 La dikventruloj re- kaj returniĝas
 Ĉirkaŭe, kiel ĉirkaŭ ratkaptilo,
 En kiu enfermiĝis kelkaj musoj,
 Kateg' rondiras kun okul' avida.

1a Estas friske. Blovas la vent' lombarda,
 Kiu vigligas kaj koron ĝojigas.
 Lionan' paŝas al la belulinoj :
 - Tiuj fajnaj beketoj, ĉu italaj ?
 Respondo : - Si, sinjor', el Venecio,
 La urbo de kanzonoj kaj gondoloj.
 - Kaj kien vi veturas ? - Al Beŭkajro.
 - Ĉu malfermi butikon de pupetoj ?

44 - Ho ! Certe ne ! Eble de lun-kaptistoj ! *

Kaj oni konatiĝas. La fraŭlinoj
 Iras en kafej' kanti serenadojn;
 La negocisto iras por negoco :
 De orientaj bazaroj, "fondukoj", **
 De komercistoj el Tuniz' kaj Nimo,
 Marsejlaj aŭ Narbonaj makleristoj,
 Butikistoj el Ales', Uzes', Agdo,
 De la mulistoj varojn transportantaj

12 Sur la vojo de reĝino Ĝileta,
 De Aŭvernianoj kaj Limoĝianoj

13 Venantaj tra la vojo Regordana,
 En moner-tinto ili enbursigas
 La bilojn en Beŭkajro densfalantajn.

* lunkaptistoj : naivaj kredemuloj.

** fonduk, araba vorto : varmagazenoj en Oriento.

Tutan monaton estos riĉa vivo...
 Kunĝuos ĝin la belaj kantistinoj,
 Promese ! se al ili ne malplaĉas
 Iom da amuziĝ' ! La bravaj damoj
 Ankaŭ ne trenas kun si enuemon,
 Kaj al gajec' honesta kaj al rido
 Kaj al dancad' ili ne malinklinas...
 Tio, pro Dio ! ne estas diboĉo !
 Sed ili devas profite foiri,
 Ĉar vojaĝadi tra montoj kaj valoj,
 Vivteni sin, pagi la kolofonon
 Kaj tiel plu, kaŭzas grandajn elspezojn.
 Sed, for de la edzinoj, tuj la burĝoj
 Ne maĉas gadon, kaj malrigoriĝas,
 Se diri sen respekto, kiel porkoj
 Vage la tutan spacon traokupas...
 Kaj sonas ridklukado !

XXXIV

- Imperien !

Ordonas, brovojn streĉante, la mastro,
 Ĉar li ekvidis, jen dekstre, insulon
 Gruzan, raz-proksime preterpasatan.
 Pri kio temas, dume, sur Kaburlo ?
 Pri l'belulinoj, kiuj en Valenco
 Ĵus enbarkiĝis. Jozefo Ribori,
 Mordante interdente maĉtabakon,
 Ekdiras : - Vi ja konas mastron Ejmon,
 Kiu sur la pontono min manpremis...
 Ne estas hom' frivole rakontanta.
 Kion li diris al mi ? Inter ili,
 La dametoj ĉi-poste folumantaj,
 Estas dukino de Berri. - Vi ŝercas ?
 - Ne, tute ne. - Eble ŝi estas tiu
 Kun nigraj frizoj kaj boraj okuloj ?
 - Ne, ne. Kredeble tiu riĉaspekta
 Sur kies kombilkresto dikaj perloj
 El oro brilas - Ha ! ankaŭ ne, certe !
 - Ĉu ŝi ne estus tiu blondineto,
 Kiu ventumilludas, kaj nun ridas ?

14

* Ne maĉas gadon : ne ŝparemas.

- Nu, vi komprenu ja, Ribori diris,
 Ke tia persono, granda princino,
 Volante ajnakoste rekonkeri
 Tronon por sia fil', ne tiel stulte
 Allasus sin al facila rekono.
 Sed tiel, kien ŝi irus ? - Simpluloj,
 Ĉu vi ne scias, ke sur ter' Arleza,
 Apud Grand-Klar' kaj la marĉoj de Kordo,
 Estas mil, eble eĉ dumil friponoj,
 Kiuj, decidinte neniel servi
 Al "kokaĉo", bivakas sur junkejo ? *
 - Marĉanojn, dizertantojn vi aludas ?
 - Jes, la marĉanojn, la hirud-ĉasistojn,
 L'obe-rifuzantojn de l'ardeejo,
 Tiujn sovaĝajn birdojn de la grundo,
 Kiuj, en la kot-kavoj kaj fosaĵoj
 De niaj marĉoj ŝlimaj kaj dronigaj,
 Baras al la Bluaj ilin ĉasantaj... **
 Ha ! jen ĝi tute preta, la armeo
 De la dukin' ! Kion diras la princo ?

XXXV

- En tia land' nenio nin mirigas.
 En la helo de tiu val' belega,
 Sub la tendaro de ĉi viaj barkoj
 Glitantaj sur la gaja flu' de l'ondo,
 Metu laŭplaĉe princinojn, papinojn,
 Imperiestrinojn aŭ eĉ feinojn
 En vestoj de lazur', or' aŭ purpuro,
 Ĉio ĉi bela vizi-fantazios
 Tiel vive vera kaj legitima
 Kiel ni mem, kiujn l'akvo forportas.
 Vi vidas liliflorojn ? Kaj mi, fratoj, ***
 La floron de Rodan' sin sunbanantan
 En la sud', mia celo... Ho Johano !
 Ĉu longa temp' ankoraŭ ? Mi sopiras.

* kokaĉo : la registaro de la reĝo Luiz-Filipo.

** la Bluaj : la soldatoj kun blua uniformo.

*** lilifloroj : en la reĝa blazono de Francio. Aludo al la dukino de Berri kaj al ŝia filo, legitima heredonto de la trono.

- Nu ! ĉu vi venus manĝi mian supon ?
 Respondis la pruisto. - He ! vin gardu !
 Kriis al li la viro de l'stirilo.
 - Ho ! ĉu la suno ne por ĉiuj brilas ?
 Ni ne estu ĵaluzaj. Anglor' estu
 Stel' fora, de neniŭ atingebla
 Kaj lumanta al ĉiuj niaj barkoj...
 En ĉi momento, sciu, ŝi sin kombas
 Koketa kaj beleta, sur la bordo.
 Ŝia hararo ŝvelas en la blovo
 De la ventet' movanta la foliojn.
 Demiksi ŝiajn harojn en salikoj
 Vi ja preferus, ĉu ne, ho fripono,
 Aldonis la viroj de la barkego,
 Ol puŝi la stirilon, hej ? - Reĝlanden !
 Kriis mastro Apjan'. Kaj unumove
 Tirante la stirstangon, ĉiuj kune
 Kuraĝe sin remetis al manovro.

XXXVI

- Kiel vi diris, princ', sur la rivero
 Ĉio videblas : ĝi estas radspuro
 De l'mondo, diris la maljuna mastro.
 La papo, jen, tute blanke vestita,
 Kiu nin benis el sia karoso, *
 Ĉu ni ne vidis lin dufoje ? Unu,
 Povrulo ! kapte tirita el Romo
 Kiam li, pro ĉagreno kaj laceco
 Venis morti survoje en Valenco; **
 La duan fojon, kiam Bonaparto
 Por sia kronkonsekro lin venigis ***
 Kaj li, bonvole aŭ nevole, devis
 Veturi al Parizo... Bonaparto !
 Tiu nesatigebla de konkeroj !
 Li, nin miksante en sian fortunon,
 Igis nin fore streĉi la gamaŝojn
 Kaj tiel longe kartoĉojn disŝiri !

* karoso : luksa kvarrada veturilo tirata de pluraj ĉevaloj.

Itale carroza, france carrosse, provençe carrosso.

** Pio VI-a (1717-1799).

*** Pio VII-a (1748-1828), en 1804.

Li, kiu ĵetis al buĉejo tiom
 Da konskritaroj, en senĉesa febro,
 Ke la nacioj diris : - En Francio
 Sendube la bovinoj naskas homojn !
 Nu, se mi dirus al vi, ke sur bordo
 De Rodan', tie kie brilas vojo,
 Tiu grandulo, tiu militfulmo
 Venkita, ni lin vidis veturanta
 Kiel pacient' malvigla, senpova !
 Oni kondukis lin al Elb' insulo...
 En la kaleŝo General' Bertrando
 Sidis apud li. Kun la vangoj palaj,
 Kun flava fulard' ĉirkaŭ la tempioj,
 Li, hieraŭ de tiom da popoloj
 Imperiestro, nun renegatita
 De siaj intimuloj kaj ministroj,
 De l'korteganoj, kiuj lin incensis
 Galop-forkuris... Kiam mi memoras !

XXXVII

Tie estis virinoj, kompatindaj !
 Kies infanoj mortis en la servo,
 Kaj kiuj kriis al li : - Hommanĝanto !
 Redonu mian filon ! En vilaĝoj,
 Terpieduloj teruraj, premante *
 Eskudon en la fingroj, por lin koni **
 Levante pugnon, blekis : - Al Rodano,
 La kaŝtanul', la tondit' ! Mizeruloj ! ***
 Tremege !... Sed en sia misfortuno,
 Konsterne, muta kiel Ecce homo, ****
 Li for rigardis, kvazaŭ nesentanto,
 Rodanon perdiĝontan en la maron.
 Ĉe posta staci', dum anstataŭigo
 De la ĉevaloj, jen hotelmastrino
 Kun hirta harar' kaj tranĉil' en mano,
 Sur sia sojlo mortigante kokon,

* terpeduloj : kampuloj.

** eskudo : kvinfranka monero el arĝento kun stampobildo de Napoleono.

*** kromnomoj de Napoleono : 1, pro la korsikaj kaŝtanoj; 2, post la kampanjo en Italio, Bonaparto tondigis siajn longajn harojn.

**** Ecce homo : Jen estas la homo. Per tiuj vortoj Poncio Pilato prezentis Jesuon al la amaso.

Ekkriis tiel : - Ho ! la fia monstro,
 Se mi lin tenus ! Tiel en la gorĝon
 Mian tranĉilon mi en li enŝovus !
 L'imperiestro, de ŝi nekonata,
 Iris al ŝi : - Kion li al vi faris ?
 Kolere, la patrin' en vest' funebra
 Diris : - Mi havis du knabojn, du belajn
 Similajn al truo. Li pereigis
 Ilin ambaŭ en siaj fibataloj.
 - En steloj ne perdiĝos nom' ilia,
 Triste diris al ŝi Napoleono.
 - Ha ! kiel ili mi estu falinta
 Morte por la patrio sur glorkampo !
 - Vi, kiu estas ? - Mi ? l'imperiestro.
 Aj ! bonulino ! (Imagu do, princo !)
 Genufalante ĉe liaj piedoj,
 La patrin' povra kisis liajn manojn,
 Tute en larmoj, pardonon petante.

XXXVIII

Tiam la mastro, sin interrompante :
 - Al Imperi' ! Viŝante l'okulharojn,
 Kun la ĉapel' en man' : - Ha, duan viron
 De tia stamp', por lin trovi, necesus
 Kuri ! - Atentu, ho marist-lernantoj !
 Alvokas la kondukistoj de floso
 Naĝanta sur la mezo de Rodano.
 - De kie tiu floso, ho pigruloj ?
 - De Izer' - Belan lignon vi jen havas.
 - Jes : je valoro de dudekmil frankoj.
 - Ĉu ligno por marŝipoj ? - Al Tulono.
 Rigardu, kiaj trunkoj. Se vi estus
 Vidintaj ilin, supre de la montoj,
 Kiam ili saltegis sur deklivoj
 Antaŭ ol esti flose kunligitaj !
 Tie estas abioj, fagoj, kverkoj
 Eble ducentjaraj, sen troe diri...
 Venas de Verkors', de la Fridaj Teroj
 Kaj de la forst' de Granda Kartuzio,
 De la tondro de Dio ! - Belaj pecoj !... *

* De la tondro de Dio : de tre malproksime.

Nepre ne frapu al la pilieroj
 De Sankta-Spirit-Pont' ! - Danĝer' por ĉiuj,
 Ĉar ne estas certe, ke l' pont rezistus !...
 - Al la stiril' ! Adiaŭ, Alobroĝoj ! *
 - Adiaŭ, manĝemuloj !

XXXIX

Sur la pruo

Johano kun la princo rekuniĝis.
 - Vi scias ja, ke ĉi fojon vi devos
 Pagi l'foiron al eta Angloro...
 - Ĉu vere ? Vi do kredas, ke ŝi venos
 Al Beŭkajro ? - Ŝi iros ja necese
 Por vendi tie sian kolektaĵon
 De orpajleroj al la aĉetistoj.
 - Ni naĝu plu ! De la granda Naturo,
 Kiu de post Liono nin sorĉlogas,
 Plaĉas al mi, ke ni en ŝi salutu
 L'unuan floron, naturan reĝinon.
 - Dum ni, sinjoro, al ŝia renkonto
 De kvietbrak' al kvietbrak' descendas, **
 Vi vidos la riveron pilarĝiĝi
 Kaj en ĝi plonĝi l'Amoretoj gajaj. ***
 Lasu pagi la Cenglon kun la turo
 Malbenita, kiu tie kliniĝas
 De l'tempo, kiam certaj monaĥinoj
 Malfermis kradojn al la hugenotoj.
 Poste Ĉarm', Belkastel', kie Rodano
 Kavata de l'Ejri' pliprofundiĝas,
 Kaj Pejrogurd', San-Laŭrenco-de-l'-Papo,
 Kaj fore la Cevenoj... De la Vulto
 Ni preterpasos la verdajn insulojn
 Sur kiuj loĝas kastoroj kaj lutroj,
 Kaj tiun tiel nomatan "Vin gardu",
 Vidos Kruas'on, Rokmaŭron la Nigran,
 Kaj ĵetos la ŝnuregon en Ankono.

* Alobroĝoj : galla popolo de Savojo = Alpanoj.

** kvietbrakoj : tiuj brakoj de Rodano, en kiuj la akvo estas kvieta.

*** kliniĝinta turo ĉe vilaĝo Soyons.

XL

En Ankono, tuj post manĝet' anĉova *
 Ili kun nova viglo ree kargas...
 Sed kiel bonodore ! Sur Kaburlo
 Enbarkiĝis dudek violetsakoj
 Portotaj al Beŭkajro : kolektaĵo
 Plukita sur Mezenk', Sankt-Eŭlalia,
 Sur Granda-Sero aŭ en valo Droma.
 De tiuj sekaj floroj kun kol' torda
 Tuta Rodan' rapide parfumiĝas.
 Sur la riverfluejon insulplenan
 La sunon ĵetas radiojn tepidajn
 Sur la vorticojn brile turniĝantajn
 Kaj perdiĝantajn unu en la alian ;
 Sur boskojn, el kiuj elstaras poploj
 Kun altaj trunkoj blankaj, rondaj, glataj,
 Kvazaŭ vi vidus la belajn femurojn
 De iu nimf' aŭ diino giganta,
 Sur "segonaloj" verdas salikejoj, **
 Kaj en kaneej' motaciloj en nombro
 Stride kriadas. Super klif' lontana
 Aŭ pli proksima, tajlanta en l'akvo,
 Brunaj vulturoj largaronde ŝvebas,
 Aŭ falkoj flugas super la altaĵoj.
 Inter la bordoj mutaj kaj solecaj
 Pace descendas la longa bargaro.
 Ĉirkaŭe, tiel lontane videblas,
 Kaj tiel vasta estas la silento,
 Ke ĝi ŝajnas mil mejlojn for de l'mondo.

XLI

Stala tavolo', la longaj akvoj mornaj
 Estigas ebriecon kaj dormemon.
 Sub la tendo de la plej granda barko
 La princo siestas. Ho bela vivo !
 Kuŝante en ruĝastria mantelo
 Brodita je l'arĝenta kron' Oranĝa
 Li vidas, per okul' duonfermita,

* Ankono, konata kiel nomo de itala urbo ĉe Adriatiko estas ankaŭ tiu de haveneto ĉe Rodano, fronte al Rokmaŭro.

** segonalo : rando inter la riverbordo kaj la digo.

En la lazur' de la kvietaj brakoj,
 Speguliĝi la poplojn longliniajn
 Fuĝantajn kun la salikoj, fraksenoj,
 Ŝtondigoj, palisaroj, grenostaploj.
 En duondormo, glitante sur l'ondo,
 Li vidas, tie alte, vice pasi
 La turojn orkolorajn, la kastelojn
 Memorantajn pri la tempoj lontanaj
 De siaj tiel mirigaj legendoj.
 Kia feliĉo, senti sin libera
 De l'vantaj banalaĵoj de la vivo !
 Dolĉa amsongĉ' invadas lin. Li revas
 Pri l'Evo nekonata, kiu ie
 Atendas lin, sola, kun kor' floranta,
 Kaj kiu, eble, kredos lian vorton,
 Se li diros al ŝi, ke li ŝin volas.
 Ha ! Ĝemeligi sian vagan vivon
 Kun la noveĉ' de bela infanino,
 Kaj perdiĝi kun ŝi en la bosketoj,
 Pri ĉio kroma trinkante forgeson !

XLII

Subite, tie sur la dua barko
 Malantaŭe, leviĝas muziksonoj,
 Kaj kune voĉoj klaraj, harmoniaj,
 Ravas la tutan spacon de l'rivero.
 La Venecianinoj, tri sirenoj
 Ekkantis gaje tion ĉi beletan :

Ĉe l'bordo de la maro
 Piedojn lavis ŝi;
 De la bela Norino
 Forglitis ŝia ring'.

Tie pasas fiŝisto
 Sola en sia bark';
 Li fosas ĉiuloke
 Por rikolti en sak'

- Fiŝisto blondabarba,
 Por vi bela floren'
 Se vi ĉerpos el akvo
 Mian ringon el or'.

Sin ĵetas en la maron
La fiŝisto en flam'
- Jen, ho bela Norino,
Falinta via ring'.

Ŝi malbukas monujon :
- Jen estas via pag'.
- Nur kison sur la buŝo,
Nur tion volas mi.

- En tag' oni ne kisas,
Ĉar iu vidus nin.
- Sed en nokto, sub laŭbo,
Kiu rekonus nin ?

- Sed hele lumas luno
En vasta la ĉiel'
- En la ombro de bosko
Vin kaŝos mia brak'.

- Roz' de mia korsaĵo
Ŝanĝiĝus je kolor'
- Nu, min piku l'rozujo
Antaŭ ol falos flor' !

- Lasu min, ho fiŝisto !
Mi timas pro la edz'.
- Lin, kiel ajn malican,
Ne multe timas mi.

Sur mia ŝip' rapida
Mi rabos vin en freŝ' !
Mi estas princ' holanda,
Neniun timas mi !

- Ho flama kant', ho bela Venecio,
En sia songo murmuras la princo
Duone dormanta. Ho barkaroloj
Vespere leviĝantaj de l'placetoj,
De l' Grand-Kanal' silenta kaj de l'Lido !
Ho ! lulu min per via beateco,
Kaj mi ne pensu plu, ĉar jen la saĝo :
Sin lasi porti sur la akvo fola
Laŭ la volo de Dio, kiel cigno
Metanta sian kapon sub flugilon.
La Veneciaj damoj, ne naivaj,

Sciante, ke princ' tie kunveturas,
Ĵetas siajn retojn en l'ondon bluan
Kun sia kanto pri la princ' holanda.
Sed li estas subtila fiŝ' : ni vidos,
Ĉu, de ili ĉarmita, kap' antaŭen
Kaptiĝos li, aŭ pasos tra la maŝoj.

Kanto Kvina
L'Angloro

XLIII

Dum en trankvilo Kaburlo descendas
Kaj de lok' al loko kruce renkontas
Alian bargovicon ascendantan
Kontraŭ la fluo, en la vido pasas
Valoj kaj suproj : jen Rubjon' fluanta
Tra Montelimar', jen murapogiloj
De la granda preĝejo konstruita
Sur la Vivjer-roko; aliaborde, *
L'abismo Gurg-Njer, kie, je Kristnasko,
En noktomez' ĉiun jaron aŭdiĝas
La sonoriloj de l'monaĥinejo,
Kiu iam tie enprofundiĝis :
Ĝi, kun kastelo kontraŭe staranta **
Komunikis laŭ legendo, per vojo
Fosita sub la rivero... - Alarmo !
La stirist' abrupte direktoŝanĝas :
Ili skrapis la rifon de Malmusko.
Rapidis la vic' en l'interkrutejon
Mallarĝan kaj timindan de Donzero,
Kie severe ilin flankrigardas
La Tri Fraŭlinoj ŝanĝitaj en ŝtonojn.
Ili, triope starantaj, atendis
Siajn tri kavalirojn foririntajn
Al Sankta-Tero por la krucmilito;
Laŭlonge de l'rivero rigardante,
Tiel malbonas la atend-langvoro,
La longa temp', ke ili enrokiĝis.
Pasis Burgo, kie Sankt-Andiolo ***
Ekzorcis dion Mitran; malkovriĝis

* La katedralo de Viviers.

** Sankta-Viktor'-kastelo, sur la maldekstra bordo.

*** Bourg-Saint-Andéol.

En lontana la Ventur-monto ĝiba; *
 Pli fore la Mezenko de l'Cevenoj,
 Alvale la arkaĵoj mire belaj
 De Sankta-Spirit-Ponto la mirakla.
 Fine ili albordas inter arboj
 Ĉe Malatra', kunfluej' de Ardeŝo,
 Kie, pro la danĝeraj gruzogrundoj,
 Ili kunprenos la viron de ŝanĝo. **

XLIX

- Jen ŝi ! Jen ŝi ! ekkriis la barkanoj.
 Kun pugno ĉe koks', sur la Rodan-bordo,
 En siaj belaj vestoj de dimanĉo,
 En man' tenante korbon el junk' fajna,
 Ŝi, la Anglor', atendas ridetante
 Al tiuj viroj de la ekipaĵo.
 Iom post iom ŝi al kutimiĝis,
 Kun ili ĉiuj flirtante, ŝercante.
 De kiam ŝi naskiĝis, sur la bordo,
 Ŝi venis vidi l'alvenon de l'barĝoj
 Trafendantaj la akvon en descendo,
 Kargitaj de kaŝtanoj aŭ aliaj
 Manĝaĵoj, kun siaj blankaj toltukoj
 Ŝirme kovrantaj amasojn da varoj.
 La veturantoj de l'barkoj dikventraj,
 Vidante ŝin gapantan ĉe l'rivero,
 En ŝian antaŭtukon etenditan
 Foje ĵetis de fore ruĝajn pomojn
 Aŭ verdajn pirojn. Ili ĉiuj konis
 Tiun Angloron, kiel ili nomis
 Ŝin mokintence, ĉar sur la gruzejo
 Ofte ŝi rampis nuda sub radioj
 De l'suno kiel malgranda lacerto. ***
 Poste ŝi iĝis granda, aroganta,
 Iome beleta. Tamen ja bruna,
 Sed hele bruna, aŭ, se ĝuste diri,
 La sunrebrilo ŝin kvazaŭ orumis;
 Perdrik-okuloj, estus malfacile
 Scii, ĉu ili ridas infanece,
 Aŭ pro fola gajeco, aŭ mokemo.

* Ventur', la Venta Monto (fr. Mont Ventoux, prov. Ventour).

** la viro de ŝanĝo : la loka ŝanĝpiloto.

*** Angloro : provenca nomo de la griza lacerto (lacerta agilis).

XLV

Stare aŭ surgenue, en marĉetoj
 Surborde tutan tagon, diligente,
 Per sia bronza reto ŝi kribradis
 Miksitajn kun la sablo aŭ la gruzo,
 La orpajlerojn subtilajn kaj rarajn,
 Kiujn Ardeŝ' kunrulas post la pluvoj.
 Lavitaj, relavitaj, la oreroj
 Brilantaj, retenigis en la lano
 De ŝafopel'. Kaj povra, tre kontenta,
 Kiam ŝi gajnis sian monereton
 De dek aŭ dek kvin soldoj, tage-meze.
 De ŝiaj gefratetoj la bubaro,
 Nudpiede tretante la sablejon,
 Unu ĉi, unu for, en la rivero
 Daŭre por ŝi kolektis kribrosablon.
 En la domet' la patrin' faris supon
 Aŭ flikis, al ili ĉiam kriante :
 - Kiu tenus vestojn al vi, ĉifuloj !
 Ŝia edzo estas la dika Toni
 Ŝanĝpiloto ĉe Sankt-Spirit-Ponto,
 Kie necesas koni l'akvofluojn
 Kaj la kirl-abismojn, por ne rompiĝi
 Ĉe l'akraj eĝoj de la pilieroj :
 Tial li gvidis la barkojn descende.
 El Aramon' li estis. Sur Rodano
 Li suprenvenis por kapti alozojn,
 Kaj tie ili pendigis kaldronon
 En loko dezerta, en "kapitelo"
 El sekaj ŝtonoj, sur eta altaĵo
 Por eviti l'altiĝojn de Ardeŝo.
 Oni ne ŝercu kun tiu fripona
 River' rabia, kiam ĝi subite
 Ŝvelinta pro pluv' kreskigas Rodanon
 Je dek kvin futoj !

XLVI

Do tiun Angloron
 Nudkapan aŭ kun ruĝa kapfulardo
 Bargistoj de Kundrio aŭ Andanco

* "kapitelo" en Langvedoko, "borio" en Provenco : rondforma kabano el plataj ŝtonoj sen mortero, kun kupola tegmento, de prahistoria deveno.

Ĉiam retrovadis, tie pasante;
 Kaj tial ili, dum la descendado,
 Post preterpaso de la Tri Fraŭlinoj,
 Trairo de l'insuloj Margeriaj
 Kaj vido al la rok' de Pejrolato,
 Ĝoje ekkriis : - Nu ! baldaŭ ni vidos
 Ĉe Malatra' l'Angloron foletumi !
 Tio sufiĉis por ilin vigligi
 Pli ol vingluto el feltosaketo.
 Kaj tuj je vido de ŝi laborema
 Movanta la kribrilon en la lumo,
 Kun jupo ĝis femurmezaj kuspita,
 Kaj korsaj' malfermita, kiel rozo
 Eglanteria sunlumon trinkanta :
 - Hej ! ho ! ekkriis ili kun mangesto,
 Ĉu ne riĉiĝis jam tiu Angloro ?
 - Aj ! povra ! da or', diris l'etulino,
 Tiu fias Rajoloj en Ardeŝon *
 Ne multe ŝetas... Vi konas proverbon :
 Fiŝistoj, ĉasistoj kaj orkribristoj...
 - Povruloj ! - Tre ĝuste. Sed vi rapidas...
 - Ĉar Rodan' fieras, kaj ĝi ne haltas, **
 Ho belulino ! Sed je reascendo
 Kun la ĉevaloj tirantaj la kablonojn,
 Kiam revenos ni el ter' Arĝenca,
 Ni nin alligos al la bordaj trunkoj,
 Kaj portos daktilojn. Kie la patro ?
 - Ĉe Granda Malatra' li vin atendas.
 Bonvojon ! - Adiaŭ, ĉarmulineto !

XLVII

Estis unu, kiu sur la ferdeko
 Ĉiam la lasta el ĉiuj barkanoj
 Salutis fojon plian l'etulinon
 Kaj al ŝi fingre sendis kelkajn kisojn.
 Li estis forta knab' el San-Maŭrico,
 Kiu sur la kolo, sen ies helpo,
 Povis surŝarĝi vinbarelon plenan
 Ducent-litran, nome : Johano Roĉo. ***

* la nomo "rajolo" fakte signas la loĝantojn de la propre nomita Ceveno, sude de Ardeŝo.

** Rodano "fieras" : estas alta, plenigas sian fluejon.

*** Roĉo signifas roko.

Bela viro bruna, el tiu raso
 Forta de l'riveranoj Daŭŝenlandaj,
 Kiuj, sur la fluo de l'riverego
 Regas la flosojn kaj savojajn bargojn.
 Lia patrino, je ĉiu foriro,
 Diris : - Infano, mia koro krevas
 Vidi vin descendi sur tiuj barkoj,
 Kiuj revenas ofte difektitaj,
 Aŭ tie for, ruinigitaj, restas.
 El sep knaboj - jen vi la malplej granda,
 Ĉar ĉiuj estas fortikaj viregoj.
 Restas al mi nur vi. Palaj knabinoj
 De l'ebenlando, en fora Provenco,
 Prenis de mi unu post la alia.
 Kun bela vidviniginta mastrino
 La plej aĝa fariĝis hotelisto;
 La dua, ĉe la Rodan-elfluejo,
 Estas sondisto, oni al mi diris;
 Du edziĝinte kun Arlezaninoj,
 Vivas brokante, mi ne scias kiel;
 Kaj du en Avinjono sin alligis
 Por esti ŝargportistoj. De la bando
 De miaj knaboj, en mia oldaĝo,
 Se ankaŭ vi kuros al beldrivado,
 Mi vidas min preta por resti sola.
 - Panjo, diris Johano, la knabinoj
 Kun arleza veluro sur la haroj,
 Kaj la petolulinoj de l'Uvezo,
 Kaj la ridemulinoj de la Sorgo
 Kun siaj blankaj kufetoj el punto,
 Kies rubandoj flirtas en la vento,
 Estu trankvila, neniam min igos
 Forgesi niajn knabinojn belkarnajn
 Kun iliaj ruĝe sanecaj vangoj.
 - Kiel prudentaj, la patrin' aldonis,
 Kaj agemaj, por paŝti meleagrojn
 Dume ŝpinante faskon el kanabo,
 Melki kaprinojn, kirli buterkremon
 Aŭ triki belajn florojn de puntaĵo...

* La nigra velur-rubando de la Arleza virina kapvesto.

Jen, sen serĉi pli for, tiu filino
De Ĉarmentano, lerta kaj fortika :
Ĉe fino de l'gepatroj, fil', per doto
Ŝi ricevos herbejojn, vitojn, terojn
Sen ia ŝuld' - ĉu vi aŭdas ? - Jes, panjo.

XLVIII

Kaj plu kaj plu. Je ĉiu forveturo
Estis sama aŭbado. Sed Johano
Tuj post sursalto sur la barkoplankon,
Tuj veturante sur la riverfluo
En forvojaĝo al hela Provenco,
Adiaŭ, dikulinoj el Serjero,
El Ampuis', Pjaĝo aŭ Glum' aŭ Servo !
Spirante la aeron de Rodano,
Vidante sin, li kaj kompanoj liaj,
Plene mastroj de tiu akva regno,
De tiu imperi' de mistral' kruda,
Kiu longiĝas inter la montetoj
De sun' al suno kaj de vent' al vento,
Ili per ega orgojl' ebriiĝis
Kaj kredis sin en la mond' ne venkeblaj.
Por ili nun fama most' Ermiteja,
La varma vin' de la Kosto-Rustido,
Kies, sur voj', vivu la ĉerp-tubeto !
Ĉiam kelkan barelon ili boris.
Por ili la viandpotoj plenplenaj
Kaj tranĉoj de tiu bovostufaĵo,
Kiun parfumas la laŭrofolioj,
Kaj la fazanoj de l'insul' Pibula
Kaj la kokinoj grasaj de Rok-Maŭro
Per balail-milio satnutritaj,
La kunikloj de Novkastel' de l' Papo
Saporigitaj per la vin' de Nerto !
Por ili la brakum' de l' ĉambristinoj
En ombro, ĉe pied' de blankaj poploj,
Kiam en grandaj havenaj gastejoj
Ili vespere haltis por dormado !
Ne malpravas la krioj de regado,
Kiu, inter ambaŭ digoj, senĉese

* Ĉarmentano : familia nomo.

** pibulo : provence = poplo.

18
19

Laŭte sonadis : Reĝland' ! Imperio !
La Kundrianoj, mastroj de l'rivero, *
Ja vere estas reĝoj, konkerantoj.
Al Provenclando, tiu Palestino,
Kie Rodano en sia amplekso
Ĉirkaŭbrakas la vastegan Kamargon, **
Al Provenc', kie svarmas l'olivarboj
Sur la deklivo de ĉiu monteto,
Al lando, kie kuris la Tarasko,
Kie, en sunlumo, dancas l'Oldino,
Kie dumnokte brilegas la steloj,
Ili, veturigistoj de l'abundo,
Tie de ĉiuj ricevis bonvenon.

XLIX

Kiam almonte aperis la vico
De siselandoj, sapinoj, pineloj ***
Kable ligitaj unu post alia,
Dum Kundrianoj starantaj sur pobo
Kun brakoj alte, puŝis la stirilon,
Kaj en lazuro poste ĝin allasis,
Al ili, de l'bord', la teranoj kriis :
- Hej ! ho ! kaprid-manĝantoj, ledpugaĉoj,
Buternazuloj ! Kaj tiuj kolosoj
Trankvile respondis : - Anĉovmanĝantoj !
Iru ! Ĉu vi timas, ke al vi mankus
Tero ? Kaj longe l'antikva ŝercado
En la popola lingvaĵo resonis,
Kaj tute longe sur la ŝton-talusoj
De l'havenetoj ĉe la riverbordo,
Venis por vidi, vintre kaj somere,
La knabinoj kun kapo facimova
Por ŝtrumpoj manuzantaj la trikilojn,
Aŭ tenantaj teleron en la mano.
Tiam la Kundrianoj ŝvelparadis
Kaj, de sur siaj barkoj, amindume
Kriis : - Knabinoj, ĉu vi volas veni
Kun ni Arlezon ? - Ni ne estas pretaj :

* Johano, daŭfenlandano, asimiliĝis al siaj kolegoj el Kundrio.

** La du ĉefaj brakoj, Granda kaj Malgranda Rodanoj, kun la maro sude, limigas la deltinsulon Kamargon.

*** Vidu piednotojn p.13. "sapino" = "abia" ŝipo.

Alian fojon ! Fornaĝis la bargoj
Sur la plaŭd-ondoj inter la insuloj.
Starante sur la ferdek', la piloto
Kun la okuloj fiksaj al antaŭo
Por eviti la kornojn de la rifoj,
Apenaŭ, de lok' al lok', stire turnis.

Kanto Sesa La Drako

L

Ha ! la altiro de la akvo pura,
Kiam en vejnoj kuras nova sango !
L'akvo plaŭdanta en luda murmuro
Inter la glataj ŝtonoj, kun leŭciskoj,
Kiu saltante kaptas la libelojn
Kaj la moskitojn de l'herb-tufoj verdaj,
L'akvo beleta, kruela, perfida,
Kiu fascinas, sorĉas la senkulpajn
Per la trembrilo de sia spegulo !
Je l'antaŭnokto, foje, la patrino
Diris al l'idoj, al Anglor' : - Etuloj,
Vi en la bluo de l'akvoj kvietaj
Aŭ al abismoj inko-nigre kirlaj
Neniam iru piede travadi.
Mi ĉiam tiel aŭdis : sub Rodano
(Ha ! beletuloj, se l'pied' mispaŝus !)
Estas iuj profundoj nekonataj.
Tie, de kiam la mond' estas mondo,
Vagas kobold' nomita Drak'. Superba,
Flekse kiel angilo, ĝi tordiĝas
En la funelo de l'kirloj; ĝi blankas
Kun mar-verdaj okuloj bor-rigardaj;
Longa hararo verda, alge supra
Flirtas sur ĝia kap' laŭ mov' de l'ondoj;
Ĝi havas, laŭ dir', man- kaj piedfingrojn
Palmitajn, kiel Kamargaj flamengoj,
Kaj du naĝilojn malantaŭ la dorso
Travideblajn kiel blua puntaĵo.
Kun okuloj duonfermitaj, nuda
Kiel vermo, iuj ĝin vidis funde
De kavo, etendita sur la sablo

Kvazaŭ lacert' trinkanta la sunlumon;
Luj ĝin vidis, en flakoj kvietaj,
Vagante en lunlumo sub la akvo,
Kaŝe deŝiri florojn de irido
Aŭ de infera herb'. Sed jen plej grave. *
Aŭskultu, infanoj...

LI

Iam, laŭ diro,
Sur kaj' beŭkajra, juna virineto
Lavis sian tukaron en Rodano;
Batante ĝin, subite ŝi ekvidis
Belan, lertan kiel nov-edz', la Drakon,
Kiu, tra la klar', al ŝi signon faris.
- Venu : mi montros al vi, belulino,
Mian hejmon, palacon el kristalo,
Kun lito el arĝent', kie mi dormas,
Kaj ĉirkaŭ ĝi la lazurajn kurtenojn;
Venu : mi montros al vi la riĉaĵojn
Amasigitajn tie sub la ondo
De kiam negoc-barkoj tie sinkas,
Kaj kiujn mi kolektis en kavernoj;
Venu : mi havas bebon, nuran larvon,
Kiu por esti nutrita en saĝo,
Atendas nur vian lakton, ho bela
Mortemulin' ! La juna lavistino
Lasis de sia man' ŝaŭmokovrita
Fali la batilon; por ĝin repreni,
Kuspante sian jupon duonkrure,
Poste ĝis genu', jen ĝis femurmezo,
Ŝi perdis l'ekvilibron; la rivero
Envolvis ŝin en sia vigla fluo
Kaj tiris ŝin en abismon sovagan,
Kiu kirligas malsupre sub tero.
Vane oni ŝin serĉis per hokstango,
Kaj ne retrovis : ŝi estis perdita.
Pasis tag', pasis jaroj. En Beŭkajro
Neniu plu pensis pri l'povrulino,
Kiam, unu matenon, post sep jaroj,
Oni ŝin vidis alveni trankvile
Al sia dom' kun pako sur la kapo,

* infera herbo : nufaro.

Kvazaŭ kiel kutime ŝi revenus
 De la lavejo. Nur iome pala.
 Tuj ŝia parencaro ŝin rekonis;
 Kaj ĉiu kriis : - De kie vi venas ?
 - Aŭdu, ŝi diris : tio ŝajnas songo...
 Ĉu vi ĝin volas kredi, ĉu ne kredi,
 Mi venas el Rodan'. Lavante tukojn,
 Mi lasis fali l'batilon. Mi volis
 Rehavi ĝin, kaj glitis en kavejon
 Mi sentis min sub l'akvo brakumita
 De iu fantomo, kiu min prenis
 Kvazaŭ junulo, kiu inon rabas.
 Tiam mi svenis. Post rekonsciigo
 En vasta grot' plena de malvarmeto
 Iluminata de lumo akveca,
 Soleta kun la Drako mi min vidis.
 Li iam, de knabin' duondroninta,
 Naskigis idon, kaj li dum sep jaroj
 Kiel mamnutristinon min retenis.

LII

L'Angloro, la morgaŭon de l'rakonto,
 Kiu je l'sunradioj vaporiĝis,
 Jam ne pensis pri ĝi, kaj en la sablo
 De Malatra', ek ! kiel perdrik' vigla
 Kuris kun sia kribril' al laboro.
 Estis plena somero. Sur la poploj,
 La ulmoj kaj la tremoloj branktrunkaj,
 En la soleco kantis la cikadoj...
 Ho ! ŝi nenion timis : en rebrilo
 De l'granda sun' pikanta la sablejon,
 Ŝi pli bone vidis la orpajlerojn
 Brileti. Al ŝi la plej peza estis
 La nokto, kiam en la strikta budo
 Ŝi devis kuŝi kun la gefratetoj
 Sur nuda ter' en tavolo' de folioj.
 En unu tia nokto de varmego,
 Dum sub tegoloj oni sufokiĝis,
 Ŝi en ĉemiz' eliris sub la luno
 Por ĝui l'eksteran freŝan aeron.
 La lun' en sia pleno ŝin rigardis,
 Sveltega, malsupreniri al bordo,

Nudpiede, en la silent' profunda
 De la vastega naturo dormanta;
 Sonis en ĝi l'ronkado de Rodano;
 Lumetis sur la herbo lucioloj,
 La najtingaloj, tie malproksime,
 Ameme interrespondis en l'aŭboj,
 *
 Kaj la plaŭdeto de l'akvo kurema
 Ride audiĝis. La eta knabino
 Lasis defali sian ĉemizeton,
 Kaj en Rodanon, arde, tremetante,
 Lante, klinita kun manoj krucitaj
 Sur la trem' de siaj du virgaj mamoj,
 Eniris. Ĉe l'unua fridosento,
 Ŝi haltis momenteton, suspirante,
 Kaj, emociite, turnis l'okulojn
 Ĉiudirekten en ĉirkaŭo nigra,
 Ĉiam kredante, ke inter la arboj
 Iu rigardas al ŝi senvestita.
 Poste, ek ! en la flu' de l'akvo mola
 Ŝi plu malsupreniris, lumigata
 De la lunaj radioj, kiuj kisis
 Ŝiajn fajnan kolon, la sukces-brunan
 Junan karnon, ŝiajn pufetajn brakojn,
 Ŝian fortikan dorson, ŝiajn lumbojn
 Kaj la mametojn firmajn, harmoniajn,
 Duonkaŝitajn kiel du turtetoj
 En disa fluo de ŝia hararo.
 Plej eta bru' - fiŝ', kiu ekster l'akvo,
 Por muŝon kapti, faras eksalteton,
 Kirla funel' subite glutglutanta,
 La akra krio de "rato-flugila"
 **
 Aŭ bato de tabano sur folio -
 Kvazaŭ kazee turnis ŝian koron.

LIII

Ŝi plu descendis. Ŝi ĝis la talio,
 Poste pli alte, sentis sin vestita
 Per la luksa mantelo de l'rivero,
 Kaj pensis nur pri la ĝua feliĉo
 De sia tuta korpo enmiksita,
 Kunmiksita kun la granda Rodano.

* Aŭbo : blanka poplo (populus albus).

** Rato flugilhava : vesperto.

Sub la pied', tiel milda la sablo !
 Ŝviteto, sento de tepida freŝo
 Envolvis ŝin per ĉarm' neesprimebla.
 Ĉe haŭtsupraĵo, ĉe karnosupraĵo,
 Milde la turniĝadoj de la ondo
 Faris al ŝi kisojn kaj tikletojn
 Kun la murmur' de dolĉegaj paroloj,
 Kiuj al ŝi havigis plezur-spasmojn...
 Tiam, subite, en la mov' de l'akvo
 Travidebla en la lunhel-radioj,
 Tie ĉe l'fundo, kuŝanta sur muska
 Smeralda lito, kion ŝi ekvidis ?
 Bela junulo al ŝi ridetanta,
 Blanka kiel eburo, dia-forma,
 Ondis kun l'ondo; lia mano fajna
 Tenis sovaĝan floron de butomo,
 Prezentiĝis ĝin al la knabino nuda.
 El liaj lipoj palaj, tremetantaj,
 Eliĝis vortoj de am' aŭ mistero
 Dronantaj en l'akvo, nekompreneblaj.
 Liaj katecaj okuloj, fascinaj,
 Venigis ŝin, timema kaj stupora,
 Senspira, anhelanta, al la loko,
 Kie anim' kaj korp' kompaton petas.
 En flu', ensorĉita de emocio
 Kaj ankaŭ de stranga delicosento,
 Ŝi estis, povreta, kiel sonĝanto
 Senpovigita de konfuza timo,
 Kaj al kiu neeble estas kuri;
 Kaj kiam ŝi turnis siajn okulojn
 Al la kobold', kiu en lum' lakteca
 Ŝajnis atendi ŝin en siajn brakojn
 Suprajn, jen tremo de amo nevola
 Sub la ĉiel' ŝin ĵetis en langvoron,
 Kaj al ŝi lante mortigis la vejnojn.

*

LIV

Ho feliĉeg' de naskiĝinta amo !
 Ho paradizo de l'anim' kredema !
 En moment', kiam balanco de l'fluo
 Ŝin tutan suprenlevis kaj subpalpis,

* al ŝi mortigis la vejnojn : igis ŝin senforta, duonsvena.

Ŝi renversite, kun haroj flosantaj
 Kaj kun okuloj fermitaj pro timo,
 Vidis, sur supro de l'akvo, trapinti
 De sia juna brusto ambaŭ cicojn;
 Subite, kvazaŭ fulme, ŝi eksentis
 Ĉirkaŭ la kokson kareson, delicon,
 Kiu ŝin freŝe kaj lante tuŝetas...
 Aj ! en eksalto ŝi tuj rerektiĝis,
 Reĵetis per manturno siajn harojn,
 Kaj vidis fuĝi en la verd' de l'akvo
 Vagan ombreton blankan kaj serpentan,
 Malaperantan. Ĝi estis la Drako.
 Pri ĝia mor' instruita, l'Angloro
 Tre bone ĝin rekonis, ĉar ŝi trovis
 Subite inter siaj gamboj floron
 Rozan de butom'. En sia konfuzo,
 Ŝi tute revema, tamen feliĉa,
 Prenis la floron naĝantan, kaj iris
 Rekuŝiĝi. Sed ŝi sin gardis diri
 Al iu ajn tion, kion ŝi vidis.
 Ĵaluza ja, tiom kiom katino,
 De l'vizi' tro frue malaperinta.
 Ho ! kiomfoje en tiu somero
 La junulino en langvor' de noktoj
 Varmaj, en la hela lunlum' septembra,
 Revenis plu al la renkont' delica !
 Sed ŝi rimarkis ion : ĉiufoje
 Kiam, enakviĝante, ŝi krucsignis,
 Kiel ŝi faris en la infaneco,
 Vane, al fluo de l'akvo torenta
 Liveris ŝi la korpon virginetan :
 La bela Rodan-fe', en tiuj noktoj,
 Ĉe banej' - povra etulin', atendu
 Kaj atendu ! - ĉe l'atendloko mankis.

Kanto Sepa
La Fontano de Turno

LV

Kie ni haltis ? La Kundria vico
Sur flu' eniris en l'arkipelagon
De Malatra', de arboj verdoplana,
Kiam, tute ridante, sur la bordo,
Kiel dirite, aperis l'Angloro.
- Halt' ! diris la granda mastro de l'barĝoj
Transverse etendante siajn brakojn.
Ligŝnuron al ter' ; ĝin la knabineto
Volvas ĉirkaŭ trunk'. Amiko Johano
Tuj deligas la "hundo-dronigilon". *

- Hop ! belulin', internen ! Vi ne pezas
Multe. Kaj, ŝin prenante je la zono,
Ŝin levas al la barko, hop lanlero ! **
Ciu venas tuŝi la kvin pilĉardojn ***
Ĉiu : - Nu, kion diras la Angloro ?
- Ĉion bonan por vi. - Kaj la rikolto,
Ĉu bona ? - Ne tro multe en la sablo,
Sed daŭre tiom, ĝi al mi sufiĉus.
La kablon deliginte, ili iras
Por kune preni la dikan piloton,
Kaj ek al la valo ! Revigligite
Per la kunridado kun l'etulino,
Kiu sur la pru' estis sidiĝinta,
Johan' diris : - Ho sanktulin' kantanta ! ****

* "Hundo-dronigilo" : kanoto.

** Hop lanlero : interjekcia esprimo = hop ! (PIV)

*** La kvin pilĉardoj : la kvin fingroj de la mano.

Tuŝi la kvin pilĉardojn : manpremi.

**** provenca elvok-esprimo ("Santo que canto").

Se vi ne estus pli ol mi prudenta,
 Ĉu vi scias, Anglor', kion vi farus ?
 - Diru. - Morgaŭ vespere en Beŭkajro
 Ni irus kune vidi komedion;
 Pare sur la herbejo, brak' en brake,
 De Ĉiganino per la horoskopon
 Ni aŭdus por ni la bonan fortunon,
 Kaj ni vagadus tra ĉiuj budetoj.
 Mi aĉetus por vi belegan ringon.
 - El vitro ? - Ne el vitro : ja el oro;
 Kaj fine de l' foir' mi vin kondukus
 Al San-Maŭrico kiel nov-edzinon.
 - Bona Di' ! Ŝerce diris la knabino,
 Por tie resti jarlonge tutsola
 Kun homoj, kies ĵargono ridigas ?
 - He ! kiel brava nia "rigodono"
 Por kune danci sur la kanabejo !...
 - Ne, Johan' Roĉo, ĉu mi al vi diru
 Sincere ? Bona knabo vi ja estas,
 Dika, fortika, kaj (Patro ĝin diras)
 Riverist' de unua klas' kaj rango...
 Sed unu vin antaŭiris, ho viro !
 Unu, kiu en kavoj kaj abismoj,
 En fosoj, akvotruoj kaj glutejoj
 En profundo dronigus vin, povrulo !
 Se vi fiŝkaptus inter liaj limoj.
 Kaj la knabino eksplodis per rido,
 Simile al mev', kiam ĝi ekplonĝas
 Por kapti fiŝon, kaj akvon ŝprucigas.

LVI

Dum la alia paŭtis en silento,
 El la tend', kie li dormis, la princo
 Vilhelm' Oranĝa, pimpa kiel astro,
 Jen eliras, tenante dekstramane
 Vergeton de butom', kiun li plukis
 Aliaflanke de l'bark' en flakego;
 Kaj li, ankoraŭ dormeme, kantetas
 Duonvoĉe la venician kanton :

* "rigodono" : gaja kampara danco.

Sur mia ŝip' rapida
Mi rabos vin en fresĥ' :
Mi estas princ' holanda,
Neniun timas mi.

- Nu ! ĉu ne tiu ĉi ? diris Johano,
Lasante ŝin por kuri al stirilo
Ĉe l'pobo, kie mastr' Apjano kriis :
- Ĉu diras vi la Blubarban fabelon,
He ! sentaŭgulo, aŭ la Meluzinan
Al tiu knabineto ? Sed l'Angloro,
Tuj ekvidinte la princon blondharan,
Tute subite estis paliĝinta.
Eksaltis ŝia sango en la vejnoj
Kaj ŝi apenaŭ ne falis en svenon.
- Estas li ! ŝi ekkriis en frenezo
Al la pavezo sin dorsapogante,
Kaj ŝi, povrulineto, kvazaŭ dion
Admiris lin ameme kaj timeme,
Same kiel silvio fascinata,
Kiu, je la rigardo de serpento,
Nerezisteble, nepre devas fali.
Tiam Vilhelm' diris : - Mi vin rekonas,
Ho Rodan-flor', sub l'akv' elvolviĝinta,
Flor' de feliĉ' en sonĝo ekvidita,
Malgranda flor', bontrovita vi estu !
Ŝi en subita kuraĝo respondis :
- Mi vin rekonas, ho Drak'. Sub la akvo,
En via man' mi vidis butomfloron,
Kaj je la blonda barbet', blanka haŭto,
Verdaj okuloj sorĉaj, traborantaj,
Mi vidis, kiu vi... Al ŝi li donas
La floron, kaj, per mister' kunligitaj,
Ambaŭ ektemas : ĉar l'amo rapidas
Sur la barko, kiu antaŭdestine,
Forportas ilin sur la riverfluo.

LVII

De San-Spirit-Pont' l'arkoj miregindaj
Pasas triumfe super kap' ilia.
Frunton klinante, la viroj salutas
Sankt-Nikolaon en lia kapelo
Antikva - nun detruita - sed kiu

Tiam protektis l'arkadon maristan
 Tiel danĝeran per sia aperto,
 Ke tie sennombraj ŝipoj pereis.
 Aperas Provenc'. Ĝia enirejo,
 La Spirit-Pont' kun siaj pilieroj,
 Sijaj superbaj arkoj kurbiĝantaj
 En manier' de krono sur Rodano.
 Ĝi estas la pordo reĝa kaj sankta
 De la tero de am'. La olivarbo,
 La granatuj' de sia flor' fiera,
 Kaj la milio kun longa hararo
 Ornamas jam la kampoj kaj montetojn;
 La ombra flank' de Ventura vidiĝas.
 Al l'Oranĝa princet' kaj al la eta
 Kolektistin' de orpajleroj ŝajnas,
 Ke ili venas en benon. Li trinkas
 (Aj ! la trinkaĵo freŝa kaj delica !)
 Ĝue, en tiu belega juneco,
 La vivon el ĝia fonto ŝaŭmega,
 La egan miron de l'animo nova,
 Kaj li ridetas al ĉiuj miraĝoj,
 Kaj al iluzi' sin allasas tuta.

LVIII

Ebriiĝita de l'likvor' amiga
 El la bela sinjoro ŝin ravanta,
 Ŝi plene retrovas la Drakon, kiu
 Sur l'ond' en la blanka tremlum' de luno,
 Tiom- kaj tiomfoje ŝin fascinis.
 Pro kio miri, se Rodana dio
 En sia kaprico plezure ĝuas
 Frekventi barkojn kaj riverajn homojn ?
 Ĉu ne vidiĝas fojfoje kastoroj,
 Kiuj en holdojn venas kaj sin kaŝas ?
 Batal' necesas por ilin forpeli.
 Mastro Apjan', dika Toni, aliaj,
 Ĉe l'rokoj de Donzero, tie alte,
 Ĉu ne ĝin vidis, la Drakon, en formo
 De kolubreg' dika kiel botelo,
 Iri el Rodan' en la grenokampojn,
 Tordante la spikojn kaj ondumante,
 Tiel ke la pilot' ricevis febron
 Kaj lian haŭton kovris erupcio !

Ĉu ĝi ne estas vidita ĉe l'bordo
 De Rodanet' en grenrikolta tempo, *
 Kiam ĝi kaŝe sin ŝovis sub jupon
 De iu garb-ligistino dormanta,
 Milde ŝin stringis inter siaj volvoj,
 Kaj suĉis ŝian mamon, ĝis ĝi falis,
 De lakto kaj de ĝuo satigite ?

LIX

Ĉion ĉi diris la halucinata.
 Ĉe ŝia ekzaltiĝo la barkanoj
 Iom post iom al ŝi proksimiĝis
 Aŭ de malproksime streĉis l'orelojn.
 - Nu, jen vi vidu, diris la Angloro
 Al Johan' Roĉo, kiu al ŝi gapis :
 Mi prave diris : li estas pli brava
 Ol kiu aĵn el tiuj riveranoj !
 Rigardu lin, belan, princo-similan !
 Mia reĝ' ! mia Drak' ! mia sorĉanto !
 Ĉu ja, vi montros al l'amikineto,
 Lokojn de vi loĝatajn sub Rodanon
 En keloj de la palaco de Truljo **
 Kaj de la Granda Prior' en Arlezo ***
 Kaj en la Ardeŝaj grotoj tegitaj
 Per diamantoj kaj per kristal-puntoj
 Ĉu ja ? Vi min kondukos al Drakmonto, ****
 En kastel', kie nokte vi drakumas,
 Kaj kies turojn ni vidas baŭmantaj
 Sur la krutaj rokoj de l'streta valo.
 Ĉu ja ? ni alvizitos sur Gardono
 La faman ponton, verkon de l' diablo *****
 Kun la leporo tie ŝtonigita.

20

* Rodaneto, aŭ Malgranda Rodano : la okcidenta brako de la Rodan-delta.

** Truljo : alia nomo de la palaco de Konstanteno, ĉe Rodan-bordo.

*** Palaco de la Granda Prioro de la Malta kavaliro Ordeno, kun muzeo.

**** Oni rimarku la analogion kun Drachenfels ĉe Rejno.

***** La fama "Pont du Gard", gallo-romia akvedukto.

Ĉu ja ? ni iros vidi noktomeze
 Sur dezertgrund' la flamon de l'Ulurgoj
 En plor' kaj ĝem' irantaj al la lokoj,
 En kiuj ili oron enfosigis,
 Ĉar al ili pezas esti mortintaj
 Subite, senkonfese, al neniu
 Dirinte, kie estas la kaŝejo.

LX

En rapidega parolflu' l'Angloro,
 Kiel ŝpinaĵo, kiu malvolviĝas,
 Sin ekzaltigis, kun ardaĵ okuloj
 Kaj pro konstern' vizaĝ' elsangigita.
 Sed li, Vilhelm', ravita de l'renkonto
 Levanta lin en plenan sorĉolandon,
 Kun sia flegmo holanda, respondas :
 - Jes, ĉien mi vin kondukos, ho bela
 Amikinet' ! De mia morganata
 Princland' Oranĝa vi estu fabela
 Niksino, estu feino Morgana.
 Mokante ŝin, la riveristoj diris :
 - Ĉu aŭdis vi ? Ŝi perdis la kompason,
 Eble ŝi, povra, trinkis el la fonto
 De Turn', kiu laŭfame kapon turnas...
 Sur la ferdeko l'Angloro, fiere
 Staranta, piedfrapis en rikano,
 Kaj okulfikse al la bargiŝtaro :
 - Ho riveranoj, sciu vi, mallaŭte
 Parolu pri tiu fonto, ŝi diris,
 Ĉar sur ĝi estas via sort' skribita.
 - Nia sorto ? Nu, kion diras tiu
 Viziulino ? Hodiaŭ, kredeble
 Estas lun-tago ŝia ! Tiel grumblis
 La barkanar' en grupo kuniĝinta.

LXI

Trankvile, sur la flu' de l'akvo bela,
 La barkoj, preter l'insuloj, descendis.
 Estis inter Mornas' kaj Sankt-Estevo
 De l' Sortoj (rifuĝejo de rabistoj);

* Perdi la kompason : freneziĝi.

Laŭfame, kiam tie beb' naskiĝas,
 Oni por prov' ĝin ĵetas en Rodanon :
 Se sin elsavas, taŭga por navigo
 Aŭ por rabado). En l'interkrutejon,
 Kiun murbordas la altaj remparoj,
 De kiuj Montbrun' saltigis kaptitojn, *
 Kaj kie lia nom' terura ŝvebas
 Kun la vulturoj, inter la ruinoj,
 Eniris la sep barkoj. Sur la pruo,
 La virgulin', tia kia sibilo,
 Kun nuda brako levita, superba
 En sia sovaĝa song' ebriiga,
 22 Diris : - Font' de Turn' estas orakolo !
 Kiuj ĝin vidis, tiuj pri mensogo
 Min gardos, se pri mia dir' vi dubas.
 Tie la akvo elŝprucas el roko
 Plena de vit' sovaĝa, klematidoj,
 Busko kaj figuoj, kuvon formanta
 (La Granda Gurgo ĝi estas nomata)
 Sur la rok-parieto, en kadraĵo
 Fronte al Rodano, ĉe l' supro estas
 Ĉizitaj - antaŭ kiom da jarcentoj ? -
 La lun' perfida, la suno, gvatantaj.
 En mezo bov', kiun estas pikonta
 Skorpi' en la ventro; hundo ĝin mordas,
 Kaj ĉe l'piedoj serpento ondumas.
 La bov' eltenis, pli forta ol ĉiuj,
 Kiam junul' en flirtanta mantelo
 Junul' fiero, kun ĉap' de libero **
 Plantas en ĝi en la nuko ponardon,
 Kaj ĝin mortigas. Super tiu sceno
 Tragika, korvo timeginda flugas :
 Ĉi misteron divenu, kiu povos !

LXII

Ŝi, kvazaŭ demonhava, rondirigas
 Al ŝipistoj rigardon farandolan.
 - Aŭskultu. Mi, serĉante orpajlerojn,
 Iam de flako aŭ flako, eniris
 En la ravino de la rivereto.

* Montbrun : hugenota ĉefo dum religia milito.

** la "frigia" ĉapo, adoptita kiel simbolo de la revoluciistoj
1789-1793.

Tie maljuna sorĉistin' Burgana *
 Min alparolis : - Rigardu la bildon
 Tie sur la rok'. Sciu, etulino,
 Ke ĝin ĉizis mem la feinoj, kiuj
 Antikve vizitadis niajn grotojn.
 La bovo Ruan', tie laboranta **
 Sub la rigardo de suno kaj luno,
 Ĉu scias vi, kion ĝi reprezentas ?
 La antikvan Rodanan navigadon
 De ĉiu flank' agrese atakatan
 En la malica intrigo de l'ondo.
 La serpentego sub ĝi ruliĝanta
 Estas la Drak', la dio de l'rivero,
 Kaj la junul' portanta sur la kapo
 La ruĝan ĉapon - memoru, knabino,
 Pri mia dir' - estas la detruonto,
 Kiu mortigos la bargo-trafikon,
 En tago, kiam el Rodan', por ĉiam
 Eliros la Drak', geni' de l'rivero.

LXIII

Ne ridis plu la barkanoj : ĉar foje
 Kuris sur la bordoj tiaj novaĵoj
 Ne bonaŭguraj. Kaj en la barkego
 Sinjoroj el Liono jam parolis
 Pri dikaj fajro-ŝipoj kun maŝino,
 Kiuj sen tir-ĉevaloj kaj sen kabloj,
 Ascendas kontraŭflue. - Ho ! simpluloj
 Nuraj povus kredi pri tiaj blagoj,
 Blekis mastro Apjano, kiam temis
 Pri tiaj inventaĵoj. - Sed, se estus,
 Kio fariĝus el tiom da homoj
 Vivantaj nun per la river-laboro :
 Barganoj kaj ĉaristoj, gastej-mastroj,
 Portistoj, ŝnurfaristoj, tuta mondo
 Kiu faras la svarmon, la amason
 Kaj la honoron de l' granda Rodano ?
 Ĉu vi ne vidas ja, ke, fulmotondro !
 Estus motivo por buĉi per stango
 Ĉiujn tiujn fuŝulojn, parazitajn,
 Fiulojn, konfuzistojn, filozofojn !...

* Burgana : el Burg-Sankt-Andiolo.

** Ruano : taŭro en plena forto, aŭ impeta ondegilo. La sencpara-
 lelo montras eblan derivon : Ruano, Rodano.

Tamen, estis videble, antaŭtimo
Jam esprimiĝis sur ĉies vizaĝoj;
Kaj ne sen timosent' Johano Roĉo,
De tiom da malklaro konfuzita,
Rigardis al tiu stranga junulo,
Kiu, sur la pinelon, l'antaŭtagon,
Eksaltis - de kie nome veninte ?

*

* pinelo : Vd. piednoton p.13.

Kanto Oka
Alval-ire

LXIV

La blonda galantulo, sub la tendon,
Kun la Angloro, lante kaj trankvile,
Por ĝui iom da ombro, rifuĝis.
La dolĉa bato aŭ la ensorĉigo,
Kiu, en la rebril' de l'akv' insida,
Ŝin kaptis en la longo de la tempo
Tenadis la filinon de l'piloto;
Kun siaj perdrikinetaj okuloj
Ĉiam fulmantaj pro iu kaprico,
Sia roza buŝ', sia naz' fripona,
Ho ! mi certigas, ne tiom necesis,
Por ke la junan princon ŝi kontaĝu !
- Sed per kio do, li ree demandis,
Vi rekonis min ? La halucinita
Respondis : - Mi jam diris, mastro mia :
La butomflor', kiun vi al mi donis,
Ĉu vi ne portis ĝin en l'akvofundo,
Min fasciante kaj al mi signante
Kaj min sorĉante per viaj mienoj,
Tiel, ke iĝis mi via sklavino,
Kaj, se vi nur dirus al mi : Mi volas,
Ke vi fuĝu kun mi al ekstremaĵo
De la mondo, senhalte, impetege,
Kiel tiuj famaj teraj ĉevaloj,
Kiu, galop-galope kuradante,
Iras ĉirkaŭ la tuta ter' senbride,
Mi tuj ekflugus ! - Sed se, mia bela,

* Legendo de Alta Provenco.

Mi dirus : erare ! vi nur parolas
 Al la filo de l'reĝo de Holando ?
 Demandis Vilhelmo. - Ho mia Drako !
 Rebatis l'Anglor', vi povas vin ŝanĝi
 En ĉiun formon, kiu al vi plaĉas.
 Mi dirus : - Vi vin faris princ' Oranĝa
 (Kiel vi kredigas al la barkanoj)
 Pro iu fantazio aŭ kaprico,
 Kiu superas mian komprenpovon...
 Sed mi vin konas jam de longa tempo :
 Kiel utilus, mia Drak', vin kaŝi ?
 Mi vin divenis je l'princa aspekto,
 Je via juna karno akve freŝa,
 La helbluaj okuloj, la barbeto
 Pli fajne ora ol irido flava ?

LXV

Al tio ja nenio por respondi
 Krom tujan kis' al la folulineto.
 Fronte al kred' lin tiel diiganta
 (Amo, ni scias, per amo pagiĝas)
 Vilhelm' en siaj vejnoj sentis fajron
 Entuziasman, kies flamo kuras.
 Unu en brakojn de alia falis :
 El ambaŭ ne plu estis eble scii,
 Kiu pli ensorĉitas kaj ebrias...
 Kaj naĝis la barkaro tute sola
 Sur l'akvo vivo en longa silento.
 De for al for pasis iu kastoro,
 Kiu rapide naĝis descendante
 Kun faŭk' ekstere por gardi la spiron,
 Kaj sur la firsto de l'tendoj malstreĉaj,
 Hirundoj, l'akvon tuŝetante, venis
 Fari paŭzeton... Ambaŭ ili kaŝis
 Sin en l'amaso de la pufaj pakoj,
 Kaj li diris al ŝi en sia stringo :
 - Almetu vian koron harmonian
 Kontraŭ mian, ke mi aŭdu ĝin bati.
 Ne rigardu en l'akvon - tro profundan -,
 Ne rigardu la teron - tro lontan -,
 Ne rigardu al la ĉiel' - tro vasta - :
 Rigardu en mian animon, kie

Vi estas la sun' ! Sed ŝi, forpuŝante
De sia zon' la manon tro palpeman
De la princeto : - Jen vidu ekstere
Sur la bord' la floron, kiun vi serĉas !
Kaj ŝi eskapis kun infana rido
Al rando de la bark'.

LXVI

Umbele bela,
Stara sur junka pint', la flor' ruĝeta
Solete elvolviĝis sur la ŝlimo
De flako malvasta kaj ne profunda.
- Sed, Drako, kial, demandis l'Angloro,
Vi tiom amas tiun floron ? - Tial,
Respondis li, ke ĝi al vi similas...
Ĉu ne amfloro vi, kiu naskite
Same en sino de l'akvo, simbolas
La teneron unikan kaj praecan
De l'mondo nova kaj junece luma ?
Kaj ŝi aŭskultis, gape brilokula,
La belajn vortojn plenajn de magio...
Li pluis : - Jen mi ĝin diros, aŭskultu
La historion de la flor'. En valo
Kruta, piede de klifo, la bela
Galatea, kun paŝtist' Acis, iam
Surttere sidis. Ili ambaŭ flirtis
Senpense, krom nur pri sia fortuno.
Dum ili trinkis unu la alian,
Supre, paŝtisto Polifem', giganto
Unuokula, ĵaluza pri l'nimfo
Kiel ne eblus pli, ha ! l'aĉa monstro !
Malkovris ilin tie kunludantajn
Li kolerplene deŝiras de roko
Stonegon, kiu falas ruliĝante
Kaj venas, ve ! premegi sur la herbo
La belan paron. Sang' ilia mikse
Fluas. La ter' patrino kaj la dioj
Pro kompatemo montris jen miraklon :
Acis en rivereton aliĝis,
Kaj Galatea iĝis tiu floro,
La butomfloro el ŝi elŝprucanta,
Ankoraŭ iom ruĝa kaj paleta.

- Fi ! l'unuokulul' ! kriis l'Angloro;
 Kaj sin turnante al pruiŝt' : - Hazarde,
 Ĉu vi ne estus la ciklop' gvatanta ?
 En rido diris ŝi al Johan' Roĉo
 - Ho ciganin' ! kiu kun l'amo ludas,
 Sin iun tagon brulvundos, respondis,
 Pikite de spitego, tiu knabo.
 Sed en l'aer-lazuro, arogante,
 Ŝi, ŝvingante la floron donacitan
 De l'bela Drak' : - Mi estas florumita
 Per l'akvo-potenco. Gruntu, Rodano,
 En via fund' ! Mi scias, kion scias...

LXVII

- Antaŭe gardu vin ! Sur la rivero
 Subite jen elŝprucis longa fajfo,
 Kaj, mute preternaĝante, rapide
 Kontraŭ la flankoj skrapis plata barko,
 Kiu antaŭen hastas : granda ŝipo
 Havanta de pru' al pobo katenon,
 Ĉe kiu estas popare ligitaj
 Kolektaĉo da ĉiuspecaj homoj.
 - Hej ! ho ! vi bonuloj ! al tiuj kriis
 Juna riveristo. - Ŝŝ ! fulmotondro !
 Ili ne demandis pri la vetero !
 Diris maestr' Apjan'. - Al la mizeruloj
 Sufiĉas plag' ilia, sen insulto...
 Kaj ne ŝajnigu vi ilin rekoni :
 Markitaj sur ŝultr', ili ombron serĉas.
 Kiel ekzempl' al ĉiu tio servu.
 Ili en Tulon', ho ve ! manĝos fabojn !
 Tie miksiĝas ĉiuj : klerikuloj,
 Kanajloj kaj nobeloj, notarioj,
 Senkulpuloj eĉ ! Kun rigard' oblikva
 Pasis la punlaboruloj, similaj
 Al la fantomoj de l'pramo Karona.
 Tiel la mond', la barakto de l'vivo,
 Bono, malbono, plezuro, doloro,
 Iras en kur', iras mikse, konfuzo
 Inter tago kaj nokto, sur la fluo
 De l'tempo fuĝe malbobeniĝanta.

* Tulono estis la haveno de la galeoj sur kiuj remis la punlaboruloj.

LXVIII

La galeruloj valen malaperis
 Al la Revestidu'. La Pibuleto, *
 Reĝa ĉasej' de l'sinjor' Ancezuna,
 En kies olda blazono grimacas
 La Drak' Rodana kun vizaĝo homa,
 Per arbkurteno kaŝas Kaderunon.
 - Kie Orangĝ' ? Al barkanoj demandas
 Vilhelmo, - kie tiu Glorieto,
 Nest' kaj palac' de miaj famaj avoj ?
 Ili respondas : - Tie malantaŭe,
 - Kaj kie vi, Ĝibur', edzin' kuraĝa
 De Vilhelm' kurta-naza, vi princino
 Tibur' Orangĝa ? - Tie malantaŭe, **
 Diras la bravaj barkanoj, post l'arboj,
 Kiuj kaŝas al ni la grandan muron
 De l'antikva teatro kaj la Arkon
 De Marius : de tie ĉi videblas
 Nur Krevo-Koro... - Ho gloroj perditaj, ***
 Ĝuste nomitaj, adiaŭ ! ekkriis
 La princ' viŝante larmon ekgutantan,
 Kiun briligis la suno, - konservu,
 Ho ora urb' Orangĝ', honoro nia,
 Gardu almenaŭ memoron pri tiuj,
 Kiuj neniam fuŝis cian brilon !
 Sed pro kio mi plendus aŭ tristiĝus,
 Li pluis, se, perdinte imperion,
 Mi fariĝis dio de l'akvo sorĉa ?
 Vidante lian okulon humida,
 La junulino premis lian manon
 Kaj familiare, kiel en sonĝo,
 Diris : - Ho Drak' ! Ĉu ankaŭ dioj ploras ?
 Elmergiĝante el revado, milde
 Respondis li : - Sed, se ili ne plorus,
 Ili estus ne multe pli ol ŝtonoj...
 Kaj, dolĉinjo, l'Am', kiu estas dio,
 Havas ion plej diecan : la larmojn.

* Revestiduo : La haveno de Orangĝo. Pibuleto, de pibulo = poplo.

** Tibur' : nomo de pluraj princinoj de Orangĝo en la Mezepoko.

*** Krevo-Koro : altaĵo ĉe Orangĝo.

LXIX

Sur l'Aŭzelet-insulo la birdetoj *
 Pepis en la arbustoj folihavaj.
 Facila vent' alportis de la montoj
 L'odoron de lavendo kaj de mirto
 Florantaj en la Sorça-Val'. La fino **
 De la tago, kun spiro pli tepida,
 Plenigas la koron per la langvoro,
 Kiu ĉion movadas, dum la suno
 Sinkas. Rodanon je du dividanta,
 La verda Bartelaso proksimiĝas. ***
 Poste nenio krom la akvoturno.
 Sed subite, kvazaŭ kurten' teatra
 Tie alviale flanken tiriĝinta,
 De l'riverbord' la arboj kaj montetoj,
 Ĉio malgrandiĝas kaj malaperas
 Antaŭ kolosa ŝtonamas' el turoj
 De l'subiranta suno fajrumataj,
 Purpurfarbataj de reĝa belego.
 Jen Avinjon', jen la palac' de l'papo,
 Avinjon' stara sur sia rokego,
 La gaja sonoristo Avinjono,
 Kiu levas, unu post la alia,
 La turojn per finialoj najlitaj, ****
 Avinjon', baptfilin' de Sankta Petro,
 Kies bark' iam en ĝia haveno
 Ankris kaj kies ŝlosilojn ĝi portas
 En sia krenelzono, Avinjono,
 La urbo ĉarma, kiun la mistralo
 Kuspas kaj distaŭzas, kaj kiu tiom
 Da gloro vidis lumi, ke ĝi gardas
 Por si nur la agrablan senzorgemon !
 Ĉiuj brakoj sin levas. Pasaĝeroj
 Kaj bargistoj admiras Babilonon
 (Kiel ĝin nomas l'Italoj ĵaluzaj).
 Subite, de l' dua barko, eksonas
 Ĝojkri' : Venecio ! Jen Venecio,

* Aŭzelet-insulo. Laŭvorte : insulo de l'Birdetoj.

** Sorça-Valo, proksime de Novkastelo-de-l'Papo (Châteauneuf-du-Pape)

*** Barelaso : insulo meze de Rodano inter Avinjono kaj Villeneuve (Nova-Urbo).

**** finialo : arkitektura floretaĵo (Vérax, Grosjean-Maupin).

Kiam ŝi rehejmiĝas inter punktoj
Sub kis' de l'okcident' en la lago !
Vilhelmo, ne povante plu reteni
Sian entuziasmon, jen transsaltas
Al la ferdek' de l'Venecianoj.

LXX

Kaj li, turnante sin al la plej bruna :
Dukin' de Berri', li diras subtile,
Pardonos vi, ĉu ne, se mi malkovras
Kaŝon de via entrepreno bela...
Ĉar la ŝipanoj de ĉi gaja floto
Diris, ke vi en Arlezo renkontos
La partianojn de via reĝeco.
- Aj ! kavaliro, respondis kun paŭzo
La bela sinjorin' en embaraso,
Kiel vi mokas pri la povraj homoj !
Tiu prinĉin', pri kiu temas, certe,
De ni ne estas tute nekonata :
Niaj palacoj ĉe Rialto' najbaras, *
Sed estas palaco' kaj palaco'; en nia
De longa tempo ŝpinas araneoj...
Kaj nun ni kantas, samkiel helikoj,
Kies konkdomo brulas. Kaj ekridis !
- Mi, diris plu la bruna kantistino **
(Ĉar mi komencis, mi do min dekudru)
Eliĝis ja el raso patricia,
En kies dom' l'altega Venecio
Elektis dogon pli ol unu fojon.
Sed ĉie estas ŝanĝaj mov-movadoj,
Kaj nun de granda nom', povra virino,
Restas al mi nur l'orgojlo nobela.
En tiu Avinjono, kies turoj,
Palacoj kaj remparoj nune montras
Kio ĝi estis en la temp' de l' papoj,
Imagu, ke unu mia praavo,
Ambasador' de Venecio en tempo,
En kiu la papa regno disfalis,
Tie troviĝis, kiam konfuzego
Pelis la lastan pontifikon foren...

* Rialto : parto de la Granda Kanalo, kun fama ponto.

** "mi min dekudru" : mi eldiru konfidencan.

Nun aŭskultu ĉi tion : la fuĝanto
 Dronigis laŭfame dek du statuojn
 El or' masiva de la apostoloj
 Kun krome Kristo en Rodan-abismon,
 Pri kiu la sekreton tute sola
 Mi konas. En mia sino relikve
 Mi portas pergamenon kun desegno,
 Kiu detale signas la kaŝejon.
 Sed en ĉi tiu fremda lando, kie
 Mi konas neniun, kion mi faru
 Se al feblec' ne venos iu helpi ?

LXXI

Vilhelmo diris : - Jen mi servopreta,
 L' afer' min interesas : mi konfesas,
 Ke dek tri statuoj el or' masiva
 Valoras penon por ilin eltrovi.
 - Kaj, tiam diris alia (la blonda)
 Ĉu, se necese, ne turni vergeton
 Aŭ kribrilon ? Mi konas tiun arton, *
 Kaj se estos io, mia dogino,
 Kiel ajn profunde, ni ĝin elĉerpos...
 Sed, pro Sankta Mark', ŝi diris, montrante **
 Siajn dentetojn de mustel', mi ĵuras,
 Ke mi ne donus dek du rat-fekaĵojn
 Por ĉi dek du apostoloj ! kaj ridis.
 Se nur ne jam ĉerpitaj, mia bona,
 En mia hejmo, rebatis l'unua,
 Mi ĉiam aŭdis tiun belan songon !
 Jam pli ol kvincent jarojn ni vivadas
 Sur la rebril' de ĉi verda espero...
 - Nu, prave ! pli ol prave, mi ja ĵuras !
 Diris la juna saĝul'. Kio vivo,
 Se ne songo, se ne lontana ŝajno,
 Miraĝo sur la akvo glitadanta,
 Kiu, antaŭ l'okuloj, daŭre fuĝas,
 Blindigas nin kiel alaŭd-spegulo, ***
 Iluziigas nin kaj nin allogas !

* tiun arton : la metion de font-serĉisto.

** Sankta Marko, patrono de Venecio.

*** turniĝanta speguleto, per kiu ĉasisto; logas alaŭdojn.

Ha ! kiel dolĉe naĝi senripoze
 Al sia deziro, eĉ se nur songo !
 Venos ja tempo, eble tro rapide,
 Kiam la homoj ĉe man' ĉion havos,
 Ĉion posedos, ĉion scios sperte;
 Kaj, bedaŭrante l'oldajn fantaziojn,
 Ĉu ili tiam de viv' ne laciĝos ?

LXXII

Nun, kun okuloj el kruda sukero :
 - Montru al mi vian manon, ho princo !
 Diris la tria Venecianino.
 La galantul' etendis sian manon,
 Kun serioza mien', al la damo
 - Jen bela man', fajna mano, karesa,
 Diris la mandivenistin' scivola,
 - Bona man', nobla man' - kaj en la siaj
 Ĝin palpis amindume la virino.
 - Ho mano reĝa, fea, mano glora,
 Kiu faras ĉion, kion ĝi volas !
 Kun linioj senfine interstrekaj,
 Am-streko kruce kun la kapo-streko,
 Kiel ofte vidiĝas, vivo-streko...
 Aj ! malbona trapaso ! en kurbiĝo
 De Rodan', eble ne for de ĉi tie
 Gvatas al vi, sinjoro, kun falĉilo
 La Morto... Gardu vin ! - Kion, diable,
 Vi diras ? kune ekkriis aliaj :
 Estas danĝer' sur Rodan' por ni ĉiuj
 Trinki el granda tas'. - Nu, gejunuloj
 Ni, atendante misfortunon, trinku
 La vinon klaran de nia juneco !
 Kaj en Beŭkajro sentime, ĉi-foje,
 Ni ĉiuj povu agrable foiri !

LXXIII

Dum ili tiel afable konversis,
 Ĉe l' bordo de Avinjono, la barkoj
 Vice alvenis kaj alproksimiĝis.
 - Streĉu la kablon ! Rapide al tero !
 Ordonis maestr' Apjano krudavoĉe.

* kun senkaŝa dolĉa rigardo.

- Kontraŭ la kajo flanken la Kaburlo !
 Antaŭen la karato ! la sapino !
 Puŝu la siselandon ! Al la bordo ! *
 Jen ! la barkoj kun tendoj kamelĝibaj
 Piede de l'krutklifo amasiĝis
 Antaŭ la Benezet-Pont', kiu montras **
 L'ombron gigantan de l'arko rompita.
 L'ilar' en ord', la floto en sekuro,
 Marŝante unuvice, procesie,
 Laŭ sia kutim', longe de la stratoj,
 Kun la maljuna mastro ĉe la kapo
 Kaj la knabetoj sekvantaj la trupon,
 Korpe-balance, al grandaj gastejoj
 De Fustarje', de Limas', la beluloj ***
 Iras gaje al vespermanĝo. Kune
 Kun sia patro sekvas la Angloro
 Iel spite konfuza, ĉar ne estas
 Apus ŝi la reĝido, la princeto
 Kun blonda barbeto, kiu nun eble
 Faras iun novan metamorfozon...
 He ! kiu scias ? La Drak' en Rodano
 Eble devas descendi en palacon
 Sian, se tia estas lia leĝo.
 Ha ! mia kompatinda knabineto !
 Vilhelmo, kun la Veneciaj damoj,
 Kiuj lin per allogoj ĉirkaŭvolvas,
 En la tavern' "Eta gastigantino",
 Tie, sub la poploj kaj la vitlaŭboj,
 Hodiaŭ faras eskapeton... Simple,
 Vilhelm' estas junul', li devas ludi.

LXXIV

Do, ĉe la tablo, sub la verda laŭbo,
 La princo, kune kun la kantistinoj,
 Kiuj, frandemulinoj, manĝas, trinkas,
 Forpelante la kulojn per buŝtuko :
 - Nu, vi ne diris al mi, sinjorinoj,
 Ĉu jam edzinas vi, aŭ nur edzinos,
 Diris Vilhelmo, ĉar, laŭ la okazo,

* vd. piednotojn p.13.

** Pont Saint-Bénézet (La "Pont d'Avignon" de populara kanto).

*** eksteraj kvartaloj de Avinjono.

Povus esti kulpo, se oni falus
 En amoludon... - Pri tio ne zorgu,
 Ili respondis, ja pli ol bonvolaj;
 La ludo, sinjor', postulas nur kulpon,
 Kaj en nia land' nobela virino,
 Kiam ŝi edziniĝis, povas havi,
 Tute sen risiko pri ies mallaŭdo,
 Unu, ankaŭ du aŭ eĉ tri amatojn.
 - Ĉu vi scias, diris la knab', la edzoj
 En tia Palestin' kredeble gajnas *
 De Sankta-Pacienc' la paradizon ?
 - He ! ekkriis tiu kun harar' bela,
 Kiu havis orperlojn sur kombilo,
 Ili estas fab-reĝoj plej feliĉaj ! **
 Ĉar l'am-servantoj ilin malimplikas
 De ĉiuj zorgoj pri la viv-kutimo.
 Ja ne bezonas l'edzoj Veneciaj
 Pri io ajn enua okupiĝi.
 Por kavalir-servantoj estas frando
 Helpi la sinjorinan tualeton :
 Unu tenas spegulon, dum alia
 Al ŝi prezentas pinglojn por la haroj;
 Tiu metas la laĉojn tra l'korsaĵon,
 Ĉi tiu portas al ŝi la mantelon
 Por la vesper-diservo, kaj alia
 Ŝin akompanas al la bano-kuvo;
 Sen kalkuli donacojn, refreŝigojn,
 Serenadojn, madrigalojn plukvante !...
 - Nu, ĉu ni iru serĉi l'apostolojn ?
 Subite interrompis la dogino.
 Ĉe ĝojumado forfuĝas la tempo;
 La Jakomar' sonoris dek-unuan, ***
 Kaj frue devos ni reenbarkiĝi.
 Ĉu iru ni ? - Ni iru ! Ne forgesu
 L'aveluj-vergeton, kompason nian !
 Kaj iras la kantistinoj kantante :
 - Sed hele lumas luno
 En vasta la ĉiel'

* Palestino : lando de promeso.

** reĝo signita per la fabo en kuko-parto, je la Epifania festo.

*** Jacquemart : aŭtomato, kiu sonoras la horojn supre de la
 belfrido de la Avinjona urbodomo.

- En la ombro de bosko
Vin kaŝos mia brak' !

- Lasu min, ho fiŝisto !
Mi timas pro la edz'.

- Lin, kiel ajn malica,
Ne multe timas mi.

Sur mia ŝip' rapida
Mi rabos vin en freŝ' !
Mi estas princ' holanda,
Neniun timas mi.

Kanto naŭa
Sub Avinjono

LXXV

Longe de Rodan' en ombro lumanta,
Ekster Avinjon' sekvinde l'remparojn,
Ili eniras tra l'pordo Ferusa,
Kaj de Limas' al la Olda Judejo
Ascendas kaŝe laŭ la stretaj stratoj
Ĝis supre ĉe l'kastelo de la papoj.
Ĉirkaŭe, ĉio dezerta. La strigoj,
En la nigro timegige ĵetata
De la kolosaj turoj, ĝeme blekas.
Sur la dormanta urb' funebre falas
La dek du batoj de la nokto-mezo.
- Hej ! kiu venas ? - Amiko, respondas
Johano Roĉ' kaŝita en malhelo :
Ĉar por elsubterigi l'apostolojn
Helpe de lia Herkula manforto,
La subtila, prudenta princ' holanda
Lin komisiis por tie atendi.
Piede de la muregoj tenebraj,
Ond-kore, la italaj belulinoj
Jam duonvidas en sia pensado
La orajn barbojn de Johan', de Judo.
Kun pergameno en la mano, unu
Serĉas la lokojn kaj la intersignojn;
Alia tenas la vergon divenan,
Kiu svingiĝas en la man'; la tria
Kun frunto klina kiel narcisfloro,
Sur la brak' de Vilhelmo, amikume
Lasas pezeti sian ŝvelan mamon.
- Sankt-Antoni' Padova, ni jam brulas !
Subite diris tiu, kiu portis

* Ni brulas : ni proksimiĝas al la (kaŝita) celo.

La aveluj-branceton. Sin ĵetegas
 Avide ĉiuj ĉirkaŭ ŝin por vidi...
 - Ho ! neniam vidite ! En ekmove
 La dubeblanca vergeto tordiĝis,
 Kaj propramove sin turnas alteren,
 Montras ĝustan lokon je kelkaj metroj
 De la Pater-ŝtuparo kondukanta
 Al Dom-Preĝejo : - Ni tenas la minon !
 Diras Vilhelm' ridante, fosu, Joĉjo !

LXXVI

La forta knab' enŝovas la levilon,
 Trarompas la surfacan teron duran,
 Potence levas ampleksan kahelon
 Malkovras nigran abismon profundan,
 Puton en la roko, tiel hororan,
 Ke ĉiuj retroas. - Kiu sin riskos ?
 Malvarme demandas Vilhelm' Orangâ
 Rigardante la mutajn virinetojn,
 Johan' respondas : - Se ni havus ŝnuron...
 - Ni descendigus vin, diris la princo
 Al la damoj. - Kaj ambaŭ vi, la maskloj,
 Aŭdacas tion diri ! La dogino
 Fiksrigardante al li furioze
 Replikis. - Tie estas la statuoj :
 Rigardu la vergon, kiu tordiĝas.
 Se eĉ la Bazilisko ilin gardus,
 Sinjor' vi ne lasos... - Post la foiro !
 Interrompis Johan', la matenblanko
 Malantaŭ la kastel' baldaŭ eklumos,
 Kaj mi aŭdas la mastron : - Al Rodano !
 Dume, per forta brako li rekovras
 Sub ĝia klapo la profundan puton.
 Ĉe grundnivel' li piedpremas teron,
 Kaj : - Nu, rapide venu ! Al rivero.
 La gaja princo, la damoj paŭtantaj
 Al la haveno haste redescendas.
 Vilhelm' diras : - Sed, kia mon-skatolo,
 Bona Di' Orangâ, se per fortune
 Ni trovas la patrinon en la nesto

* La preĝejo "Notre Dame-des-Doms."

Kiel Rambaŭ-Bertrand, praavo mia
 (Li estu antaŭ Dio !) en Beŭkajro
 Per dek du bovoparoj traplugigis
 La foir-herbejon, kaj larĝageste
 Kun semosak' pendanta ĉe la flanko,
 Rajdante, en la sulkojn pugnoplene
 Li semis tridekmil arĝent-denarojn,
 Ha, belulinoj, sur la foirejo
 Eble ni estis pli multe farintaj !
 Dume, tiel tenante la pingleton,
 Ludante kun ili "ĉu kap', ĉu pinto ?"
 Vilhelmo, tute flegma, bonhumora,
 Moke piketas la sinjorinetojn;
 Sed ĉio ĉi ne ridemigas ilin,
 Ĉar (ili ja remaĉis) ili trovis
 La Veneci-trezoron netakseblan,
 Trovis l'Oran Bovinon, kaj, plej stulte !
 Ne kaptis ĝin subite ĉe la mamoj !
 Tion al paradiz' vi ne kunportos,
 Princeto mia : kaj koler' itala
 Ne vaporigas for kiel roseto !...

LXXVII

Mastro Apjan', estro de l'ekipaĵo,
 Supre sur Kaburlo krias ordonojn,
 Kiujn ripetas la pruisto. Grupe
 La pasaĝeroj haste enbarkiĝas
 Al la foiro; kaj sekve, pri kio
 La paroladoj de barko al barko ?
 Nur pri Beŭkajr' ! El tuta ĉirkaŭaĵo,
 El Karpentras', Vezon', por tie vendi *
 Siajn saketojn de safran', grajnetojn
 Kaj kurac-herbojn de San-Johan' sekajn, **
 El Avinjon' por prezenti rulpecojn
 De tafto, indieno kaj veluro,
 Venas amasoj da homoj. La mastroj
 De l'kaj', zonitaj aŭ verde aŭ ruĝe,
 Ĉu el Reĝlando aŭ el Imperio,
 La portistoj, kiuj teron tremigas
 Per siaj pugnoj ĉiam batalpretaj,

* Carpentras, Vaison-la-Romaine.

** sovaĝaj herboj aromaj, kiujn oni plukas en junio, ĉirkaŭ
 la festotago de Sankta-Johano.

Plenumas sian taskon. De la fostoj
 Ili mem deligas la fiksoŝnurojn,
 Kaj maestr' Apjan', levante la ĉapelon :
 - En nomo de Di' kaj de l'Sankta Virgino,
 Infanoj, al Rodano ! La sep bargoj
 Ree sin turnas vice, kaj plenplenaj
 De ĉiuj riĉaĵoj de Imperio
 Kaj Reĝoland', ĉe l'piedo de l'Roko,
 Rekte al sud' reiras en descendo.
 Dume la olda mastro moderigas
 Per brako kaj per voĉo la bargistojn :
 - Belete; mildete ! Kaj kiam ili
 Glutiĝas en la sovaĝa funelo
 De la ŝtona ponto, kiun paŝtisto
 Benezet' super la ondoj arkigis
 Kolos-impona, antaŭ sepcent jaroj,
 Mastro Apjan', fidele al kutimo
 De l'Kundrianoj, per ĉapel' salutas
 La grandan Sanktan-Nikolaon, kies
 Kapel' beleta surrajdas la ponton.
 Kaj nun, glitante sur l'akvo obskura,
 Kie l'aŭror' iom post iom lumas,
 Li reekdiras la preĝon kutiman :
 - Ho Patro nia !... Tiel, dum ekbrilas
 La unuaj radioj de la tago,
 Ekpepas la birdetoj en la nesto.

LXXVIII

De Avinjon' la vid' spektakle bela,
 La kastelego kun muroj gigantaj,
 Krenelaj baroj, turoj kaj turetoj
 En la mateno blanka lontaniĝas,
 Kun la fortres' tie de Vilo-Novo, *
 Kiun la sun' subite per lumverŝo
 Koloras ore. La barkoj trakumas,
 Rapidaj pli ol la akvo, ĉar pezaj,
 Kaj ju pli pezaj, des pli ili hastas
 - Ho fifuŝuloj ! grumblas forta voĉo
 Subite sur l'insulo de Pioto,
 Ĉu vi ne vidas la baraĵon ? Baldaŭ
 Ne eblos plu kapti eĉ petronizon !

* Villeneuve-lès-Avignon (Nova-Urbo), fronte al Avinjono
 ĉe la dekstra bordo de Rodano.

- Kio ? Ĉu ne plu liberus pasejo ?
 Kriis mastro Apjano brak-gestante
 De sur Kaburl' al la Rodan-fiŝisto.
 - Al ili ne sufiĉas siajn retojn
 Ŝovi en ĉiujn angulojn por kapti
 Kelkan aĉan korbeton da alozoj :
 Baldaŭ ili embarasos la mezon
 De la rivero per siaj trenretoj !
 - Vi olda flag', diras l'alia, tenu *
 Vian vojon ! Kaj maestr' Apjan' malŝate :
 - Olda standard', honor' de kapitano;
 Fetorul' ! malfrua vespermanĝanto ! **
 Sed la barkoj sur l'akvo ŝvela glitis,
 Kaj sur la pobo, majeste, la mastro
 Reprenis la stirilon.

LXXIX

Sur la pruo,
 Ĉe l'ekstremaĵ' alia, Johan' Roĉo
 Demandis l'etan Angloron : - Vi, kiu
 Vidas tra la muroj, nu do, divenu,
 Kio estas tio : Kiel pajleron
 Mi portas kvincent kvintalojn, kaj tamen
 Ne povas porti ŝtosilon ? - Rodano !
 - Ankorau tiun : - Profundo de l' maro ?
 - Ŝtonĵeto ! - Brave ! - Johan', miavice, ***
 Kio estas tio : Pli ol kvin centoj,
 Ja pli ol kvincent belaj fraŭlinetoj
 Havas en dom' ĉiu sian ĉambreton,
 Kaj tamen ilin ŝirmas dum la dormo
 Unu sola kovril'. Kun klina kapo
 La barĝisto serĉis. - Nu, Johan' Roĉo,
 Kial ajlo laboru per la kapo !
 Li mutis. - Ĉu vi sufiĉe fabmanĝis ? ****
 - Jes. - Vi ja estas knabo el Izero,
 Plumpa krudulo ! Granato ĝi estas.
 - Bone. - Sed nun, ĉar vi tiel divenas,
 Angloro, la aferojn malfacilajn,

* Olda flago : ĉifonaĉo, ĉifonulo.

** malfrua vespermanĝanto : malsatulo.

*** verŝajne tial, ke ŝtono ĵetita sinkas ĝis la fundo ?

**** Ĉu vi vane cerbumis, kaj rezignas plu serĉi ?

Divenu kun kiu, kaj kie nome
 La juna princo pasigis la nokton.
 - He, kiel grave ? Ĉu ne propra mastro
 Li estas ? ŝi respondis. Sur la fundo
 De Rodano, kiu do lin malhelpus
 Dormi, se al li tro varmas dumnokte ?
 - Kaj se, de post noktiĝo, oni dirus
 Al vi, ke ĝis tagiĝo li maldormis,
 Diris Johano, kun la Italinoj ?
 - Ĉu vi lin vidis ? - Ho jes ! L'etolino
 Tuj iras por sin kaŝi sub la tendo,
 Kaj kiom da ploroj ! Povra Angloro !
 Ĉu li, la Drak', jam ŝiris la promeson ?
 Diris al si la naiŭva knabino.
 Tiom ni vidis nin en l'akvo blua
 De miaj songoj ! Kaj en dorlotado,
 Tiom da vortoj de amo kaj flamo !
 Ĉu ĉio ĉi nun estas nur mensogoj ?
 Vi, kiu en tia belo aperis,
 Ho Drako ! tiel frue serpentiĝis !
 Mi aŭdis ja, ke kiel ond' perfida,
 Kiam vi nin fascinis, vi nin trompas...
 Sed tiel aminde bela vi estis,
 Kiam de fore vi al mi prezentis
 La ĉarman floron de butomo, kiun
 Vi tenis en la mano sub la akvo,
 Ondante kun la ondo sorĉe loga
 Milde lulanta nin sub luna lumo...
 Drak' se vi min perfidos, mi droniĝos !

LXXX

Ploru kaj ploru plu !... La barkovico
 Sur la rapida flu' ĝin forportanta
 Daŭre vojiras, kaj de bord' al bordo,
 Ĉiam plilarĝiĝadas la rivero,
 En kiun de Duranc' la larĝa faŭko
 Rulas kaj vomas ŝute la ŝtonaĵojn
 El la Alpaj ravinoj kaj torentoj.
 - Hoŭ ! bela pruiŝt', ĉu vi dormas ? Sondu !
 Kriis mastro Apjan', ĉar jen la loko
 De moviĝemaj sabloj kaj gruzejoj..
 Oni kredus vin blindaj, ja diable !
 - Jen, jen ni estas ! Kaj Johano Roĉo

Prenas la stangon, ĝin enprofundigas
 Ĉe l'flanko de Kaburlo, kaj tuŝinte
 La fundon, li laŭvice krias : - Futo !
 Poste : - Apenaŭ fut' - Nu do, vi celu
 Al Reĝolando, diras la ĉefmastro
 Al la taĉment', puŝante la stirilon.
 - Futo kovrita ! - Hej ! kolegoj, daŭre !
 - Fut' largâ ! - Ĉiam ! - Suverena ! - Naĝu ! *
 Ĵus la suno eliras de l' Monteto
 Brilega sur Rodano, kaj tre baldaŭ
 Ili atingos Ŝtalrokon. La princo
 Ĵus leviĝinta kaj finvekiĝinta
 Ekserĉis ĝoje pri sia Angloro,
 Kaj trovis ŝin sidanta sub la tendo.
 - Bonan tagon, li diras. Sed nu kio,
 Vi ploras ? - Vi ja scias la kialon
 De mia plor', incitite respondas
 La knabino, ĉar vi en la mallumo
 Dum tuta nokt', sur tero, tra kamparo,
 Vi koboldumis kune kun vespertoj ! ●
 - Se ne pli grave, vin konsolu, bela !
 Replikas li, prenante ŝian manon
 Kaj ridante. Sciû, ĉevalo juna
 Bezonas pranci, kaj Drako drakumi !
 Kaj milde gaja li al ŝi rakontas
 Pri l' Venecianinoj, la kaŝejo,
 La dek du or-sanktuloj en la putu,
 Kiujn oni eldiros post foiro,
 Se nur la mapo ja ne estas falsa.
 Kaj ĉio paciĝas : estus ja krimo
 Aflikti ŝin, la beletan knabinon,
 Tiel afablan, bravan kaj kredeman
 Pri sia amo el nura ĥimero !

LXXXI

Kaj naĝu la barkar' - He ! filineto,
 Jen Aramon', nia loko. Rigardu,
 Kriis la dika Toni. La kabano,
 Kie mi loĝis (Ha ! kiam mi pensas !...)
 De la inund' duonruinigita

* Suverena : Vd. piednoton en Kanto Unua, IX, p.17.

** Altaĵo proksima de Rodano, oriente.

La jaron de l'ŝvela Rodano, tie
 Vi naskiĝis ! - Kiom da arboj ĉie !
 La bela grund' ! diras la pasaĝeroj,
 Kiaj garb-amaso ! Estas videble,
 Ke tio estas aluvi' Rodana !
 Ĉu jam pasis Gardono ? - Jen l'insuloj *
 Kaj sur l'alia bordo Valabrego
 Kun sia Rudadu' ĝin ĉirkaŭanta. **
 Salikistinoj detranĉas branĉetojn.
 - Ho Margareta ! Malen' ! Ŝercemulinoj !
 Montrante siajn brilajn falĉiletojn,
 En vimenejoj vidu ilin ridi !
 - En tiuj tufoj de akvaj herbaĵoj
 Indus aranĝi siajn fiŝoretojn.
 - Jen sturgo supren naĝas. - Kio ŝprucas
 Tie antaŭe ? - Jes ja ! mi certigas,
 Ĝi estas bela mara masklo : pruvo,
 Ke proksimiĝas Beŭkajro. - Ho, pesto !
 Sed vere ! Jen la pont', jen Sankta Marta, ***
 Kies tur' pintas sur l'alia bordo,
 La Taraskona pont' kun pilieroj
 Blankegaj, transgambantaj la riveron,
 Kaj la kastel' de Taraskono, fronte
 Al tiu de Beŭkajro, kie supre
 Flirte klakas la trikolora flago.
 Ni estas kun Di', kaj vivu Provenco !

* Gardono (Gard), formita de pluraj Cevenaj torentoj.

** Rudaduo : iama brako de Rodano sekiĝinta.

*** La preĝejo dediĉita al Sankta Marta, en Taraskono.

Kanto Deka
La Foiro de Beŭkajro

LXXXII

Kovrante la longan Rodanon, aro
Da barkoj kaj ŝipoj el ĉiaj specoj
Flagornamitaj per ĉiuj flavaĵoj
Kaj ruĝaĵoj de l'nacioj, konfuze,
Al la sabla bordo jam sin premegas.
Pro tiu vento, kiu en la velojn
Jam kelkajn tagojn blovas, de la basa
Rivero supren venis la tartanoj.
De l' Maro Nia, de ĉiuj havenoj *
Berberaj, levantenaj, okcidentaj,
Kaj de la bordoj de l' Maro Plejgranda **
Ili velis Beŭkajron por foiro.
Multegaj ! Unuj portas la akutan
Velon latinan, aliaj kvadratan :
Arlezaj "leŭgoj", trimastoj Marsejlaj, ***
Tartanoj de Ĝenovo aŭ Livorno,
Brigetoj de Alepo, balanceloj
De Malago, Napolo kaj Majorko,
Goeletoj de Angluj' aŭ de Havro,
"Porkonazegoj" de Agdo kaj Seto ****
Kaj la nigraj trabakoj veneciaj *****
Estas sur Rodan' balo ŝanceliĝa
En la sunlum', la ondoj, la rumoro
De ĉiuj slangoj de la maristaro.
Sed meze de lev-bumoj kaj antenoj,
De veloj, de ŝnuregoj, de takeloj,

* Maro Nia (Mare Nostrum) : Mediteraneo.

** Maro Plejgranda : Atlantiko.

*** leŭgo : ŝipeto destinata por malplipezigi la ŝarĝon de
grandaj ŝipoj en riveroj kun malprofundaj bordoj.

**** porkonazegoj : barkoj kun ferdeko kaj latina velo en
Langvedoko.

***** trabako : dumasta ŝipo uzata sur Adriatiko.

Kie ŝipanoj grimpas nudpiede,
 Sub la orgojla Duonlun' sidanta *
 Sur la plej alta kruco de l'ĉefmasto,
 Ho Mahomet' ! la ŝipo de Tunizo
 Havas la ŝafofelon pendigita
 Ĝi alvenis unua. La konsuloj
 Donis al ĝi pansakon kaj barelon
 De olda Kant-Perdrik'. Ili festenos... **
 Poste, gardu Allah ! se ebriiĝos...
 Kaj dancas la judinoj kunvenintaj,
 Trenante la etajn flavajn babuŝojn
 Sur la ferdek' je son' de kastanjetoj,
 Kaj nazavoĉe kantas siajn kantojn.
 La Kundrianoj, hej ! per granda peno
 Ĉe alto de l'Herbej', puŝe kaj tire,
 Ho tir' ! Ho his' ! je la finfin' aranĝis
 Sian barkaron ĉe la kajo; tuje
 La dekargistoj multope invadis
 Tumulte la ferdekojn, kaj forprenas
 La varojn, kaj per sia peza kuro
 Ŝancelas la malfortikajn pontetojn.
 - Atentu ĉi-antaŭe, Kundrianoj !
 Oni ĉie krias. Kia tumulto !
 Kompare kun Beŭkajr' en foir-tempo,
 Grand-Kajr' estas nenio, helpu Dio ! ***

LXXXIII

La dikaj ĉaroj kun ole-bareloj,
 La akvumiloj, kiuj vin surŝprucas,
 La benkoj de oranĝoj kaj limonoj,
 L'amas' de junko- kaj saliko-korboj,
 La mili-balailoj, la forkegoj,
 La muelŝtonoj vojon implikantaj,
 Balancoĉaroj transportantaj labojn,
 Kaj kio ankaŭ ? En sablo Rodana
 Eĉ sonorilojn oni tie gisas.
 Sed la Herbejo ! De ĝiaj kabanoj,
 De la sennombraj kabanoj la vicojn,
 La foiranojn, kiuj, familie,

* duonluno : lunarko (PIV).

** prov. Canto-Perdris, vitgrundo ĉe Beukajro.

*** Grand-Kajro : Kairo en Egiptio. Beukajro (Beucaire en provenca lingvo) signifas : bela angulo, bele loko.

Sub ĉiel' manĝas celeriajn kernojn,
 Ĉion ĉi tion oni nepre vidu
 En pleno, dum bela dimanĉ' Beŭkajra !
 Ĉiuj novgeedzoj el Arĝenclando, *
 El la Ĵarnego kaj el ter' Arleza, **
 Kaj ĉiuj geamantoj el Alpiljoj, ***
 Kaj ĉiuj amoparoj el Vaŭnaĝo, ****
 El la Vistrenko kaj la Gardonenko, *****
 En la sunlumo, fronte al popolo,
 Tie promenis en sia triumfo
 Sub foliaro freŝa de l'aleoj,
 Ĉiu, brakon alian gepremante.
 Kia plezuro estis ilin vidi
 Vagi, marĉandi la foir-aĉetojn,
 Kaj la "aj-ringojn" donaci, por ridi ! *****
 En tia tag' estis nur kri' de gloro
 Ĝoja en l'ombro de la promenejoj :
 Ĉu kampulino aŭ laboristino,
 Ĉu burĝino, ĉu eble markizino,
 Estis nur unu kri' por la plej bela
 Aŭ l'elegantec' de l' plej riĉaspekta
 Dum tuta jaro leĝdona pri modo.

LXXXIV

Ho junfeliĉ' ! Unuj al la aliaj
 En rivalec' pri ĝojo kaj ĝuemo
 Ili sin reciproke plezurigis.
 La tutan tagon kune en l'amaso
 De dudek naciecoj nekonataj,
 Vilhelmo, brak'-en-brake kun l'Angloro,
 Iradis vagante. La amasego,
 Kiel ondado fola, laŭhazarde,
 Portis ilin feliĉaj. Ŝi miregis
 Pri ĉio vidata : la stupmanĝantoj,
 La ĉarlatanoj sur siaj kaleŝoj,
 Ĝin ! Bum ! vendantaj siajn kontraŭvermojn,
 La ĵonglistoj, kiuj onin blindigas

* Arĝenco : La Beŭkajra regiono.

** Ĵarnego : insulo en Rodano inter Beŭkajro kaj Taraskono.

*** Alpiljoj (Alpetoj) : provencaj montetoj.

**** Vaŭnaĝo : valo inter Nimo kaj rivero Vidurlo.

***** Vistrenko, Gardonenko : valoj de la riveroj Vistro resp.
Gardono.

***** ringoj el vitro, kiuj rompiĝante doloretigis la fingron (aj!)

Per siaj artifikoj kaj lertaĵoj,
 La dancistin' kun ornamaĉoj, supla,
 En torĉolumo sur ŝnuro dancanta,
 Kaj Pulĉinelo kun sia Rozeta :
 - Rozeta ! - Nu, kio ? - L'etulo ploras !
 Ha ! necesis gardi sin de ŝtelistoj :
 Ofte, en grupo ĉirkaŭ komedio,
 Ili lerte priŝtelas ies poŝon;
 Por delikate el zon' ĉerpi oron,
 Iuj venis de Pariz', eĉ Londono !
 Sed, la plezuron de l'naivulino
 Partoprenante, Vilhelm' same gapis;
 Kaj, kiel en la klar' de fonto pura
 Estas agrable, en somera varmo,
 Mergiĝi por mildigi sian febron,
 Eniĝis li en la animon novan.
 Kaj ĉi tie, kiom da vidindaĵoj !
 Ejoj, kie vendiĝis "ĝimbeletoj" *
 El Albi', surtreditaj sur fadeno,
 La turkoj kun turban' vendantaj pupojn,
 La larĝapantalonoj, la grekoj
 Kun ruĝa ĉapo vendantaj tapiŝojn
 El Smirno, surbroditajn, kaj zingibron,
 Kaj roz-esencon bone vaks-fermitan
 En vitraj boteletoj : unu guto
 Sufiĉas por parfumi tutan domon !
 Jen koral', kolringoj el fajnaj perloj,
 Kaj jen ludiloj, beŭkajraj tamburoj,
 El kiuj, en infanec', ni krevigis !
 Jen ventumiloj, brilaj garnitaj,
 Kaj pupoj vestitaj aŭ tute nudaj.

LXXXV

- Nu ! ĉu la pentriston ni ne vizitos ?
 Kriis al la bela par' la kolegoj
 El Kaburlo. - Kie do li troviĝas ?
 Diris Vilhelm'. - Venu, sekvu la bandon !
 Kaj ĉiuj balanĉpaŝe enforniĝas
 Kun pip' en la dentoj, en domaĉon

* ĝimbeletoj : vd. piednoton, Kanto Dua, XX, p.26.

Kun ŝild-surskribo : "Kiu pentras vendas". *
 Tie Martegan', kiel fig' falthava, **
 Olda ĉirkaŭmonda marveturisto,
 Por monero, per sia tatuilo
 Sur la haŭto desegnis laŭdezire
 Ĉiajn signojn, bildojn, alegoriojn.
 Ĉiu elektis por si aŭ remilon
 Aŭ ankron de espero aŭ Krist-bildon
 Aŭ koron flaman. - Kaj vi, princo mia ?
 - Mi volas, ke el miaj bluaj vejnoj
 Elaperu la dio de la ondoj...
 Kaj gaje, tuj kuspante la manikon
 Sur pufa brakmuskolo li pentrigas
 Bildon de drako blua, flugilhava
 Kaj ŝajne viva sub la blanka karno.
 - Estas ja tio ! kriis Anglor', ĝuste
 Kia mi vin, Drak', vidis sub Rodano !
 Ho ! kiel bela !... Kiam mi memoras,
 Mi ruĝiĝas, aldonis ŝi mallaŭte...
 Kaj ĉu vi al Rodan' reiros, diru ?
 - Al Rodan', infano ? por kion fari
 Respondis la princ', nun kiam mi vidas,
 Nun kiam mi tenas, kiun mi volis !
 - Sed kion vi faros el mi ? - Ho dolĉa,
 Kion mi faros ? Mian idealan
 Grafinon de Montdragono, aŭ eble, ***
 Se vi preferos, tiun de Oranĝo.

LXXXVI

Ili en tuta folanimo iris
 Tra la stratetoj barakte homplenaj
 Sed nenion plu vidis : nek l'amasojn
 De drapiraĵoj, de lanaj "flasadoj", ****
 De silko orkolora, kruda, flaka,
 Kiu egalvaloras sian pezon

* franca kaj okcitana lingvoj havas nur unu vorton por "farbi"
 kaj "pentri". La Marsejla esprimo "Qui pinto vende" signifas :
 kiu farbas (nova sian butikfasadon) kaj pentras sur ĝi logajn
 skribojn kaj bildojn, tiu pli multon vendas.

Ĉi tie la "pentristo" estas tatuisto.

** ano de Martego (Martigues), pitoreska haveneto ĉe Berre-
 lago.

*** Mon(t)dragon : Drakmonto, nomo de vilaĝo provenca.

**** flasado : lanaja kovrilo, uzata ankaŭ kiel mantelo.

Da oro, nek ĉiukolorajn ŝildojn
 Traetenditajn super la stratetoj
 Blankaj de kalkofarbo, kun la nomoj
 De negocistoj el Montpeliero,
 El Brusio, el Ĝenevo, el Kadizo, *
 Nek la bazarojn, kiuj vin blindigas
 Per tiom da juveloj kaj belaĵoj;
 Nek aŭdis ili la kaskadet-bruon
 De la Beŭkajraninoj babilantaj
 Sub la arkadoj de siaj butikoj
 Aŭ sub pordetoj, pesante daktilojn...
 - Mi tamen vendu ĝin, mian saketon
 Da orpajleroj, diris la Angloro.
 Kaj ili kune iris en butikojn
 En malvarmetajn domojn kun pordetoj
 Festonitaj kiel en lando maŭra,
 Similaj al haremo kun odaliskoj.
 Kaj sub l'arkadoj, de volbo al volbo,
 Ridante ambaŭkune kaj flustrante,
 Ili blinde trapasis l'etendaĵojn
 De l' "franĉimandoj", lombardoj, armenoj, **
 De l' "estrelinoj", "maranoj" kaj "ĉinĉoj". ***
 - Mi devas vendi miajn orpajlerojn,
 Ripetis la knabino. - Venu, eta !
 Tion proponis al ŝi oraĵisto.
 - Ĉu or' el Cezo aŭ Anduz-Gardono ? ****
 - De Ardeŝ'. - Ni vidu ! la lertulino
 Verŝis l'orpulvoron en la teleron.
 Dudek eskudojn ĝi atingis. Diris
 La sinjoret' : - Orforgisto, el tio
 Faru por ni du glatajn fingroringojn;
 Sur unu metu drakon, sur l'alia
 Etan lacerton. Por ni tio estos
 Nia Beŭkajra foir-memorilo.

* Brusio : mezorienta haveno.

** franĉimandoj : nordfrancoj.

*** estrelinoj : britoj aŭ hansanoj; maranoj : hispanaj maŭroj;
 ĉinĉoj : hispanaj ciganoj.

**** Cezo kaj Gardonoj (Anduza, Alesa k.c.) : Cevenaj riveroj.

LXXXVII

Ho Dio ! kiel kontenta ŝi estis !
 Al lia kolo ŝi estus saltinta !...
 Sed en la hor', kiam la kabaretoj
 Nokte malpleniĝas, Vilhelmo vagis.
 Renkontis li la Venecianinojn,
 Kaj ek ! al la podi' de l'kantistinoj
 Pro nura ĝentilec' li altabliĝis.
 Pasiginte tagon kun sia bruna,
 Pro kontentec' revema, li ekŝercas :
 - Nu, diras li, tiun papan trezoron
 Kuŝantan en la puto Avinjona,
 Tiun rakon de dek du apostoloj,
 Tiun or-barbularon, kiun gardas
 Bazilisko, kiam ni ĝin elĉerpos ?
 - Sinjor', estu trankvila, diras unu :
 Ni havas iun, kiu plene taŭgas
 Por provi l'aventuron kaj mortigi
 La baziliskon, se necese. Dua
 Aldonis : - Oni facile komprenas
 Ke tia eltrovo ne estas grava
 Por la princo : oro al li ne mankas,
 Ĉar li estas amindumant' de iu,
 Kiu da ĝi rikoltas en riveroj !
 - Sinjorinoj, la princ' respondis, tiu
 Ja nur bezonis, por esti amata,
 Ekflori (ĉu iu estus ĵaluza ?)
 Kiel violo humila kaj tamen
 Elekte priserĉata en la ombro
 De sub arbustaro, zun zun lanlero !

*

LXXXVIII

Vilhelm', kantante sian kanzoneton
 Je l'son' de kelka fora mandolino,
 En malvarmeto de l'nokto, ĉe lumo
 De malmultaj lanternoj, kiuj unu
 Post alia estingiĝas, reiras
 Al la haveno por tie kuŝiĝi.
 Kaj kiel fiŝo, kies akvo estas
 Malklarigita, Vilhelmo sin banas

* moka rekantaĵo.

En la memor' de l'klara historio
 De sinjoret' Aŭkasen' el Beŭkajro *
 Kaj de l' bela sklavino Nikoleta
 Al kiel edzino rifuzita :
 Kiam ili, aparte enŝlositaj,
 Sukcesis foreskapi, kaj liberaj
 Kaj gajaj, en bosk' ambaŭ sin retrovas
 Kaj interkisas en la hel' de lumo;
 Kaj kiam li sidigas ŝin sur selo,
 Kaj rajde ŝin forportas al la maro,
 Poste ĉe Ajgomorto enŝipiĝas
 Por veli al la land' de Turo-luro !
 Nun tie kaptas ilin Saracenoj
 Kaj ilin revendas, ŝin en Kartago,
 Kie ŝi estas rekonata kiel
 Filino de la reĝ', lin en Beŭkajro,
 Kies popol' salutas lin sinjoro.
 Kaj kiam Nikoleta en kostumo
 De juna gurdetisto, ĉe l'piedo
 De la peron' de Aŭkaseno venis,
 Kaj tie kantis pri ilia amo.
 Fine la geedziĝo en Beŭkajro
 En la kastel', ĉe l' triangula turo !
 - Kiel bela ! diras Vilhelm', ĝi iel
 Similas l'aventuron kun l'Angloro...
 Sed kontraŭ li abrupte ombr' ekstaras,
 Kaj, sur la dorson fortege frapita,
 Vilhelmo falas subite al tero.
 Aj ! povra li ! Sako plena de sablo
 De malantaŭe frapis. De l'mandoloj
 La sono svenas en lontan'. La nokto
 Mutiĝas... Kiu frapis ? Dum foiro
 Neniu scias : ve al kiu falas !

LXXXIX

Sur la kajo longe iras kaj venas
 La Kundrianoj morgaŭ forirontaj.
 Jen foirfino. Per la norda vento
 La maraj ŝipoj, preter la Herbejo,
 Jam defilas. Ĝis proksime de l'pinto
 De Malagot' vidiĝas veloj blankaj **

* Aucassin et Nicolette, aventur-romano (XIIa j.c.)

** Malagoto : insulo en Rodano.

Svingataj de la vent'. Sed preparante
 Sin por la pena naĝo kontraŭflua,
 La navigistoj sur sensala akvo, *
 Mastroj de barkoj kaj mastroj de tero **
 Bajloj, pruistoj, avenistoj, iras
 Por rekunligi la kabl-ekstremaĵojn.
 Fiksataj estas l'ole' de l'montetoj,
 La bona vino de Sankta-Georgo,
 Rizo lombarda, miel' de Narbono,
 La salo de Pekajo, la bareloj ***
 De Frejus'-anĉovoj, sukerkonusoj
 Kaj sapo fabrikita en Marsejlo,
 Urgê ! Ĉar nokte la princ' en Vinjaso ****
 Pagos la Rodan-feston kaj festenon.
 La princo ja ne mortis. Sur la sablo
 Oni lin trovis. Jam ne batis vejno,
 Sed dank'al influ' de sia astraro
 Aŭ eble de sia rezist' natura,
 Li reviviĝis - ne mortos ĉi-foje -
 Nun Johan' Roĉ' aparte al Angloro :
 - Neniu vund' en la korp', kaj nenion
 Li volis diri. Ĉu eble li falis
 Pro ter-malsano ? Ne estas scieble... *****
 - Nu do, Johano-Fluto, vi ne scias,
 Ke l' Drako, se li volas, aliiĝas,
 Respondis la knabino, sin elturnas
 En centmil manieroj ? Nu, hodiaŭ
 Plaĉis al li lasi ĉe l'riverbordo
 La homan korpon, kaj enprofundiĝi
 En l'akvon, por viziti, ĉu mi scias ?
 Groton, en kiu li sep jarojn gardis
 Tiun Beŭkajran tuko-lavistinin,
 Kiu sian batilon lasis fali
 En Rodanon, ĉi tie, ĉu vi aŭdis ?
 - Jes, la pruiŝt' respondis, de fantomoj
 Nenio nin mirigu. Sed, ĉu vere
 Ĉu ne, vi estas bela folulino
 Fidante liajn belajn vortojn dubajn,

* La mastro de tero supergvidis la manovrojn sur la bordo.

** Bajlo : estro (de ĉevalaro).

*** Pekajo : salmarĉo ĉe la okcidenta brako de Rodan-delta.

**** Vinjaso : alta kvartalo de Beŭkajo, kun gastejo.

***** Ter-malsano : epilepsio.

Sen vidi, povra, ke li vin tromplogas
 Kaj ke li, elpumpinte vian vivon,
 Vin ankaŭ lasos en form' de kadavro !
 - Hou ! diris la Anglor', ĉu lacerteto
 Ne estas fratineto de la Drako ?
 - Li vin fascino ! - Se li min fascino,
 Nu ! estu mia sorto ! Mi volonte
 Lasos min fali en la englutejon
 Kiel folio en abisman faŭkon !

XC

23 Mastro Apjan' kriis : - Pro Dia nomo !
 Ĉar li la fin-regalon volas pagi,
 Li estas bona princo ! - Al ĥimero ! *
 Respondis la viroj, endas impregni
 La tinon de l'olda Sankt-Nikolao !
 - Ni iru, knaboj ! Ek ! la tuta vivo
 Supreniras al Vinjas-kabareto.
 De tie tuta l'Argenc-land' vidiĝas,
 La Silvo-Godeska, kie cervino
 Gardis la Got-reĝon ĉe l'Ermitejo
 De l'granda Sankta-Ĝilo. Tie kuŝas
 La oldaj globkuglegoj el ŝton' glora,
 Kiu, pafitaj per niaj kalabroj **
 Tie premegis la kruc-militistojn
 De Simon' de Montforto : ŝton-amaso ***
 Sepfoje sankta, atesto lastega
 De popol' venkita, sed ne sen lukto,
 Kun rid' kantanta sian martirigon.
 Kiam la kolegar' ĉe l'tablo sidis
 Ĉirkaŭ Sinjor' Vilhelmo : - Ĉu vi scias,
 Fratoj, li diris, al kiu mi emas
 Dediĉi mian lastan kunmanĝadon
 Ĉi en Beŭkajro ? Al la patriotoj
 De l'Rodan-bordo, al la sentimuloj,
 Kiu en temp' antikva sin tenadis
 Ĉe l' kastelego antaŭ ni staranta !

* La provenca vorto "ĥimero" signifas precize (imagitan) hibridon de taŭro kaj azenino.

** kalabroj : katapultoj.

*** Dum la krucmilito kontraŭ la Albigensoj, la nordfranca ĉefo Simon de Montfort vane siegis la kastelon defendatan de la Beŭkajranoj.

Al tiuj riveranoj kuraĝegaj,
 Kiuj sciis gardi siajn kutimojn,
 Sian liberan havenon, kaj sian
 Rodanon liberan ! De tiuj patroj
 Vigle falintaj en la batalado,
 Se nun la filoj forgesis la gloron,
 Des pli malbone por ili, la filoj !
 Sed vi, la knaboj kiuj ĉiam savis
 La krion : Imperio ! kiuj brave,
 Senscie, baldaŭ, eble eĉ tre baldaŭ
 Por ŝirmi Rodanon en ĝia vivo,
 Estas riskontaj la lastan batalon,
 Kun mi, fremdul', sed kiun surradias
 Kaj ebriigas via lum' Rodana,
 Levu la glasojn al l'afer' venkita !
 Ektintis en la manoj ĉiuj glasoj.
 Mastro Apjan', la barĝanoj aŭskultis
 Mirkonsternite, sen bone kompreni,
 Sed respektplene kaj mute. La princo
 Galanta tiel daŭrigis : - Ho povraj
 Vi kun la bela trajn' de viaj barkoj,
 Kun tiuj longaj vicoj bele blankaj
 Almonte posttrenataj de la kvaroj
 Da ĉevalegoj tirantaj la kablون,
 Eble al lasta misfortuno kuras...
 Sed, ho posteuloj de la popolo,
 Kiu stirilon trimil jarojn tenis,
 Ĉu do utilas priĝemi aferon
 Perditan ? Kiel ĉe l'fama kastelo
 De Beŭkajro, kiel la provencanoj,
 Por bela fino, fronte al la suno
 Kaj al la granda Rodano, ni faru
 Kune la Rodanadon kaj Sunfeston, *
 Kaj trinku antaŭ la barb' de l' venkintoj
 Ĝenestet-vinon, kiu revigligas ! **
 Kaj muĝu en Rodanujo Rodano !

* La sunfestado okazos la 12an de septembro 1970.

La suno nun subiris super Nimo,
 Disetendante longe de l'rivero
 La faldojn de sia mantel' skarлата

* la sunfestado, dum kiu oni regalas la grenrikoltistojn.

** vino de Beŭkajra vitgrundo.

Kaj de radioj la lastan rebrilon.
 Sur la kastel' de la Tarasko, kie
 Reĝo Renato, ĉe sia fenestro
 Ŝajnis la lastan Rodanadon beni.
 - Je la sano de l'mastro ! - Kaj de l'princo !
 Vivu lia vizaĝo ! - Kaj ni vivu !
 En ĝojo longe plu ni navigadu !
 - En sekur' ni revidu Andanceton !
 - Kaj Sanktan-Maŭricon ! - Kaj la ŝtuparon
 Kundri-havenan, kie, se Di' volas,
 Retrovu ni la tutan familion
 En bona stat', post apenaŭ monato !
 Kaj ili manĝas la brufadon densan, *
 El dikaj pecoj faras belan frandon,
 Kaj ĉerpas el kruĉet'. Sed sub la luno,
 Poste, descendante al la barkaro,
 Diris la pruisst' al Jozef' Rebori :
 - Ĉu vi ne trovas, ke la dir' de l'princo
 Iel similas al tiuj sorĉaĵoj
 De Turno-Rok', pri kiuj l'Anglor' diris ?
 - Ha ! mi ne scias, respondis l'alia,
 Sed estas iu tondra malfeliĉo,
 Kiu nin ĉiujn minacas, eĉ tiun
 Bonan bakalaŭron, kiu nin helpas... **
 Ĉu li hieraŭ ne kuŝis simila
 Al mortinto ? Ni estas ja, ho viro,
 En jarcent', kiun kornbatas Diablo !

* brufado : speco de raguo.

** bakalaŭro : en antikva senco : junulo.

Kanto Dek-unua
La Re-almonto

XCII

Ili kuŝiĝis. Je la matenblanko,
Tuj kiam pepis la Rodanaj birdoj,
Ek ! ek ! la veturistoj, la barĝanoj
Jam ĉiuj staras. Por la reascendo
Ili sapinojn kaj pinelojn tiris, *
Tiru kaj puŝu ! Sur l'alia bordo
Ili devolvas la du longajn kablojn
Ligotajn al tirmasto de l'ĉefbarko.
Al tiuj ili nodas la kabletojn
Por aljungi la grandajn tirĉevalojn.
Ĉe l'antaŭkablo de la granda barko
Dudek ok ĉevaloj kune ekpenas,
Apartigitaj kvarope-kvarope
Kun por ĉiu kvar' ĝia kondukisto.
La kvar unuaj, tute blankaj, portas
La bajlon, kiu havas la mastrecon
De la okdek ĉevaloj de l'jungaĵoj.
Al la malantaŭa kabl' aldoniĝas
Dek pliaj kvaroj; al la karat-tablo **
Dek du; kaj al la cetero de l'vico
La resto de l'superbaj kap-rompuloj.
Henante al la marĉaj ĉevalinoj
Kaj skrapante la teron per la hufoj,
Ho ! kiel belaj, kun kolharar' flirta,
Kun la ruĝaj kvastoj de siaj bridoj,
Kun la ĉabrako blua de lan-flokoj
Kaj la kolum' plena de kupraj najloj !
En Taraskon' ili manĝis avenon;
La hufferist' ilin akompananta

* sapinoj, pineloj : vd. piednotojn p.13.

** vd. piednoton p.13.

Lastfoje ilin zorge reviziis;
 La ter-barĝistoj, ĉe l'zono portantaj
 La ŝnuretojn, per kiuj ili penas,
 Kiam necese, ripari la rompojn
 De l'kabloj, estas pretaj. Sur la barko
 L'olda mastro Apjan', vidante sia
 Tiun potencon ĉevalaron, kiu
 Sur bordo de l'rivereg' etendiĝas,
 Kaj kontemplante la multopan aron
 Da viroj, kiuj je lia komando
 Tretas la segonalojn de Rodano, *
 Rigardante la floton kaj la streĉon
 De l'altaj blankaj tendoj kamelantaj **
 Sur la amaso de la kargo-varoj
 Bone fiksitaj kaj frajte notitaj
 De la skribisto, l'olda mastro ŝvelas
 En sia orgojl' de ekipaĵestro.
 - Kaj nun, se ili volas preterpasi,
 La Kuminal' famegaj de Serjero,
 La Bunardeŭ de Lion', tiel riĉaj,
 La Marturet' arogantaj, prancantaj ***
 Kaj la bovistoj el Izer', Grenoblo
 Kun la pezaĉaj bovoj kotŝmiritaj,
 Ili venu ! ili venu kaj provu !
 Ilin Kaburlo devigos penegi !

XCIH

Dirinte, li per la ĉapel' salutas
 La krucon de l'ekipaĵo starantan
 Sur la pobo. Trempinte sian fingron
 En Rodan', devote, noble, li faras
 Krucosignon, kaj li laŭte komandas :
 - En nom' de Di' kaj de l'Sankta Virgino,
 Tirigu la kablon ! Tuj, aŭskultinte,
 La pruiŝt' ripetas : - Tirigu la kablon !
 La tera mastro siavice krias :
 - Ho ! tirigu la kablon ! kaj en la sekvo,
 De unu al la alia, almonte

* segonalo : rando inter riverbordo kaj digo, vojo por tirĉevaloj.

** kamelantaj : ŝvelantaj kiel kamel-ĝiboj.

*** Familinomoj de konkurencaj barĝar-mastroj.

La kri' resonas ĝis la bajlo. Tiu
 Ekklakigas sian vipon. La dudek
 Kvaropoj, sub pik' de la vipŝnuretoj,
 Kune ekmoviĝas. Jen la ŝnuregoj
 Disvolviĝis, longiĝis al plenstreĉo,
 Kaj, kiam ĉiuj barkoj fine startis,
 La granda mastro diras : - Nun, trankvile
 Tirigu antaŭen. La longa vico
 Sur la pavimo kruda de l'tervojo,
 Trenante kontraŭ l'akvoflu' vipanta
 La pezan ŝarĝon de la barĝotrajno,
 Bele, laŭ sia takto, envojiĝas.
 Kaj sub la branĉoj de l'altaj blankpoploj,
 En la silento de la Rodan-valo,
 En la belego de la sunleviĝo,
 Je l'paŝ' de l'belaj ĉevaloj penantaj
 El la nazegoj vaporon pelante,
 L'unua ĉevalisto preĝon diras.
 De lok' al lok' la aliaj portantaj
 Sur la kolo la vipon, kiu pendas,
 En sekvo vojirante, krucosignas,
 Aŭ por per tindro ekbruligi pipon,
 Frapas sur la fajroŝtonon. La trupo
 Longa eble je tuta kilometro
 Iras preter la salikoj multbranĉaj,
 Kie la kablo frotas, implikiĝas.
 Armitaj per stang' sur ŝultro tenata,
 La terbarĝistoj per rigardo sekvas
 Atente tiun enorman ŝnuregon,
 Por ĝin saltigi super la obstaklojn,
 Aŭ per ŝnuretoj, kiujn ĉe la zono
 Ili volvis, senĉese tuj riparas
 Ĉe hokostango ĵus rompitan ŝnuron.

XCIV

Sed intertempe, ĉe la ekstremaĵo
 De l'kablo, tie for sur la ĉefbarko
 De pob' al pru' gvatante l'olda mastro
 Diris : - Pruiŝt', rigardu tien suben :
 Post tiuj malbenitaj akvoŝveloj
 Oni neniam scias pri la fundoj...
 - La suverena ! kriis Johan' Roĉo

*

* La suverena : vd. piednoton p.17.

La sondostangon enprofundigante.

- Do bone ! Nun al maestr' Apjan' la princo

Demandas : - Ĉu Rodano tiel alte
Ŝvelas, kiam ĝi tute "fierigâs" ?

- Sur tiu tuta vasta ebenaĵo

Mi vidis, diris la oldul', Rodanon

Ŝvelintan pro la pluvegoj diluvaj

Ĵetegi siajn ondojn ĝis la krono

De l'morusarboj. Super la perditaj

Grenrikoltoj, super la afliktiĝo

De la grundo, mi vidis boatetojn

Naĝantajn tra la kampoj porti helpon

Al farmistoj sur iliaj tegmentoj.

Jen tie ĉi, sinjor', en Valabrego,

Por esti sur savtero, tri tagnoktojn

La homoj rifuĝis sur la tombejon !

Tremige, nokte, aŭdi la ronkadon

De tiu mar' sovaĝa, mallumega,

Kiu, digojn kaj barojn krevigante,

Forportis la arbojn kaj la rikoltojn,

La tutajn fojn-amasojn. Mi memoras

Pri povra hund' kaptita de l'inundo,

Kiu sur la supro de pajlostako

Floŝis, pro tim' tremanta kaj jelpanta.

Sed ĉu oni ne diras, ke sur l'ondo

Pasis eĉ iam salika lulilo,

En kiu kuŝis infanet' ploranta ?

Kaj la fusilpafoj en la mallumo

Aŭdataj sur la insuloj, pafitaj

De l'povraj izolitoj de l'rivero !

Ho ! ĉe tia veter', kiam vi havas

Tian barkotrajnon kun dudek kvaroj

Da ĉevaloj, ne estas eta zorgo !...

- Ho ! he ! tirigu la kablون antaŭan !

Mi diras : ne ekzistas akvoŝvelo

Tiel raba, tiel timige horora

Kiel tiu Rodan' en furiozo.

De kie, tondre ! povas do elfonti

Tiom da akvo ? Nepre el diluvo !

De la montara konservuj' grandega !

Ĉar, se vi vidus, kiam ĝi ondegas

Transportas rubojn kaj besto-kadavrojn

Tiajn, kiajn neniam oni vidis !...

- He ! tirigu la kablون malantaŭan !...
Feliĉe la biz' donis ekbalaon,
Alie ni estus ĉion perdintaj,
Barelون kaj vinon. En la tempesto
Ni perdis kvar fortikajn tirĉevalojn
Ja po pli ol cent piŝtoloj valorajn !

XCV

- Ho mastro, hoŭ ! ekkriis de la bordo
La avenisto, kiu, antaŭ ĉiuj
Rajdante, priondis la travadejojn.
- Kio ? demandis mastr' Apjan'. - Ĉi-foje
Ĉu ni en Maliven' tagmanĝos ? - Kial *
Ne en la Granda Farm' ? - Leviĝas vento **
Kaj estus bone malstreĉi la tiron.
- En Maliveno do ! Sur la karato ***
Estas plantita stang', de kiu pendas
Dikaj viandpecoj, kruda provizo
Sekigita de l'sun'. Oni detranĉas
Brave kelkajn pecojn por la marmito,
Kaj la barko-knabeto ekkuiras
Jen la Angloro, al kiu li helpas,
Diras al li : - Knabeto, se mi iam
Edziniĝos, mi iĝos vin gustumi
Sukermiĝolajn. - Sed, Anglor', kun kiu
Vi edziniĝos ? - Ĉu tiun vi vidas
Tie sur la granda barko, kun blonda
Barbeto ? - Jes, princo Vilhelmo. - Ĝuste !
- Anglor', vi ja ne estas kompatinda !
- Ĝin volis la planed'. Kiam aferoj
Estas skribitaj en la astroj, ili
Nepre okazu. - Kun la princ' ! Kaj kiam
La nupto ? - Pri ĝi ankoraŭ ne temis,
Sed supozeble mia sort' ekfloros
Antaŭ ol velkos la flor' de butomo.
- Do vi estas riĉa ? - Kial ? - Ĉar princo
Vin edziniĝos... L'or-rikoltistino
Ekridis : - Mi, povreta, kiu gajnas
Tage po dek du soldoj ! - Ho ! kredeble
Vi multon havas, de kiam vi fosas

* Maliveno : insulo en Duranco.

** Granda Farmo : loko apud Aramono.

*** karato : vd. piednoton p.13.

La sablojn de Ardeŝo kaj la grotojn,
Kie laŭ fam' vidiĝas mirindaĵoj !

XCVI

- Tion ĉi oni diras, jes, sed kiu
Tiel funden penetras ? Sciu, diris
La knabino, ke ne estas facile
De la krutval' supreniri. La klifoj
Terure vertikalaj kiel muroj
La rokoj de la Korvo, de la Nizo,
Kaj supre la kastel' de Damo Vjerno *
La Fabo, Seĝo, Katedro kaj Lejlo,
La Ŝtonego de l' Hundo... Alveninte
Fine ĉe l'enirejo de l'kaverno,
Tie necesas ne esti timema !
Vi trafas trairejon sub la tero,
Kiu kondukas kien ? Kiu scias ?
Eble al la diablo ! Nun, rampante
Kun lumo, se vi riskas vin en tiun
Sombran abismon, ha ! oni ja diras,
Ke estas belege ! Vi trovas grotojn,
Kavernojn, ĉambrojn, halojn kaj kapelojn
Tute diamantajn, kiuj briligas
Al la okuloj papiliojn. Tie
Estas, oni diras, kirko belega
Kun siaj baptokuvoj, kun orgenoj,
Ujoj por sankta akvo, kaj tribunoj;
Tie estas ebena dancohalo
Kun lustroj de la plafono pendantaj,
Garnitaj de mil kaj mil kandeletoj;
Tute proksime troviĝas banĉambro
Plena de akvo kristala, tombejo
Kun siaj grandaj tomboj tute blankaj,
Longaj aleoj de arboj ombrataj,
Teatro kun impona kolonaro;
Mallonge : tuta urbo mireginda,
Vakua, vidva de siaj loĝantoj...
Tamen vidiĝas dikega testudo,
La Lert', aliaj abomenaj bestoj... **

* Damo Vjerno de Balazuko (XIIIa jarcento). Kastelo ĉe la maldekstra bordo de Ardeŝo.

** La Lerto : granda fantastata reptilio.

- Sed vidu, diris la knabo subite,
 Sur via ring' unu el tiuj bestoj !
 - Ĝi estas Drak', mia foirdonaco.
 - De kiu ? - De mia fianĉo tie.
 - Bela ĝi estas ! - Malkovru la poton !
 Kriis l'Angloro, aŭ ĝi tuj elversos !

XCVII

Jen ili estas ĉe Maliven'. Haltis
 La granda ĉevalaro, kaj Kaburlo
 Alnaziĝis per pru' inter arbetoj,
 Kaj kune la sep barkoj. La ĉevaloj
 Dejungitaj sin paŝtas ĉe l'salikoj.
 Kaurante sur la ter', la ĉevalistoj
 El sama plad' trioje manĝas supon;
 En band' aparta la barganoj sidas
 Ĉirkaŭ la ĉefmastro sur la sapino. *
 Mastro Apjan', post rapida manĝeto,
 En zorgo turnas la kapon al nordo,
 Kaj diras : - Tiu mistralo, mi timas,
 Blovos. Ĉu vi vidas grumelan nubon
 En formo de pintiĝintaj cipresoj ?
 Kaj la timon', aŭdu, kiel ĝi grincas;
 Kaj la manoj, sentu, kiel malglataj :
 Ĉio ĉi venton anoncas. Paŭtante,
 Josef' Ribori aldonis : - La luno
 Estas plena : povus veni tempesto...
 - Tial, konkludis la mastro, post kiam
 Estos trinkintaj tiuj jungitaroj,
 Hej ! senprokraste metu la kolumojn.
 Tiel fariĝis; kiam la hufferoj
 De la okdek ĉevaloj estis ĉiuj
 De la hufoforgist' ekzamenitaj,
 Oni rejungis ilin, kaj : - Tirigu !
 - Hoŭ ! travadist', ĉu truoj en Duranco ?
 - En kelkaj lokoj. Venigu la barkojn.
 Bajlo, tiru po kvaroj la ĉevalojn, **
 Ni envojigos l'unuajn. En fosoj
 L'aliaj sekvos. Tenu la vadejon.
 Ĉu pretaj ? - Pretaj ! En la malsekura
 Akvo la ĉevalegoj time ronkas

* sapino : vd. piednoton p.13.

** bajlo : vd. piednoton p.13 kaj 101.

Kaj enpaŝas. Dum, poste, la barkaro
 Per longa kablo sur Rodan' vojiras,
 Je klak' de l'vipoj, je krioj de l'viroj,
 La tuta viceg' iras en riveron.
 La travadist', kondukistoj, servistoj,
 Side sur la ĉevaloj aŭ fork-rajde.
 - Alvenu ! Urĝu la Rubinon ! Tuŝu
 La Maŭron ! Firme tenu la Bajardon,
 Ke ĝi ne dronu ! Dja ! hot ! Tremetante,
 Poste skuante sian kolhararon
 Malsekan, venke l'karavan' eliras
 Kaj reprenas la vojon laŭ la digoj.

XCVIII

Nun la holanda princo kun l'Angloro
 Rekuniĝis sur barko. La knabino
 Diris : - Drak', kio estas la fabelo,
 Laŭ kiu, nokte, sur la Rodan-bordo,
 Vi kuŝis morta ? Vilhelmo respondis :
 - Bela ĉarmulin', fabel' ĝi ne estas,
 Ĉar iu perfide per sablosako
 Min frapis ĉe dors'. - Kiu do ? - Kredeble
 Subtenant' de tiuj venĝemulinoj,
 Ĉar mi forgesis pri foirdonaco.
 - Ho ! la ĵaluzaj ! Sed ĉu vi ne devis
 Ilin ensorĉi ? kolere ekkriis
 L'Aramonanin'. - Ĉu vi do ne scias
 Mia bela, ke iu sur la dorso
 Per sablosak' frapita, sen postsigno
 Ne resaniĝas, kaj pro l'kontuz' mortas ?
 Li ridetante diris : - Infanino,
 Ĉu vi do kredas, ke la Drak' Rodana
 Povas tiel mortigi ? La petola
 Knabin' dum temp' restis al li gapanta;
 Poste ŝi diris : - Ja stulta mi estis !
 La feo, la kobold' reĝo de l'ondo,
 Mia dio, mia ĉio, eterne
 En blua flu' junon renoviganta,
 Kiel do estus eble, ke li cedu
 Al la komuna leĝo, la mortado ?
 Ne, mi vin vidas, Drako, kia devas
 Esti la spirit' fantasta de l'granda

* propraj nomoj de ĉevaloj.

Rivero, ne mortonta ! Kiam via
Rigardo vokas min, jen al mi ŝajnas,
Kvazaŭ mi irus en plej plena dormo
Al plezuro neniel detruenda.
Ne scias, kien mi iras. Ĉu perden ?
Sed perdiĝi kun vi, al mi ja plaĉas !

XCIX

Vilhelmo de Orang' etendis brakon
Super la akvo onde trabatata,
Kaj diris : - Fidu vi al mi, Angloro;
Tial ke mi libere vin elektis,
El mirindaĵoj belaj de l'fabelo,
Tial ke vi estas tiu senzorga,
Kiu en am' fandiĝas kiel vakso
En lumo, tial ke vi vivas ekster
Niaj ligaĵoj kaj niaj ŝminkaĵoj,
Tial ke en via sang', via sino
Kuŝas la renoviĝ' de l'oldaj sukoj,
Mi, laŭ princa fidind', al vi promesas,
Ho Rodan-flor', ke neniu alia
Ol mi havos la feliĉon vin pluki
Kiel am-floron kaj kiel edzinon.
- Sed kiam ? Ĉu baldaŭ ? Ŝi spontane
Diris. Vilhelm' respondis : - Knabin' bela,
Iun baldaŭan tagon mi ĝin diros.
Ĉu aŭdas vi la blovantan mistralon ?
Ĝi estas l'anonc-muziko majesta
De nia nupto. La Rodan-aero,
La foliaroj, la bela ĉielo
Kunkantas por ni ambaŭ la preludon.
La vent' pli kaj pli, per siaj reblovoj
Frapadis ja la longan tirbarkaron.
La almont-iro, ĉiam pli peniga,
Tirigis la ĉevalojn, kies tufoj
De kolharar' furioze taŭzitaĵoj
Hirtiĝis kiel grandaj plumornamoj.
Kaj la sun', retirigante en l'arko
De siaj longaj svenantaj radioj,
Jam malaperis ĉe la horizonto,
Kiam Kaburlo kaj l'aliaj barkoj
Ĉe l'Avinjona kajo albordiĝis.

- Al la ponton' ! Kaburl' al Imperio !
 La Kundrianoj, tirigu la kablon !
 En la haveno vokas infanaro.
 Ĉiu al ili kuras, akre krias.
 Nun la barĝanoj volvas siajn ŝnurojn,
 La ĉevalistoj maljungas la bestojn.
 Enfornigante en la Marmit-Pordon *
 Por la vespermanĝo kaj la dormado
 Ĉe la Malglata, gastigant' ilia **
 Ili iras al stal'. Iom post iom
 La granda kuirejo plenpleniĝas.
 Lavinte siajn manojn ĉe la puto,
 Ili viŝas ilin per tuk' ĉeklinka,
 Kaj sur la benkoj, dorse al la muro,
 Ili en vico brue sin sidigas.
 Kun kuspitaj manikoj, servistinoj,
 Kiuj pro ĉiu pinĉo rideksplodas,
 Fortike portas pladojn sur la tablojn.
 Ho bona Di' ! la enormaj pataĵoj
 De bova sang', potoj de grasaj tripoj,
 Vinsaŭcoj, braĝo- kaj krado-rostaĵoj,
 L'omlet' farĉita per berlofolioj ***
 En larĝajn dikajn ventrojn englutiĝas.
 Dume rondiras la korbo-botelo,
 El kiu ĉiu, kubuton levante,
 Laŭvice verŝas al si plenajn glasojn.
 Finfine venas ujego da supo
 Kun fromaĝ', en kiu certe paŝtisto
 Plantante sian bastonon ne povus
 Transsalti ĝin ! - Nu, ĉu ni kantu iom ?
 Subite diris l'ekipaĵa bajlo
 Frapante ŝultron de la dika Toni.
 Kaj la piloto, glason eltrinkinte
 Kaj klariginte sian gorgon, diris :
 - Nu, knaboj, voĉu, ĉar helpo necesas !

* enfornigante : enirante kvazaŭ en fornon.

** la Malglata : kromnomo de variol-markita viro.

*** berlo : genro el la familio de umbelacoj, el kiuj unu specio
 kun larĝaj folioj estas kultivata simile al celerio.

Vin, ho bela gastigantino,
Salutas ni, senzorgaj knaboj,
Kiuĵ malgajon ne kuntrenas,
Kiam ni tiras niaĵn ŝipojn.

Bona pilot' en la descendo
Tenas vojaĝon vigla gaja,
Sed por revidi Ŝton-Encizon
Necesas en lantern' oleo.

**

Prenu l'olivojn sukoriĉajn,
Kaj faru por ni bonan saŭcon :
Se portas ni ledpantalojn,
En la burset' ne mankas mono.

En Provenc' ni faris razion
Kaj rabis la Revestiduon;
Ni ŝarĝis nin kvazaŭ abeloj,
Sed l'ond' fiera ĉion portas.

La vino de l'Rodan-montetoj
Estas likvaĵo gustuminda,
Se nur ne estas ĝi miksita
Kun l'akvaĉ' de l'granda abismo.

Por sorbigi la viandpecojn
Kaj igi nin iome kanti,
En la gamelon de la supo
Da ĝi ni metu kuleregon !

Se poste venos akcidento,
Aŭ se sablaĵon ni tuŝegos,
La perdo estos por la mastro,
La peno por la bargistaro !

CII

Sed, dum plenmana aplaŭdado sonas,
La Avinjonanaj portistoj, ĉe tablo
Kontraŭa : - Ĉu ne l'patro de l'Angloro
Tiu dikul' kantanta ? ili diras.

* La kanzono de la piloto, kiel tiu de la Venecianoj, estas el rimaj versoj en la provenca originalo.

** Ŝton-Encizo : Liona kvartalo.

*** Revestiduo : Rodana haveneto apud Oranĝo.

- Fulme ! ne miru, ke li emas kanti,
 Vidu : lia filino trovis mastron.
 Kaj ili moke montris la knabinon,
 Kiu babilas kun la blonda princo.
 - Tiuj timuloj, kriis Johan' Roĉo,
 Kion volas ? - Kaj vi, ho pezulaĉo,
 Kion volas vi mem ? - Rompi la faŭkon
 Al pedikuloj, kiuj al ni rompas
 La pajlon ! - Vi, nom' de Dio ! do venu
 Eksteren ! kriis fanfarone unu,
 Nome Kekino la luktisto : iam
 En lukto-turnir' iu Lionano
 Lin sternis sur la dorso, kaj pro tio
 Kontraŭ nordanoj portis li ĉagrenon.

- Venu eksteren : li blekis - Ho fia
 Sentaŭgulaĉo, speco de simio !
 Replikas la pruiŝt', - Vi povas veni
 Kvarope, eĉ sesope ! La koloso,
 Trapaŝante la tablojn per ekmovo,
 Saltis en la mezon. Sed la barkanoj
 Tuj intervenis. En la konfuzego,
 La benkoj malekvilibre leviĝas,
 L'okuloj ambaŭflanke furiozas,
 Interkruciĝas la mortaj insultoj :
 - Ho ledpugaĉoj ! Ho kapromanĝuloj !
 - Ho vi murdintoj de Marŝalo Bruno,
 Kiuj lin poste trenis en Rodanon !
 Aj ! aj ! aj ! pluvos la teruraj batoj,
 Kiam mastro Apjano krias : - Haltu !
 L'unuan moviĝonton mi bategos
 Per tiu kruĉ'. Amas' de drinkemuloj,
 Ĉu vi ne vidas vin, ĉiuj ebriaj
 Kun l'akro de l'vinaĉ' en viaj buŝoj !
 He ! se vi volas batali, vi havas
 Dum tuta somer' sur Rodan' turnirojn
 Ĉe Sankta-Spirit-Pont', ĉe Roko-Maŭro,
 Kie krome ? en Ĝivors', en Valenco...
 Kun lanc' en pugno, ŝildo sur la brusto,
 Je ĉies vido, en plena sunlumo,

*

**

25

* Aludo al provenca kutimo : kiam du viroj insulte interdisputas, se unu el ili metas pajleron sur sian ŝultron, kaj la alia ĝin forprenas, tio estas nepra signalo de pugna interbatalo.

** Por Avinjonanoj, Liono kaj eĉ Kundrio estas nordo.

Ĉu estas io pli digna kaj nobla
 Ol bela turniristo nudabrusta
 Firme staranta sur l'alta tabulo,
 Kiu l'alian fleksas kaj faligas ?
 Memoru, Johan' Roĉ', pri la dimanĉo,
 En San-Pedro-de-Bovo, kiam (tamen
 Vi estis ja tre juna) vi sukcesis
 La grandan Mizerin' turne faligi.
 - Mastro, diris Johano, mi memoras.
 - Kaj vi eĉ ne demetis vian jakon !
 - Ja vere. - Nu, infanoj, al kuŝejo,
 Se vi ne volas, ke leviĝo estu
 Laŭ provenca dir', longe de Rodano ! *
 Kaj je la laŭta voĉ' aŭtoritata
 De la prudenta mastro kvietiga,
 La barkanoj alvane sub la tendoj,
 La ĉevalistoj supre en fojnejojn,
 Ĉiuj iras al Sankta-Ripozejo.

* vortludo : la provenca vorto "levado" signifas leviĝo kaj ankaŭ
 terdigo sur riverbordo.

Kanto Dek-dua La Katastrofo

CIII

Kablon tirigu ! Tuj kiam aperas
La brilo de la suno, realmonte,
Denove Kaburl' en vojo metiĝis,
Per tranĉa pruo fendante Rodanon
Kaj plenigante la valon per vivo
Kun la movad', la polvo kaj la bruo
De sia ĉevalaro. La tempesto
Daŭre ronkas. La arboj, salutante,
Muĝas kaj kurbiĝas, kaj skuegiĝas
Ĝis trunkoŝiro. La vento glatigas
Rodanon kiel glaci-riveregon.
Kontraŭ akvo kaj vent' la fortaj kvaroj
Kun klinita nazeg' almonte iras
Per sia paŝ' regula. La saksĝalmo
De la fortega vento, harmonia,
Mirfrapas la orelojn de la bestoj.
Al sia feltoĉap' la ĉevalistoj
Metas la manon, kaj per tordaj lipoj
Malpacience ĵetas al mistralo
Torenton da insultoj : - Blovu,
Senbridigito de Dio, kaj krevu !
Ĉu do neniam, kotmanĝanto, iu
Ŝtopos la truon, de kie vi venas,
Ho friponaĉo ? Kaj per vipklakado
Ili vigligas siajn ĉevalegojn.

CIV

Nun, sur la pobo de la dua barko,
Ambaŭ sidante, la eta Angloro
Kun sia Vilĉjo la konversacion

* kotmanĝanto : sekiga vento.

Milde reprenis : - Vi devas ja scii,
 Ke ni, li diris al la belulino,
 Ni diaj amantoj, reĝoj sur tero,
 Ne povas kiel ĉiu ajn edziĝi...
 - Do, diris la knabin', ni geedziĝos
 Kiel ? - Revoku en via memoro,
 Respondis l'imagema holandano,
 Tiun tajlitan rokon misterplenan
 Ĉe kies pied' ŝprucas Turno-fonto.
 - Mi scias, ŝi diris. Tie vit' sovaĝa
 Kaj mikokularbo enradikiĝas *
 Ĉirkaŭ la roko, kune kun figujo
 Kaj buksotufoj. Tien mi jam iris.
 - Kaj kion plian vidis ? - Sunon, lunon,
 Kiu, sur la rok' de feoj ĉizitaj,
 Vin rigardas per frenezaj okuloj.
 - Kion ankoraŭ ? - Bovon kornohavan,
 Kiun atakas pikanta skorpio;
 Dume hundego venas por ĝin mortigi.
 - Kaj kion krome ? - Drakon, kiu vagas.
 Tiam Vilhelmo de Oranĝo longe
 Silentis. En lia anim' pensema
 Al li aperis sur la Rodan-bordo
 L'altar' de dio Mitra', la Turn-fonto,
 Kiu al ĝi, pura, klara, elŝprucas
 Kun la simboloj de l'antikvaj mitoj,
 La miregindaj signoj zodiakaj,
 Kiu plenigis per emociego
 La adorantojn de l'ardblanka suno
 En aktivec', almonte aŭ alvale
 Alveturintaj por devote fari
 Sian pilgrimon al dio Mitrao,
 "La sola nevenkebla". Kaj li diris
 En si : - Ho vi, ho suno de Provenco,
 Dio, kiu naskigas la anglorojn, **
 Kiu eligas el la ter' cikadojn,
 Kiu, en miajn vejnojn paliĝintajn
 La sangon de l'praavoj reruĝigas,
 Dio Rodano, kiun Drak' envolva
 Stringas en Burg', en Lion', en Arlezo, ***

* mikokularbo : subgenro el G. celtidoj, el kiu unu speco estas tipe provenca arbo (Celtis australis Linné).

** angloro : griza lacerto. *** En Bourg-Saint-Andéol, en Lyon kaj en Arles restas monumentoj de la Mitra-kulto.

Al kiu, nun ankoraŭ, eri l'arenoj,
 De nigra taŭro oni nekonscie
 Faras oferon, dio, kiu ĝoje
 Forigas l'ombron, kaj kies altaro
 Sur tiu nekonata riverbordo
 Estas dezerta nun, kaj kies rito
 Perdiĝis en forgeso, mi barbaro,
 Mi, eble lasta el viaj kredantoj,
 Volas oferi sur via altaro,
 Kiel unuan frukton kaj ateston
 De mia feliĉ', mian nuptonokton !

CV

Kaj, al la knabin' milde parolante,
 Li diris : - Tie ja, kie vagadas
 La Drak' Rodana, kaj kie la Feoj
 Enskribis la sortojn de la rivero,
 Tie ni ligos nin, eta Angloro;
 Poste, sub la rigardo de la luno
 Kaj de l'nokte vagantaj sovaĝbestoj,
 Niaj atestantoj kaj protektantoj,
 En la abismon de l'font', brakumante
 Enprofundiĝos ni. Ŝi ensorĉite
 Respondis : - Mia Drak', la Rodan-floro
 Neniam timis antaŭ l'akvoj bluaj,
 Kiuj spegulas la ĉiel-insignojn. *
 Mi naĝos ja kune kun vi samvoje
 Kiel printempa fiŝo re-almonte
 En la rivero dum la frajotempo.
 - Jes, ni kune naĝos en l'akvo roza **
 Aldonis Vilhelmo, en l'akvo pura,
 Kiel vi diris, kiel fiŝ' printempa
 En Rodan-flu', de tavolo' al tavolo
 Iras por fraj' al la plej altaj fontoj.
 - Sed por nin beni, ĉu ne estos pastro ?
 Subite diris la bona knabino.
 - Ha ! respondis la princ', jam longe mortis
 La pastro de tiu altar', al kiu
 Mi vin kondukos. Sed por nia beno

* ĉiel-insignoj : konstelacioj.

** Eble Mistral ludis per la provenca nomo de Rodano (lou Rose, prov. lu Roze). En krepuska helo okazas ja, ke la rivero rozkoloriĝas.

Kaj meso-kantado, ĉu ne ja estos
 Tie - kion vi timas ? - la geturtoj
 Kies ama murmur' neniam mortas ?
 Pri tio ŝi tamen iom tristiĝis.
 Poste, pensinte, ŝi diris : - Ja stulta
 Mi estas : de la Krucosigno, kiu
 Lin sorĉe elpelas, ĉu estus eble,
 Ke l'Drak' suferu l'ofendan potencon ?
 Sed mi, la plej eta, kiam mi vidos
 Min sub la arkoj de San-Spirit-Ponto,
 Sur kiu sidas en sia kapelo
 La granda Sankta-Nikola', mi petos
 De li, ke li bonvolu surpluvigi
 Sian benon sur tiujn, kiuj naĝas,
 Naĝas en danĝero inter la ondoj.

CVI

- Antaŭen ! Laŭtigante sian krion
 De ĝoj' kaj fervor', de malpacienco
 Aŭ de fordon' al Dio, la barkaro
 Lante antaŭeniras, kaj Kaburlo
 Kun sia alta pruo sur Rodano
 Ĵetas sian saluton al aliaj
 Alvale rapidantaj en la fluo.
 - Kun Dio estu ! - Kun Dio ! Ĝi estas
 La ekipaĵo de Johan' La Miĉo
 El Serjero. - Belajn kuplojn vi havas !
 - Ĉu la vento pelas ? - Kiel rabisto !
 - Do estas tiel kiel en turniro ?
 - Aj povra ! Dek kvin tagoj, dek kvar mejloj !
 Kiel ni diras. - Nu, ni vin salutas !
 Kaj, dum ĉies brakoj supren leviĝas,
 La barkoj en descendo malaperas.
 Tiel, de lok' al loko, la renkontoj
 Sin sekvas. - Ĉu ne Tomas' el Andanco,
 Jen de almonte ? Tondre ! Kiel fendas
 Li la akvon ! - Kun Dio vi ! - Adiaŭ !
 - Tiu krudul' posedas du pinelojn
 Kaj du sapinojn, kiuj certe donas
 Multan profiton. Plie, oni diras,

* pinelo, sapino : vd. piednotojn p.13.

Ke ĉion li je propra konto kargas.
- Ho ! nur kukurbojn !... Same oni diris
Mirindaĵojn pri tiuj Kuminaloj
Kun ties "Granda Zidoro", kaj tamen
Ili kiel aliaj devis cedi.

CVII

Kvar tagojn jam, tiele sub la rado
De l'granda sun' kaj sub la haŭtbrunigo
De l'aero Rodana kaj de l'vento
Rostanta, tra l'obstakloj ĉiaspecaj, *
Gruzoj, rokokornoj kaj travadejoj,
Pene gvidante sian manovradon,
Kaj po duonmejl' en hor' vojirante, **
La Kundrianoj celadis almonte,
Kiam en kvina tag', en rekta vido,
La San-Spirita-Pont' sur la vastejo
Etendis siajn dudek du arkaĵojn.
Kaj, alveninte en ties proksimo,
Signante al la princ', la mastro diris :
- Vidu, sinjoro, tiun pilieron
Kun alta tuf' de parietario.
Ĉu vidis vi ? De tie laŭkutime
Oni benis Rodanon ĉiujare.
Ha ! kiel bele estis !... Per la barkoj
Ni iris al ter' kunpreni la pastron,
Kaj li, la bonan Dion kunportante ***
Inter la bordoj de la riverego,
Rekte starante sur la pobo, levis
La Sanktan Sunon antaŭ la popolo
Kovranta la suprajn pont-parapetojn...
Nun ĉesis tiu belega kutimo,
Kaj ve ! mi ne povas kompreni, kial
Hodiaŭ ĉio perdiĝis, disfalis...
- Multajn aliajn ŝanĝiĝojn vi vidos,
Kris al li l'Angloro. Mastro, sciu,
Mondo turniĝas. Ĉu mi ne jam diris
Al vi, ke sur la rok' de Turno estas
Signitaj gravaj tumultegoj ? Grumble,

* vento rostanta : sekiga.

** duono de antikva franca mejlo ("lieue" = 4 km), do 2 km.

*** la bona Dio : la hosti-montrilo, portata en procesioj.

La mastro replikis : - Vin rekonduku
Al Malatra', kiu vin el ĝi prenis !
Tiu birdaĉo, per nura ĉeesto,
Dronigus ja barkegon tute plenan
De krucifiksoj !... Haltu !

CVIII

Sur la bordo

La krio : Halt' ! de vir' al vir' transflugis
Kaj resonas sub l'arkado de l'ponto.
Oni alligas tuj la fiksoŝnurojn
Kaj sin preparas por la vespermanĝo.
La ĉevaloj, baldaŭ maljungitaj,
En ŝvit' atakas pakojn da furaĝo;
Sur la pinel' alvale la barkanoj,
Haringon aŭ anĉovon panŝmirante
Senhaste maĉas kaj interparolas.
Ĉe la Ruĝaj Tavoloj la trapaso
Estas malfacila, kaj ĉe Donzero,
Kun tiuj dikaj rifoĵoj, tiu kluso,
En kiun Rodan' furioze kuras
Kiel marĉa taŭro, necesos peni !
Iom pli alte ili devos transi
Pene kun sia tuta ĉevalaro
Al l'alia bord'... Sed kiel utilis
Ĝemi ? Lion' ankoraŭ fore sidas,
Sed kiu havas tempon, havas vivon.
Nun do, hej ! post la dankesprima preĝo
Kaj kiam kun seka bruo la bajlo
Fermis sian tranĉilon korn-tenilan,
Oni remetis la jungajn kolumojn,
Kaj la forĝist' kontrolis la hufferojn.
- Daŭ ! Tirigu antaŭe ! Ekstreĉiĝas
Denove kontraŭ la vento kaj l'akvo
La granda ĉevalar'. Viva kaj gaja,
L'Anglor' sur la ferdeko de Kaburio
Trinkas la freŝan venton, kiu taŭzas
La harojn kaj ŝveligas la mantelon.
- Ĉe Malatra', post eble duonhoro,

* Ruĝaj Tavoloj : lignitaj tavoloj, kiuj, 3 km norde de la Ardeŝ-
enfluejo, trastrekas la fundon de Rodano kaj igas la pason
danĝera.

** bajlo : ĉefo de la ĉevalistoj.

Ŝi diras al la princeto Oranĝa,
 - Ni alvenos. Kiel ĝojos patrino
 Kaj miaj etaj fratoj kaj fratinoj !
 En mia korbo por ĉiu el ili
 Estas foirdonaco. Por Alekso
 Tamburo de Beŭkajro; por Gatuna
 Ar' de argilpotetoj; por Brigita
 Pupeto unusolda; por la bela
 Georg' ŝipeto tute ekipita;
 Kaj por patrin' saketo da daktiloj.
 - Kaj por mi, diris la princo, nenio ?
 - Por vi, mia Drak', ĉio, kio estas
 En lum' de l'sankta suno, en la ombro.
 Ordonu nur : mi estas servistino.
 Stringante ŝiajn fingrojn Vilhelm' diris
 - Do, kara, mi atendas vin vespere
 Ĉirkaŭ noktomez' ĉe l'insula bordo
 Kaj, kiel diras la kanto de amo,

Sur mia ŝip' rapida
 Mi rabos vin en freŝ' :
 Mi estas princ' holanda,
 Neniun timas mi !

CIX

Ho bela junec' ! ho eterna logo !
 La vento ĉesis nun. En la amplekso
 Kaj la mutiĝo de l'vasta Rodano,
 La viroj duondormis. La barkaro
 Sub la somera sun-ard' iris lante,
 Kun, jen kaj jen, kelka mevo fluganta
 Flirte, transverse super la rivero.
 Subite, el la lontano de l'nordo
 Aŭdiĝis zumzum'. En la horizonto
 Ĝi perdiĝis, kaj poste rezumzumis
 Kiel la padelbru' de muelejo
 Sovaga, kiu descendus la fluon.
 Poste ĝi sonis kiel tuset' surda
 Daŭre plilaŭtiĝanta, kvazaŭ tuso
 De iu taŭro aŭ drako sekvanta
 La serpentadon de l'arkipelago.
 Poste, en skuo subita, la ondo

Jen eksaltigis la tutan barkaron.
 Dume, almonte, fluo de fumaĵo
 Nigrigis la ĉielon. Tra la poploj
 Bruske aperis, fendante Rodanon,
 Longa fajroŝip'. La brakojn eklevis
 Ĉiuj barkanoj, gapante la monstron.
 Sur la pob' mastro Apjan', paliĝante,
 Mute rigardis la ŝipon magian,
 Kiu per la padeloj unge-batis
 Kaj movis terure grandajn ondegojn,
 Kaj, plej timige, fronte al li venis.

CX

- Flanken ! kriis al li la kapitano,
 Kaj ĉiuj sur la ŝipo al li signis,
 Ke li evitu antaŭe. Sed tia
 Kia kverk', neŝanceble tenante
 La stirstangon, la maljuna mastro
 Respondas : - Mandrin', ke mia Kaburlo
 Cedu al vi ? Rodano estas nia !
 Antaŭen ! tiru la kablون, mil dioj !
 Sed la maestr' apenaŭ fermis la buŝon,
 En fulma preterpas' la Krokodilo
 (Estis la nomo de la vaporŝipo)
 Atingis la pinelon kaj ĝin frapis
 Per unu el siaj radopadeloj,
 Kuntrenis ĝin en sia kur', kaj kiel
 Dogo skuegas sian kaptitaĵon,
 En konfuzego skuas la barkaron,
 Rabie implikiĝas en la barĝoj,
 Inter kiuj ĝi vojon al si faras,
 Trenante post si la tutan barkaron.
 Ho povraj ! La ĉevaloj retroiras,
 Forportataj de l'kablo en Rodanon
 Kun siaj kondukistoj ve-kriantaj,
 Senpovaj kontraŭ l'akvo furioza.

* Mandrin' : persona nomo de fama rabisto en la XVIII-a jc.,
 komune uzata en la senco : fripono, bandito.

** La pinelo (piednoto p.13) estas la dua barko en la vico.

CXI

Sed li, maestr' Apjan', vidante perditaj
 Siajn ĉevalojn, barkojn, sian vivon,
 Starante sur Kaburlo, kiu drivas
 Sen direkteblo, li, tute sensenca,
 Kun vejnoj mortaj, freneze gapanta
 Al la vaporŝipo, kiu, potencia,
 Disfendante du grandajn ŝaŭmokitrojn
 Kaj en l'aeron fumon elĵetante,
 Jam sulkis antaŭen. - Ho ! li kriegis,
 Malriĉulojn-mangant' ! Monstro sur teron
 Vomita de l'infer' por nin detruai !
 Lombarda judo ! Ido de inaĉo !
 Al vi malbenon ! malbenon ! malbenon !
 Kaj mortu viaj servantoj, en braĝo
 Kaj bolsvarmado kaj ĉiuj torturoj
 De l'inferac', en kiu vi hejtiĝas !
 Fuma malpuraĵo ! Ni la riveron,
 Ni jam mil jarojn sub ni ĝin tenadis;
 Sed vi, ĉar nun ĉio fal' detruigiĝas,
 Memoru, fiaĵo, ke jam nun kuras
 La fe-ĉeval', kiu ventron krevigos ! *
 Kion vi faris, tio vin mem trafos !
 Kaj Kaburlo, kun ĉiuj siaj barkoj
 Poste trenataj, kaj kun la ĉevaloj
 En baraktad' vagantaj aŭ dronantaj,
 En l'ondosvarm' ruliĝis al perejo.
 - Tranĉu la ŝnurojn, Dia malfeliĉo !
 Ĉar la ĉevaloj dronos ! nun blekegis
 La veturisto, dume penegante
 Por albordiĝi aŭ por engruziĝi,
 Ĉar li jam vidas antaŭe, terura,
 La Ponton, staranta por ĉion rompi.
 Sed la flu' superforta ĉirkaŭprenas
 Sapinojn, siselandojn kaj pinelojn, **
 Ilin kontraŭdirekte puŝas, pelas
 Kiel ŝafaron, kiu envojiĝas
 Al la buĉej'. La viroj, baraktante

* la fervojo, kies konkurenco, ĉirkaŭ 1854-1855, mortigos la vaporŝipan trafikon sur Rodano.

** vd. piednotojn p.13.

Por trafi, se ili povos, sub arkon,
 La pruist', la pilot', sur la stirilon
 Penegas. Vane ! La Angloro, muta,
 Kun okuloj fermitaj, jam ne estas
 En tiu ĉi mondo. Strikte stringata
 En la brakoj de l'princo, kiu gvatas
 De sur la pru' la katastrof-alvenon,
 Kaj en plenfid' de sia dolĉa kredo
 Ŝi sentas sin al paradiz' fluganta.

CXII

Laŭtiĝas kri' : - Aj povraj ! De Kaburlo
 Timegiga vortico ĉirkaŭvolvas
 En sia kirlo la barkon. Terura
 Bato tondras kontraŭ la ponto. Ĉio
 Rompiĝas. Vilhelm' pro la kontraŭbato
 Estas ĵetita en l'ondojn; premante
 En siaj brakoj l'Angloron li naĝas
 Tenante sin sur la akvosurfaco,
 Naĝas tiom longe, kiom li povas,
 Sed je finfin' la malicaj ondegoj
 Submergas lin, kaj ili malaperas.
 Sur la alia bordo de Rodano,
 Genuiĝinte, plorantaj virinoj
 Krias kaj preĝas. De sur la ŝoseo,
 Kien li iris post la bark-fracaso,
 Savante la junan bargisto-knabon,
 La bona Johan' Roĉ' denove plonĝas,
 Kaj li naĝadas, serĉante la princon,
 Kaj li plonĝadas, serĉante l'Angloron,
 Sed vane ! La rivero - kiu scias
 Kien ? - forportis ilin por eterne.

CXIII

Sur la ŝtimo de l'bord', kie sin viŝas
 La pereuloj, kun sanga vizaĝo
 Kuŝis la dika pilot' ŝaŭmkovrita;
 La barkanoj starantaj en la koto,
 La ĉevalistoj rongantaj blasfemojn
 Dolore tenis la kapon klinita,
 Sur ter' kolektante kelkajn restaĵojn.
 Al ter' piedfrapante subpremite,
 L'olda mastro ĝemis : - Ne estas juste !

Mia bela bestar', flot' tiel bela !
 Ĉio de l'misfortun' ruinigita !
 Poste li demandis : - Ĉu iu mankas ?
 Ĉu estas ĉiu el nia anaro ?
 Ili sin nombras, kaj : - Ni ĉiuj estas,
 Estis respondo. Mastr' Apjan' plu diris :
 - He ! ve pri ni ! Kiam la malfeliĉoj
 Estas venontaj, ili nepre venas.
 Eĉ povis ni ĉiuj enprofundiĝi...
 Sankt-Nikolao savis niajn vivojn :
 Ni en Kundri' dediĉos al li meson.
 - Do mankas nur, diris Jozef' Ribori
 Al la pruist' duonvoĉe, la povra
 Knabino, kaj tiu bona princeto...
 - Ha ! bona princet', respondis Johano,
 Mi sur Kaburlo jam longe rimarkis
 Liajn manovrojn... Kiu al vi diras
 Ke li ne estas la Drak' de Rodano,
 Kiu, antaŭscianta pri l'pereo,
 Sekvadis nin de etap' al etap'o
 Por forpreni l'Angloron en abismon ?

CXIV

Kaj mastr' Apjan' konkludis, kapskuante :
 - Anoncant' estas la spirito. Kiam
 Ĉe Malatra' en descendo ni pasis,
 Mi antaŭsentis, ke la malfeliĉa
 Knabin' (ĉar ŝi, al la river' ĵetita
 Certe suferis kompatindan finon)
 Pli-malpli baldaŭ, por ni ĉiuj estos
 Kaŭzo de kelka malbona renkonto.
 Ha ! miaj sep barkoj ! Miaj ĉevaloj !
 Ke ĉio ĉi estas fulme perdita !
 Jen fino de l'meti'. Povraj kolegoj,
 Vi povas diri : Bela viv', adiaŭ !
 Kaj poste, de la ŝultro ĝis la zono
 Volvinte ĉirkaŭ si la longajn ŝnurojn,
 Piede sur la bord', la tuta trupo
 Sen plua vort' reiris al Kundrio.

Fino.

Notoj

Kanto Unua.

- Strofo I

1. verso 18, p.9. Reĝlando, Imperio. Tiuj nomoj estas donitaj al la du flankoj de Rodano de post la tempo, kiam la riverego estis la limo inter la franca reĝlando (dekstre, okcidente) kaj la Sankta Rom-Germana imperio (maldekstre, oriente).

- Strofo II

2. verso 8, p.10. Legendo de Sankta-Nikolao.
Iam tri infanoj venis al porkaĵisto, kiu murdis ilin, dispecigis ilin kaj peklis la pecojn. Sep jarojn poste, Sankta-Nikolao tie pasante eniris ĉe la porkaĵiston kaj petis de li peklaĵon. Tiam li per miraklo revivigis la tri infanojn.

- Strofo IV

3. verso 18, p.12. Gargantuo : fabela giganto popularigita de Rabelezo, sed kies legendo datumas de multe pli antikvaj tempoj. Tiu legendo ankoraŭ nun vivas en la franca Centra Montaro, kie pluraj loknomoj devenas de lia nomo : Gargo, Gargaŭ, kc.

Kanto Dua.

- Strofo XVI

4. verso 12, p.23. La princoj de Oranĝo havis korneton en sia blazono. Kiel ofte en heraldiko, tie kuŝas vortludo : Cornet (pr. Korné) = korneto; Court-Nez (pr. Kurné) = Kurta Nazo, kromnomo de unu Vilhelmo de Oranĝo.
5. verso 32, p.23. Provenca reĝlando fondita de Bozono, grafo de Vieno, en j. 879.
6. verso 33, p.23. Verŝajne la nomo Imperio rilatas ne al la "imperio bozonida", sed fakte al la Sankta Rom-Germana imperio.

- Strofo XVII

7. verso 14, p.24. En Vieno estas romia cenotafo, kiun legendo nomas Tombo de Pilato.

Kanto Tria

- Strofo XXVII

8. verso 28, p.33. Diane de Saint-Vallier, poste Diane de Poitiers, amatino de reĝo Francisko I-a, poste de lia filo Henriko II-a (1499-1566)

Kanto Kvara

- Strofo XXXII

9. verso 8, p.37. Baron des Adrets, protestanta milit-ĉefo (1513-1587), fama pro siaj kruelaĵoj. Tamen la rakontata epizodo estas historie malvera.

- Strofo XXXIII

10. verso 16, p.38. Vento lombarda : vento el oriento (el Lombardio, trans Alpoj).

11. verso 24, p.38. Lun-kaptistoj. Eble aludo al moka kromnomo de la Lunelanoj, kiuj laŭfame, nokte provadas kapti en siaj fiŝretoj la bildon de la luno reflektata en la marĉoj.

12. verso 33, p.38. Ĝileta de Narbono. Ŝia nomo estas donita al la Langvedoka parto de la antikva Domiciana Vojo.

13. verso 35, p.38. Regordana : romia vojo de Nimo al Ĝergovio.

- Strofo XXXIV

14. verso 14, p.39. Dukino de Berri : La juna vidvino de Duko de Berri, filo de reĝo Karlo X-a, murdita. Energia, romaneska, aventurema, ŝi intrigadis kaj komplotadis kontraŭ reĝon Luiz-Filipon, cele surtronigi sian filon, legitiman heredanton de la reĝeco (Grafo de Chambord, "Henriko V-a")

- Strofo XXXIV

15. verso 20, p.44. La kliniĝinta turo de Soyons, nomita Cenglo, apartenis laŭfame al benediktana monaĥinejo kaptita de hugenotoj en 1539, kaj kies abatino aliĝis al protestantismo.

- Strofo XLII

16. verso 6, p.46. Kanzono de Venecianinoj. En la originalo ĝi konsistas el versoj alterne akcentitaj sur la antaŭlasta resp. lasta silabo (ritmo konservita en la traduko), kaj, escepte, rimaj : mi ne kuraĝis provi tiun malfacilan ekzercon en la traduko.

Kanto Kvina

- Strofo XLVIII

17. versoj 16, 17, 26, 27, p.54. L'Ermitage, Côte-Rôtie (sur la Rodanbordaj deklivoj), la Nerthe (en Vaŭkluzo), famaj vitejoj. Ankaŭ Châteauneuf-du-Pape (Nov-kastelo-de-l'Papo) nomas faman Vaŭkluzan vitgrundon.
18. verso 42, p.55. La Tarasko, fantasta bestego, kiu teruris la Taraskonan loĝantaron. La juna virgulino Sankta-Maria kaptis ĝin per simpla rubando, kaj ĝin malsovaĝigis.
19. verso 43, p.55. La Oldino : la miraĝo (laŭ noto de Mistral).

Kanto Sepa

- Strofo LIX

20. verso 23, p.67. La romia ponto-akvedukto Pont-du-Gard havas legendon similan al tiu de multaj pontoj aŭ aliaj grandegaj konstruaĵoj. La diablo helpis al ĝia starigado, kondiĉe ke li ricevos kiel salajron la animon de la unua trapasonto. Sed la diablo estis ruze trompita : la tagon de la inaŭguro, la unua kiu trapasis la ponton, estis ne homo, sed leporo. Spitite, furioze, la diablo ekkaptis la malfeliĉan beston kaj ĵetegis ĝin al piliero, sur kiu ĝia korpo ŝtoniĝis en formo de bareliefo. (Legendo rakontita de Mistral el la prologo de "Nerto").
21. verso 25, p.68. Ulurgoj : speco de koboldoj aŭ fantomoj, eble reprezentataj de vaglumoj.

- Strofo LXI

22. verso 17, p.69. "La fonto de Turno estas orakolo". La bareliefo de tiu fontano tre verŝajne estas dediĉita al dio Mitrao. Mistral donas al ĝi simolan interpreton : Mitrao, la dio kun frigia ĉapo, reprezentas la progreson, kiu buĉos la taŭron (la antikvan bargo-trafikon). Sed tiu mortigo iĝos ebla nur tiam, kiam la serpento (tradicia protektanto en mitologio) ne ludos plu sian protektan rolon. Nu, la serpento (la Drako), enamiginta al Angloro, eliris el Rodano en formo de princo Vilhelmo. Ekde tiam la bargistaro perdis sian protektanton, kaj la fatalo laŭ la orakolo povos efektiviĝi.

Kanto Deka

- Strofo XC

23. verso 11, p.102. Flavius, reĝo de l'Gotoj, ĉasante en la arbaro Silvo Godeska, pafis al cervino, familiara besto de ermito Sankta-Gilo. La sago trafis kaj vundis la sanktulon. Por reaĉeto la reĝo konstruigis monaĥejon, el kiu restas la romanika preĝejo de Saint-Gilles.

- Strofo XCI

24. verso 5, p.104. La kastelo de Taraskono. Temas pri la kastelo de reĝo Renato, grafo René d'Anjou (1409-1480), reĝo de Provenco (1434-1480), poeto kaj moralisto, "la bona reĝo Renato". La kastelo staras ĉe la maldekstra bordo de Rodano, apud la preĝejo de Sankta-Maria (Vd. ĉi-supre, 18)

Kanto Dek-unua

- Strofo CII

25. verso 30, p.116. Generalo Brune, feldmarŝalo de Napoleono, estis la plej fama viktimo de la Blanka Teroro, kiu furiozis precipe en Langvedoko kaj Provenco, kaj aparte en Avinjono en j. 1815.

La princo de Oranĝo

La dinastio de Oranĝo-Nasaŭo, kiu ankoraŭ nun reĝas en Nederlando, devenas de la Oranĝa familio (IX-a jc) pere de Johano I-a de Chalon, edzo de Mario de Baŭksoj, heredintino de la Oranĝa graflando.

La butomo, floro de Rodano, floro de cigno.

La serĉado pri mirinda floro estas konstanta en la tutmonda literaturo de la tempo, kiam Gilgameŝo serĉadis la planton de vivo kaŝitan en akvo.

Tiu floro estas evidente simbolo de la Najado antikva (Kanto Dua, XII, p.20). Rimarkinde, la cigno estas dediĉita al Apolono, dio de muziko, kaj al Venuso, diino de amo. La butomfloro estas floro de beleco kaj amo.

Frederi Mistral, kvarjara, preskaŭ dronis, volante pluki alian akvofloron (flavan iridon). Estas imageble, ke li dum sia tuta vivo serĉadis la floron de beleco kaj amo.

Tabelo de enhavo

Antaŭparolo	5
Enkonduko	7
Kanto Unua - Mastro Apjan'	9
Kanto Dua - La Princo de Oranĝo	19
Kanto Tria - La descendo de Rodano	31
Kanto Kvara - La Venecianinoj	37
Kanto Kvina - L'Angloro	49
Kanto Sesa - La Drako	57
Kanto Sepa - La Fontano de Turno	63
Kanto Oka - Alval-ire	73
Kanto Naŭa - Sub Avinjono	85
Kanto Deka - La Foiro de Beŭkajro	93
Kanto Dek-unua - La Re-almontiro	105
Kanto Dek-dua - La Katastrofo	119
Notoj	131